

Santiago Rusiñol

Folioj de la Vivo

==== FULLS DE LA VIDA ====

KUN PERMESO DE LA AŬTORO

■■■ ESPERANTEN TRADUKIS ■■■

• • ALFONSO SABADELL • •

Prezidanto de la «Grupo Esperantista de Barcelono», Membro de la «Lingva Komitato» kaj Viceprezidanto de la «V^a Kongreso de Esperanto»



J. Espasa é Hijos, Editores
579, Calle Cortes, 579 — BARCELONA

• 1909 •

OBRAS LITERARIAS EN ESPERANTO

ORIGINALES Ó TRADUCIDAS DE OTROS IDIOMAS

De V. INGLADA

- Kuracisto per hatoj (*El Médico á palos*), de Moratin. (*En prensa la 2.^a edic.*)
Prozo kaj versoj (colección de textos originales en prosa y verso). Precio, 2 pesetas.
- La nesia hejmo (*El nido ajeno*), comedia en tres actos, de J. Benavente. (*En prensa.*)
- Kruela adiaño (*Despedida cruel*), comedia en un acto, de J. Benavente. (*En prensa.*)
- La Angora katino (*La gata de Angora*), comedia en cuatro actos, de J. Benavente. (*En prensa.*)
- Triumfanta animo (*Alma triunfante*), drama en tres actos, de J. Benavente. (*En prensa.*)
- La malboufarantoj de la bono (*Los malhechores del bien*), comedia en dos actos, de J. Benavente. (*En prensa.*)
- La manĝaĵo de la sovaĝbestoj (*La comida de las fieras*), comedia en tres actos y un cuadro, de J. Benavente. (*En prensa.*)
- La maleleganteco (*Lo cursi*), comedia en tres actos, de J. Benavente. (*En prensa.*)
- Princino Bebe (*La princesa Bebé*), escenas de la vida moderna en cuatro actos, de J. Benavente. (*En prensa.*)
- Pli forta, ol amo (*Más fuerte que el amor*), drama en cuatro actos, de J. Benavente. (*En preparación.*)
- La sabata vespero (*La noche del sábado*), comedia en cinco actos, de J. Benavente. (*En preparación.*)
- La sprita junkro Don Kihoto de Manĉujo (*El ingenioso hidalgo Don Quijote de la Mancha*). (*En preparación.*)
- La griza vilaĝo (*El poble gris*), per Santiago Rusiñol. (*En preparación.*)
- Bonaj personoj (*La bona gent*), obra en quatre actes, de Santiago Rusiñol. (*En preparación.*)
- La Galeotoj (*Los Galeotes*). comedia en cuatro actos, de S. y J. Álvarez Quintero. (*En preparación.*)
- La ekspresa vagonaro (*El tren expreso*), poema de R. Campoamor, traducción en verso. (*En preparación.*)

De R. DUYOS

- La barako (*La Barraca*), de V. Blasco Ibáñez. (*En preparación.*)
- Inter oranĝarboj (*Entre naranjos*), de V. Blasco Ibáñez. (*En preparación.*)

De A. JIMÉNEZ LOIRA

- La perfekta edzino (*La perfecta casada*), de fray Luis de León. Precio, 2 ptas.

De A. SABADELL

- La patrino (*La mare*). de Santiago Rusiñol. Precio, 2 pesetas.
- Folioj de la vivo (*Falls de la vida*), de Santiago Rusiñol. Precio, 1 peseta.
- La blua korto (*El Pati blau*), de Santiago Rusiñol. (*En prensa.*)
- La Ĉiama Kanto (*La cançó de sempre*, dialect), de Santiago Rusiñol. (*En prensa.*)

Los pedidos de estas obras pueden hacerse á los autores respectivos: *Vicente Inglada*, Mar, 101, 3.^o, *Valencia*.—*R. Duyos*, Cirilo Amerós, 28, *Valencia*.—*A. Jiménez Loira*, Pintor López, n.^o 3, *Valencia*, y *A. Sabadell*, Diputación, 280, *Barcelona*.



FEDERACIÓN
ESPAÑOLA
DE ESTUDIOS
HISPANOS

Folios de la Vida

FULLS DE LA VIDA =====



Folioj de la Vivo

===== FULLS DE LA VIDA =====

VERKO DE

Santiago Rusiñol

KUN PERMESO DE LA AŬTORO ESPERANTEN TRADUKIS

Alfonso Sabadell

Prezidanto de la «Grupo Esperantista Barcelono»

Membro de la «Lingva Komitato»

ksj

Vicprezidanto de la «V.^a Kongreso de Esperanto»



BARCELONO

JOSÉ ESPASA & HIJOS, EDITORES

579, Calle Cortes, 579

—
1909

AL

Doktoro L. L. ZAMENHOF

GLORA ELPENSINTO DE LINGVO INTERNACIA ESPERANTO

KARA MAJSTRO:

Bonvolu akcepti tiun ĉi tradukon el kataluna verko, kiun mi kore dediĉas al vi, kaj kies celo estas aldoni sableron al la multaj lingvoliteraturaj tradukoj jam ekzistantaj, kiel ankaŭ pruvi unufoje pli per ĝi, kiel bone taŭgas via mirinda elpensajo por la traduko de fremdaj lingvoj.

Dio longigu vian vivon por la bono de la viaj kaj de la homaro, jen kion deziras via admiranto, ĉiam fidela, kaj preta vin sekvi

La Tradukinto

Barcelona la 15^{an} de Aprilo 1903^a

PROLOGO

Hodiaŭ kiam per Esperanto, oni povas legi verkojn el plej malsamaj literaturoj, mi kredis necese aldoni Katalunan version al ili, ne nur ĉar tio grandigos la nombron, sed ankaŭ por diskonatigi nian literaturon.

Ĉar en Kataluna lingvo la ordigo de vortoj estas sufiĉe bone komprenebla por fremduloj, mi tradukis kaj lasis la vortojn preskaŭ same ordigitaj kiel en la teksto, kaj mi ne dubas, ke oni bone komprenos tiujn ĉi *Folioj de la vivo* de nia fama pentristo kaj verkisto Santiago Rusiñol, kaj samtempe oni povos juĝi pri lia stilo.

Eble oni trovos trouzadon de artikolo la, konjunkcio kaj, vortoj tiuj kaj kiuj, sed mi celis tradukon plej fidelan kiel eble, kaj se mi trafis, jen la rekompenco, kiun atendas,

LA TRADUKINTO

AL LA LEGANTO

Se transturnante la paĝojn de tiu ĉi *Folioj de la vivo* ci eble vidas, ke estas en ĝi, pli da vintraj folioj, ol da printempaj; se je ĉiu paŝo ci renkontas korpmalsanojn kaj animajn melankoliojn; se ci renkontas pli da ftizaj okazoj, ol eksplodojn de gajeco; antaŭ ol kulpigi kaj nomi pesimisto la subskribinton de tiuj ĉi folioj, atente relegu dum momento la libron de ciaj rememoroj, rigardu, kaj ci vidos ĉirkaŭ ci mem, kiom da malmultaj rozkoloraj densaj nebulaĵoj, kaj kiom da nigraj nuboj trairas la fundon de la vojo; ci vidos kiel larĝaj estas la grizaj ebenaĵoj, kaj kiel mallongaj la oraj; ci vidos kiel rapide oni priskribas la rememorojn geĵajn, kaj kiom da inko oni bezonas por priskribi la malgeĵajn.

Se ci tion faras, kaj se cia volo alkondukas cin ĝis la lasta paĝo de tiuj ĉi folioj de intima prozo, tiam mi atendas la absolvon. Esplorante naturafon kun cia propra spertado, certe ci konstatos ke mankas pli da animaj malsanoj ol da malrealaj feliĉoj; ci vidos ke se ni plendas pri tio, kion oni nomas progreso, estas ĉar ni ne kredas ke ĝi estas tia, kia ĝis nun oni ĝin praktikas; ci rimarkos ke mi serĉas pri multaj aferoj, sed mi serĉas nur per la maldolĉeca impotenco de tiu, kiu ne povas ilin plibonigi, kaj ilin priskribas ties, kiel ili estas, kaj ne kiel mi ilin dezirus; ci trovos ke ni ne komprenas la progreson kiel la plejmulto t. e. multe da maŝinoj, metalfadeno, vaporo, rektaj linioj, kaj multe da senĝeneco; sed nur estetiko por la okuloj, poezio por la vivo, ideoj por la spirito, kaj arto intima, kiu konsolu nin; ci vidos ke meze de la disreviĝoj de la estan-

to, ni ŝatas trakuri la testamenton de la estinto por rikolti ĝiajn florojn kaj el ili fari modernecigitan arton, seriozan arton, kiu ne blindigu la naivulojn per roboj kromaj kaj vestotenejaj silkajfoj; spiritan arton plenan je originalej delikatecoj kaj estetikaj filigranoj: arton kiun ni dezirus vidi kulturigita en nia lando por esti ĝiaj unuaj fervoruloj, kvankam la lastaj artistoj.

Ĉiuj ĉi tie sekvantaj folioj estas nur desegnaĵoj de la estinto, intimaj notoj enmetitaj en la albumo de la vivo, nunaj skizoj, ellasitaj plumoj por kio ornamu siajn flugilojn tiu, kiu pretiĝas ekflugi kaj estas sufiĉe forta por altiĝi; folioj elŝiritaj el proza kalendaro, sensencaj dokumentoj de la arkivo de la penso, plenpolvaj unuj, aliaj konfuzaj, indiferentaj aŭ maldolĉaj, sed sincere priskribitaj kaj plenaj de la amo, pri kiu mi jam parolis.

La vojo de la nuna ekzistado similas al koridoro de hotelo, longa, longega, nefinebla, kun ĉiuj pordoj samaj, kun ĉambroj numerigitaj, unuformaj mebloj, kaj sama ornamaĵo ĝis la fundo. Ĉiu pordo, kiu malfermiĝas, estas tago de moderna kalendaro; la saman oni vidas interne de la ĉambraro: saman indiferecon, saman egoismon, saman solecon, kun pli aŭ malpli da komforto, kaj unu aŭ du mebloj pli. Nur ia fermita pordo antaŭsciigas poezion, kaj nur funde de ĉio, oni vidas helajn konturojn, kiuj kuraĝigas tiun, kiu marŝas meze de tiuj glataj muroj.

Priskribante tiujn ĉambrojn, kaj notante tiujn numerojn, ni rigardas la lumon de la estonteco, la spiritualistan lumon, kiu marŝigas nin kun plenespero.

Eble ni revas, kaj eble ni marŝas solaj.

Se ĉi volas akompani nin kaj revii kune kun ni, sekvu la foliojn de la vivo de tiu, kiu donus la sian, por vidi la arton de lia popolo liberigita de egoismoj kaj plena de vera lumo.

SENCELE

Mi memoras ke kiam mi estis infano, en la lageto apud Puigcerdá' mi distriĝis per ludo, kiu plej ravis min.

Mi prenis barketon, kiu estis tie, remis ĝis mezo de la lageto, kaj alveninte tien, mi lasis la remilojn en la barketon, eliris la direktilon, sterniĝis, kaj lasante min konduki de la vento, ne rapidante nek priatentante la poŝhorloĝon, sen korpreno, kapdoloroj nek pripensoj, mi lagveturis ĝis kiu ajn lagbordo, kaj tiun plezurigan nedecidecon mi nomis, ludi «je senceleco».

Da tiam mi same ludis, tiel ofte kiel estis al mi eble, dum la folioj de la vivo. Mi utiligis la sunon kiel horloĝon, la nedecidon kiel direktilon, la okazon kiel kompason, la vorton kiel telegrafon, la ĉaron kiel vagonaron, la okulojn kiel fotografilon, kiel telefonon la malurĝan devigon, kaj kiel kalkulon, mian malbonan memoron; sed ho ve! en la nuna epoko kiam ĉio rapidas kaj korprenas, ludante tiamaniere, oni riskas resti ĉiam kie oni loĝas.

Tio ne malhelpas. Esti malakurata enhavas grandvaloran utilon, ĉar jam foriris la akuratuloj kaj tial ne malhelpas; la suno same leviĝas por unuj kiel por aliaj; tiuj ĉi progresadoj praktikaj ne konsolas la deziregojn de la spirito eĉ unu momenton; kaj dum ni atendas la moralan progresadon, kiu devas esti la vera, ĉiam kiam mi povos mi enŝipiĝos sen remiloj, kaj ludos je senceleco.

KOLEKTO DE LA KORO

Hodiaŭ, kiam estas tiel mode kolekti ĉion; kiam estas, kiu eĉ kolektas montojn eĥohavantajn, kiu kolektas Svisajn lagojn kaj, kiu bankbiletojn, minojn kaj fabrikojn de bicikloj, hodiaŭ, se mi povus, mi ankaŭ farus kolekton: kolekton de rememoroj.

Mi havus hejme, ekzemple, tiujn makulitajn kajerojn plenan de inkfingrafaj postsignoj, kiuj tiel suferigis min kaj al kiuj mi ŝuldas tiom da manbatoj kaj ŝparitaj desertoj; tiun inkujon plenan de buloj, kaj tiun malagraban nigran tabulon, kie ĉiam la kalkuloj malsukcesis; mi havus la arbojn, kiujn ni vidis super la domkorto, kiel pecon da pejzaĝo kaj kiuj meditis nin pri nealesto al lernejo, kaj revoj en plena aero, mi havus la sonorileton, kiu avertis pri laborhaltigo, la momento de la kurado, kaj de la ŝatita libereco; mi havus kajton, kiun mi havis kun sur ĝi pentritaj luno kaj suno, la kartonojn, turnoludilojn, palmobranĉon plena de ĉerizoj, akverelan skatolon plena de sukeraĵoj, kaj ĉiun, tiun malmultvaloran vendadon donacitan al mi de la bonaj Reĝoj (1), dum tiuj noktoj de sendormeco, sed de rozkolora sendormeco.

En alia fako estus ia difektita kaj malagordita orgeno, kiu ludus, laŭ mia gusto, romantikan romanzon, vekante malfortigitajn fibrojn el iaj momentoj de la vivo; estus en ĝi senfoliaj floroj, kies signifojn mi bone komprenus; estus spegulŝranko plena de sanktaj restaĵoj, dubeflavaj kaj konfuzaj portretoj;


(1) La Tri Reĝoj aŭ la Magaj Reĝoj provizas la infanojn per ludiloj en Hispanujo, same kiel St. Nikolao en Francujo.

iaj fenestroj kun iaĵ floroj; plie pejzaĝvidaĵoj kun arbaroj kaj ebenaĵoj kies vojojn, nestojn ĉe la ombro, kaj parfumon de ĉiu folio, mi bone konus, plie leteroj kun tremskribitej literoj; kaj ĉiu bruo kaj odoro estus rememoro de la vivo.

Pli malpraksime, multe da receptoj kaj noktolampeto, vidaĵoj de hoteloj, gastejoj kaj vojoj; ĉi tie sonorilega ventoflago; pli malpraksime pordo, kantanta koko, ploranta ekvoĵeti'o, muzka skatoleto kun murmurado de notoj, vilaĝa sonorilo, sonoranta por la sukkuŝiĝo, kalendaro nedeŝirita post momento kiun mi konus, interlima kruco, kaj multe da tombekrucoj.

Kaj tiu ĉi kolekto farita el korrestaĵoj, estus nur por mi, ĝi estus mia preĝlibro; kaj ĉar neniu ĝin komprenus, mi havus ĝin zorge enfermita kaj estus la sola, kiu ĝin legus.

PRINTEPAJ FOLIOJ



Artefarita printempo

La Caro devis iri Parizon, kaj pro motivoj de strategiaj kunligoj, oni deziris regali lin, per vere eksterordinaraj festoj.

Por tiu viro de la neĝo, anstataŭ festenoj kaj paradoj, triumfar-kajoj kaj ĉevalkuradoj, kio plej devis kortuŝi kaj dorloti lin, estas sendube bona printempo.

Tie en Rusujo, la fraŝa verdaĵo certe mallonge daŭras; la floroj ĵus naskiĝintaj devas jam velki; la neĝo ĉion mortigas: tial, bela kaj florhava pejzaĝo, kvanto da floroj dissemataj sur la branĉaro devis entuziasmigi lin; sed ĝuste okazis ke pro bedaŭrinda manko de patriotismo, en la promenejoj kaj aleoj, tiuj laŭvice starantaj arboj estis nur nervaĵoj, kaj trunkoj malprovizitaj ne nur de folioj, sed eĉ de burĝonoj, kaj nek per ediktoj, nek per dekretoj de la Respublika prezidanto, oni povis devigi ke ili antaŭfloru, por la bono de la franca popolo.

Iam tio ĉi estus estinta malagrabra afero; sed hodiaŭ dank'al progresado, kaj al la rimedoj de l'industrio, kial ĉagrenigi? Ĉu okazas ke ni ne havas printempon kaj ĝin bezonas? Nu, ni faros ĝin artefaritan. Ĉu okazas ke la arboj ne floras? Ni jam faros paperflorojn. Ĉu ke la arboj estas sen folioj? Ni havas maŝinojn por fari ilin ĉirkaŭdetranŝitajn, virojn por iom post iom ilin alglui, kaj monon, paciencon kaj promenuojn, kiuj tute konsentos kaj laŭdos la novan mendofaritan printempon.

Ridinda afero estus ja, ke en la fino de la deknaŭa jarcento, oni estus devigita atendi la korpremantan trankvilecon de Naturo. Oni eklaboris, elŝe'is en ujon la tutan paperon el Parizo, oni faris miliojn da floroj, kaj ilin algluante sur la arboj laŭlonge de la Elizeaj alvojcoj, oni aranĝis tian elburĝonadon, ke se Majo estus subite alveninta, ĝi ne estus trovinta branĉeton kie naskigi folion, nek burĝonon por enloki floretan.

Migdalarbfloroj greftitaj sur platanoj, teorojoj algluitaj al tilioj, gardenioj sur maronarboj, kaj tiel plu laŭlonge de la promenejoj, oni maskis tiujn arbojn per tia kvanto da koloroj, oni ilin vestis tiel, ke tio far'gis la triumfo de la materia progreso, taŭga leciono por la impertinenta kvieteco de tiuj kvar sezonoj, kiuj ĉiujare faras la samon; bona cenzuro por la arboj de la promenejoj, sciiganta ilin flori, kiam

tio taŭgas por la patrujo, kaj kiam tion ordonas la popolo, per sia granda suvereneco.

Tio estis la moderna printempo, la almito de la nuna finiĝanta jarcento, esperante alian plej bonan; tio fierigis tiujn, kiuj kantas strofojn al la materiaj progresadoj, sed aj!, kompatinda popolamaso, kiu ne kalkulas pri la leĝoj de la Naturo, pri la belega malŝato de la *mirinda* faro, detruanta senkonscie ĉion, kion faras la formikoj.

Kiu ja povis tion antaŭvidi! Jen pluvis!

Pluvis, la floroj senkoloriĝis, kaj la koloroj elgutante trunksuben de tiuj tiel bone ornamitaj arboj, anilintinkturis tiun grandan elburĝonadon. La floroj similis pastgluon, la rozoj algluitaj sur la trunkoj, ŝvitis konfuzan glazuraĵon; la blanka migdalarbfloro malpurigis per koto; la ŝtofaj gardenioj similis bantajn pecetojn bandaĝantajn la vundojn de tiuj trunkoj; kaj ĉie gutadis tiuj paperaj pecetoj de vaneca tago.

Vespere, sur la flankaj defluiloj fluis florpasto, la veturiloj premeĝis ĝin, kaj la ĉifonistoj kun forko en mano plenigis la sakon, kaj forportis la postlasaĵojn de tiu granda printempo, kiun la homoj aranĝis.

Natura printempo

Printempon tiel florhavan mi neniam ankoraŭ vidis, kiel en Mallorca (Maljorka) vilaĝeto, vilaĝeto blanka, kiel cigno, kun blua baldakeno kiel plafono kaj vasta maro, kiel tapiŝo.

Matenon, kiam mi malfermis la fenestrajn kovrilojn, rava odoro supreniris el la ebenaĵo, la tuta vilaĝo bonodoris, kaj aromo de freŝa burĝoneto, de malfermita floro, de florplena herbejo kaj de matenkrepusko, ebrigiis la sentojn. Post la pajlmortersaj muroj superfluo da blankoloreco disiĝis de la blukoloreco: roz — verd — kremblankkoloro, blanko violkolora respegulita; ĉiuj nuancoj de la blankoloreco formante belegajn bukedojn, kaj ne lasante lokon por la folioj; ĉiuj florformoj, laŭ amasoj, duone malfermitaj, plenmalfermitaj, je traŭboj, vicoj, etenditaj ebenaĵo antaŭen ĝis ŝutiĝo en la maron; ĉiuj vojoj tapiŝitaj per bonodora neĝado, ĉiuj riveretoj punktprovizitaj, la tuta vato ornamita, printempa plenarbaro, eksplodigante samtempe kiel erupcio de vivo. Neniam la tero flankinornamis sin, kiel en tiu blanka vilaĝeto; neniam la maro vidis tiel proksime, ĝardenon tiel belan; neniam la abeloj kaj papilioj havis tiom da parfumej por ĝui, nek

domon pli bone ornamitan por sin bani la birdoj, nek perspektivon pli belan por la homa rigardado.

Kiel feliĉa oni devas tie vivi! sendube pensis la trairanto antaŭ tiu granda festo. Kiel dolĉaj kaj malpezaj devas gliti la horoj, sub tiu ĉi belega bukedego! Kia rava paradizo, kaj kia malvarmeta kasejo por neniam plu foriri de ĝi!, mi pensis, atente rigardante tiun pejzaĝon.

Sed ho ve! tie sur la maro, sur tiuj ondoj de superega blueco, preskaŭ sub la branĉoj mem, balancante meze de la pezo de la vivo de tiu belega blankeco, estis griza ŝipo, mortanonca ŝipo, konfuza ŝipo, plena de elmigrantoj ne sufiĉnombraj ankoraŭ, kaj ĝi venis por forporti aliajn el tiu nesto de blanka plumo, kaj ilin konduki ondojantaŭen, kie la neĝo ne estas florfarita, nek estas printempo.

Kien iris tiuj homoj, lasante la patrujan parfumon, suprenirante sur lignaĵojn kiuj ŝvitis malriĉecon kaj gudronon? Kion ili iris serĉi trans la ondoj? Kion ili trovus malproksime en tiuj modernaj urboj, starigitaj kvazaŭ banbarakoj por resanigi sian mizeron; urboj nove konstruitaj kun numerordigitaj stratoj, sensukarboj kaj fremdaj homoj? Kion ili trovus malproksime, meze de la haladzo de fumtubo nigremakulante la Printempon, en tiu tera koro, nigra pro la koakso, aŭ meze de tiu maĉinbruogado, angoraj jukoj, kaj la ekpuŝoj de homoj por atingi sidlokon apud la tablo de la mizera vivo? Kiujn kantojn ili kantas en tiu lando sen poezifonto? Kiel ili povus preĝi en la luitaj preĝejoj? Kie ili estus enterigitaj, se ili mortus en tiuj realigemaj landoj, kie la mortintoj tiel ĝenas? Kie ili vidus la blankecon de la Printempo, kiun ili lasis forirante?

Ho mizerplena homaro! mi pensis. Kie ĉi ne havas Printempon, tie ĉi ĝin kreas per forno, ĝin faras nenaturan, imitas kaj ĝin maskigas! Kie la homoj revas ĝin, envias, kaj klopodegaj ĝin atendas, tie ĝi trairas persekutata de la vintro, kiu ĝin proprigas al si; kaj kie oni ĝin havas..... oni elmigras!

Por kio utilas la Naturo? Kial ekzistas floroj por ĉiuj, kaj ankaŭ ne estas fruktoj por ili? Kial ĝui la esperon, spiri la aromon, se kiam alvenas la horo de la vivo kaj la momento de la promesita rikolto, por vivi, oni devas forkuri al korpemaj landoj? Kial la vintra neĝo mortigas la kompatindajn malriĉulojn, kaj kial la neĝo de la Printempo, ne revivigas ilin?

Kiel malgaja ja estas, ke la homa korpo ne nutriĝu per beleco, same kiel sin nutras la spirito, kaj ke oni estu devigita forlasi la patrujon, ĉar ĝi ne provizas por vivi!

Kion diras la floroj

Domo en kiu oni ne vidas ian floron, ĉu ĝi estas riĉa, ĉu malriĉa, ne inspiras al mi sufiĉe da komfido.

La floroj, en ĉambro, balkonpendantaj, brodante ĝardeneton, elirantaj el florvazo, aŭ lokitaj sur haroj, estas la versoj sen rimo, la animdelikateco, kaj la amo sen vortoj, kiujn el fundo de la poezio el-tiras la virino, por plezurigi sian koron.

Per la floroj de ĉambreto povas koni, kiu ilin rigardas, la delikatecojn de la spirito, la subtilajn perfektecojn, la elegantecon kaj la edukitecon, la ventegojn aŭ markvietecojn, animstaton, duontonojn de la fibroj, kaj eĉ la sopirojn, esperojn, kaj rememorojn, kiujn la ĝardenistino havis, rimante la kolorojn kaj versaĵojn de tiuj punktetoj de poezio.

Bukedon da ruĝaj dianoj, neniam havas proksime de siaj okuloj malgaja virino: tiu eksplodo da koloroj, estus surdiganta krio por la ripozo, kiun ŝi bezonas. Trunketon de blanka lilio melankolie kolkliniĝinta, neniam havos proksime de si ridema virino, se la rido interne-liras: tiu malsanema floro haltigus ŝian ridadon. Ne flaros la aromon de floroj el svenparfumo, virino, kiu ne akriĝos la sentojn same kiel, ne vidos, nek ĝuos el nuancitaj kaj delikataj nuancoj, la virino kiu ne vidas per la koro. Neniam komprenos la modestecon, kiun naiva floro enhavas, senmajesta virino, same kiel belega floro, neniam estos sufiĉe ŝatata de malgrandaj animoj.

Kiom kaj kiom da fojoj per la mieno de la floroj, vi komprenis tion, kio okazas post la vizaĝoj vestitaj kaj maskitaj per trompanta masko! Tiuj grandegaj bukedo, senarte amasigitaj, kiel bone sciigas pri la vaneco de momento! Kiel baldaŭ ili defalos el la bukedo! Tiu ornamanta bukedo, kiu dum la desertoj de festeno, ĉiam tostigas unu aŭ alian, petanta ke oni ĝin forsendu, kiel bone sciigas ke tie, ĝi enuigas, kaj ke estas hotela bukedo, bukedo luita po horoj, bukedo da fremdaj floroj, kiun oni forsendas per recepta tosto! Tiuj donacitaj floroj, kiuj ĉie enuigas, kiel ili ja sciigas la vanecon, kiu ilin kunligas! Kaj, male de tiuj ĉi floroj, tiuj, kiuj sciigas virinmanon, la balkonpendantaj plensunumitaj, la kuvenmetitaj, superversitaj per benita akvo, tiuj proksime de la piano gajigitaj aŭ malgajigitaj per ĝuoj aŭ muzikplendoj, tiuj, kiuj vivas en alkovo, meze de birdoj, tiuj vivantaj

en fajrujrigardo, per kia eleganteco ili sin movas, per kia freskeco vekigas, kaj per kia bedaŭro ili senfoliigas!

Neniam mi ilin vidas senfoliigi, kiam la penso ne sciigas min, pri ia kaŝita malgajeco; neniam mi ilin vidas, kiam mi ne pensas pri tiuj, kiuj tie loĝas, pri tiu ilin zorganta, kiam mi ne pensas, ke ili ploras iun malsanulon.

Kiu estas kapabla scii la eksteren eltirigantajn kolorojn por danki kiujn ilin amas, plori kun tiuj, kiuj ploras, kaj ami tiujn, kiujn ilin amas? Kiu estas kapabla scii kiajn nuancojn ili uzas por montri siajn animojn? Kia konfido ili ja inspiras, kaj kiel ame ili akompanas!

Malgaja muziko

Se ni komprenus, kion diras la birdoj, kiam ili kantas en kaĝo, certe ni aŭdus vortojn de senfina malgajeco. Ni kredas, ke ili estas gajaj ĉar ili kantas; ni kredas ke tiuj versaĵoj, kiujn ili trilas estas amaj strofoj ĉar ili laŭte kantas; ni kredas ke estas gajeco, kio eble estas la plej sentema instinkto kaj la plej subtila plendo de la dolora ilo. Rigardu la homon, kiam li sentas malgajan ondon, tiam li eksplodas per vortoj, kiujn la aliaj ne komprenus; kiam li sopiras; kiam li sentas tra siaj nervoj la larmojn, kiuj aliras al la okuloj, kaj li deziras haltigi tiujn larmojn; kiam li devas elpeli el interne la nebulan melanĉolion, kiu estas animmalsano, kaj li timas ke tiu malgajeco eksplodante renkontu la gajecon de la aliaj; kiam li estas sola kaj estas parolonta al si mem, li diras kantante mallaŭte, kion li ne povus elparoli, li forpelas per la lipoj la nebulon, kiu korprenas lin, kaj li komiŝas la elfradon de siaj suferadoj al la muziko.

Eble la birdoj tion diras interne de kaĝo; ili forpelas sian malgajecon trilante; eble pro tio, kiam malvirta animo per pikvundo ilin blindigas, ili kantas pli, ol ili kantis, ĉar ili havas pli da suferadoj por kanti.

Bruoj de vivo

Estas Printempaj noktoj dum kiuj vi alproksimiĝas al la fenestro, rigardas malproksimen, kaj sub vastviolkolora sennuba ĉielo brileganta per fajrejoj, alvenas el tiu nedifinita ebenaĵo, viva bloveto, nas-

kiĝa aromo, fermentiga cindrovarmo, kiu devigas vin pensi ke la tero atendas ke naktiĝu, por ĝermi meze de l' mistero.

Ne estas bruoj, kio supreniras el la ebenaĵo: ĝi estas nedifinita sentaĵo de nova brueto, kiun ni ankoraŭ ne zorge ekzamenis, io, mi ne scias kion, ne klarigebla, kiun ni ne ricevas per la oreloj, per la okuloj, nek per rememorigo, sed kiu estas nur subtila mantelo de tiu malvarmeta atmosfero, kiu ŝirmas nin siamaniere; ne estas koloroj, kion ni vidas rebrili; ĝi estas senkoloriĝinta etero farita el certaj nevideblaj vibroj kaj ondmovoj, kiujn ricevas la antaŭento: ar. kaŭ ne estas parfumo la konfuzeco, kiun oni spiras: ĝi estas la bloveto de Printempo; evolucioj de formoj kaj esenco, ekvekiĝoj ne konataj de ni; eble estas la sola kaj sama voĉo de la vivvibrado, kio alvenas al la fenestro dum la helaj luncktoj.

La sentaĵo, kiun ni ricevas de tio, refortigas la spiriton, kaj sentante, kion ĝi ne komprenas, la animo subtiliĝas; oni aŭskultas la ebenaĵon, spiras ĝian poezion ĝuante solecon faritan el nova vivo... sed ho ve! la iluzio daŭras nur momenton: la bruo de strata gurdo, malproksimaj ridegaj, rekten suprenirantan kaj fajrereljetantan raketo, rekondukas vin al malĝajeco, malhelpas ke vi aŭskultu la voĉon de la soleco, kaj ili vin rekondukas al prozo.

La tero parolas nur dum tiuj momentoj, kiam oni ĝin aŭskultas, kaj tiuj momentoj, estas tre mallongedaŭraj.

Libereco

La sklaveco de ĉiu speco de negroj estis de longe eksleĝigita.

De la ebonkolora paro, brilhava kaj violkolora, ĝis la sveninta kolorigo de brunulo perdinte sian havon, kia ajn estus la haŭtkoloro, la homo rajtigis ĉiopovan liberecon, labori kiel la aliaj, nutri sin per la negreca ŝvito, posedi kvanton da negretoj propraj, personaj kaj legitimaj gefiloj, kaj ĝui ĉiujn liberecojn ennctitajn sur la pri ĉi tiuj, parolantaj libroj.

Malgraŭ tiuj ĉi favroj; permesitaj per dekretoj kaj subskribitaj sur karaj biloj, tie en la *Isla* (insulo), ĉu pro kutimo, ĉu por briligi sin per brilo de la negreto, eble ĉar ili malproksimigas la muŝojn pli gracie, ĉar la koloro estas pli *elportema*, aŭ ĉar ili pli bonfartas kaj elpezas malpli, la ĉefa afero estas ke multaj *americanos* (amerikanoj), havis proksime de si konfidan negreton, kaj lin kreskigis per la plena libereco, ordonita de la dekretoj, pri kiuj ni parolis.

Kelke da ili, amie ilin tiel fervore, tiel kutimis vidi la nigrecon apud si, ke kiam alvenis la momento liveri la vendejon al la nevo, Sangi la argentmonerojn, enpaki la piastrojn en cigarskatolojn, mangi la lastan kokusan kaj psidiofruktan peceton, ĉirkaŭpremi la duman parencearon, kiun ili lasis sur la marbordo, estis tiel granda, ni jam diris la plezuro, kiun la negreto kaŭzis al ili, ke enŝipiĝante ili diris al si mem: «Bone, kion ni faros: kie do restas tiu ĉi infaneto?» Kaj oni alkondukis lin en Hispanujon.

Ĉe la marbordaj vilaĝoj okazis ĉiunmomente tiaj alvenoj. Ne estis ŝipo veninta el ameriko, kiam post ia grava Nabab'o oni ne vidus kun-tiritan negreton kvazaŭ fremda birdo, treman kaj frostsenteman, kapturnigitan pro la ŝipskuadoj, kaj malfermantan okulojn similajn al du boligitaj ovoj, kun du nigraj kaj brilantaj pupiloj. Dum ke kaj tagoj la negreto estis admirata de ĉiuj; li estis kvazaŭ spektaklo, lignaj turnĉevaloj muzikenhavaj, parolanta simio, kiu konis la personojn kaj ne mordis, kuriozaĵo, perfekta estaĵa imitado, kiun la aliaj estaĵoj malkvietigis ĝis kutimiĝo, kaj ĵus kutimintaj, ili vidis, senkonsciaj kiel tio malaperiĝis.

Ĉe unu el tiuj vilaĝoj, oni estis ankoraŭ neniam vidinta unu, kiam tagon laŭ la elektra rapideco per kiu la novaĵoj kuras tra la vilaĝoj, oni sciis ke *don (1) Juan* (don Johano) alvenis kun negreto. Ha, miaj karaĵ! kia alarmo! kia renversiĝo, ĉe infanaj kaj plenkreskaj homoj, kaj kia okazonta amuzaĵo!

Nek kiam alvenis la deputato, nek kiam preterpasis ministro aŭ militanto elmontranta la kvazaŭdorman kapon post la vagonfenestro, iris al stacidomo, tiom da popolamaso, kiel por vidi tiun negreton.

La vagonaro alvenis malakurate; same kiel okazas ĉiam, kiam oni avidas, kaj *don Juan* ekvidante tiun popolamasegon, kredante ke estas por li *en americano* (amerikane) salutis, per kontentiga rido: li forlasis la duan vagonfakon, oni eltiris pakaĵojn kaj skatolojn, kaj el interne de amasvalizoj, elsaltis la negreto, per supersalto de birdo forlasanta sian kaĝon, kun mieno de timegigita merlo iranta al manĝujo, de surprizita juna pigo ĉirkaŭita de ĉasistoj, kiuj ĝin atendas por altranĉi ĝiajn flugilcojn.

Don Juan estis ĉirkaŭ kvindekjara. Ne estis el tiuj *americanos* (americancj) kiujn la febroj, la pikvundoj de *cucarañas* i *cucarachas* (skaraboj kaj onisejoj), la varmeco, la sukergustaj fruktoj, kaj la aero de la starakvoj eliasantaj fermentaĵojn el ĉiaj ajn kanoj, flavigas kaj

(1) *Mosita* hispana titolo samvalora, ol sinjoro.

sekigas la okulojn sub la okulharoj. *Don Juan* konservis la ruĝkolorcon de riĉiĝinta kamparano, violruĝkolorco disigita sur la vizaĝo preskaŭ vangharplena, kaj rekreskanta sur la nazo, vasta kaj etendita ĉe ĉiu flanko de la vangoj; la lipoj montris dubeflavan ringsignon pro la multjara cigarsubtenado, la lipharoj, blankaj en la randoj estis blondaj pro la senĉesa fumado, la okuloj el malpura bluo, energiaj kaj flammigantaj; la oreloj algluitaj al la haroj; kaj li estis sen duonlinioj, vasta kaj belkreska, kostumita per Amerikaj helaj ŝtofoj, kaj ornamita per granda poŝhorloĝa ĉeno, kies pezo deŝiris la butontruon de la blanka vesto.

Koncerne la kempatindan negreton, se vi volas lian portreton, turnu vin al tombejo. Tie en la liniitaj vicoj de tomboj, post vitronebulo vi vidos eluzitajn fotografaĵojn: serĉu unu el okjaraj knaboj, ridindaj kaj malgajaj, vestitaj per paperaj pantalonoj kaj ridindaj ĉapo; fortiru de ili tiujn blondajn buklojn kaj vaksajn vizaĝojn, kaj ilin anstataŭu per nigra vizaĝo. Lia vestaĵo estis tiu de la knaboj de eduka malliberejo estrita de misiistoj, la botoj el mallibereja fabriko, kaj kun la antaŭaj randoj latunprotektitaj; la ĉapo, ĉapo kun ŝirmileto el eburo de hejma besto, ĉirkaŭita de dornabetaĵa amerika pajlo, subtenanta malgrandan kvaston, ŝajne seĝegelsiritan, kaj en tuteco, kvazaŭ monaĥa pureco, sankteja donaco, vestaĵo difinita por *indio* (hindo), grandaj kaj vivecaj brilantaj okuloj kaj blankegaj dentoj, kontrastantaj kun la nigreco de la vizaĝo brila, kiel vakstolo, kun lumoŝanĝaj koloroj. La brakoj estis longegaj; la aspekto, tiu de figuro fotografiita de iu esploristo, proksime de la lagoj de la mistera Afriko; la gestoj, el bone dresita simio, kaj la rido, estis movado de ĉarniroj de aŭtomata figuro; sed malgraŭ ĉio, la timo, kiun li havis al sia mastro, kaj la hundida boneco, kiun esprimis lia vizaĝo, altiris la simpatian kaj donis al li la ridindan belecon, la negativan belecon, kiu estas la kontrasto de la perfekta.

Negro kaj mastro, pakajoj kaj valizoj, eniris la vilaĝon sin direktantaj al parenfino de *don Juan*, kiu flarante la alvenintajn monerojn, iris akcepti lin vestita per festlaga vesto. La geinfanoj iris post la sekvantaro tra la stratoj, blankaj kiel cigna plumo. La urbestro kaj la sekretario montris al la riĉa amerikano, la vilaĝajn plibonigojn; tiu ĉi serĉis la amikojn, preskaŭ ĉiuj jam mortintaj aŭ enŝipiĝintaj por tiu Ameriko; la virinoj rigardadis tra la ĵaluzioj. La forĝisto forlasis la ambosen, la lignaŝto la rabotilon kaj la trogon la masonisto, por vidi tiun vilaĝan flon, kiu iom post iom dieŝetis plenmanon da moneroj sur la gruzon de la vojoj; sed precipe tiun negron, la negreto kiu alve-

nis kiel Amerika aĵo, personsimilaĵo, kiun oni nur vidis sur kromo, plena de plumoj kaj ringoj, sufiĉe lerta infana aŭ beeteta interaĵo, alkondukita malligita, kiu ridis, parolis, kaj nenium vundis. La maljunulinoj kredis, ke ĝi estas ia harezulo; la virinoj komparis lian nigrecon kun la blankeco de siaj gefiloj kaj kontentigis; la knaboj alproksimiĝis al li singardemaj, pasigis la manojn sur lian vizagon, rigardante ĉu li eble tinkturas; kelke da ili ŝutis lin per sablo; kaj li terurita kaj konfuzita, alkrōĉita al pantalono de la mastro, ĝin streĉis kaj malsadis tiel rapide kiel eble, por alveni mi ne scias kien, sed por foriri el tiu scivola ovacio.

Alveninte ĉe la parenicino, — *Mi ano, yo volorme, yo miedo blanco, yo agu! morirme* (mastro, mi foriri, mi timo blankulo, mi tie ĉi morti), — li diris ekploreganta, ellasante nigrajn larmojn, kaj ekĝemante el la fundo de sia koro per korpremana singulto, kaj li tremadis ĝis vespere.

La morgaŭan tagon la vizitoj komenciĝis. Kun la preteksto saluti *don Juan*, ili iris tien por vidi la negreton, kaj sinjorino *Carmeta* (Karmeno) devigita vidvino kaj konversaciama, havis vortojn kaj klarigojn por ĉiuj.

— Aŭskultu, *don Juan*, — diris najbarino; — ĉu vi de longe havas tiun ĉi negreton?

De kiam li estis dujara. Mi aĉetis lin en lotaĵo, kune kun lia patrino (nun jam mortinta) kaj ses negrojn pli. Li konis ĵal mi ducent piaŝtrojn. Bona negro. Malkara. Poste okazis la liberiĝo kaj oni perdis multe da mono, sed la infano apud mi fariĝis libera, kaj mi gardis lin.

Aj Dio mia! — diris alia — kiujn aĵojn produktas ja la mondo!

— Kaj aŭskultu: ĉu oni jam lernigas lin pri kateĥismo, Diordona-ro, kaj fari la krucosignon?

Ĝis hodiaŭ, mi ne havis liberan tempon, sed nun Karmeno zorgos pri lia instruado.

— La sklaveco, — diris la instruisto, — tiel propra de l' feŭdalisimo, enfalis kiel la tiraneco. La negro havas la homrajtojn, laŭ la sanktaj principoj, kiun la progreso proklamis per siaj gloraj almitiloj.

— Nu, mi ne kredis, — diris grasa sinjorino, — ke la negretoj ekzistas, ĝis la tago kiam, mi vidis unu sur la Rambla (1) kiun oni utiligis kiel anoncon.

— Diru, infano, kiel ĉi estas nomita?

(1) Rambla — Ĝeta Barcelona promenejo.

- Mi estas nomata Francesko.
- Aj Dio mia! Ili ĉion diras: eĉ la parolado ne mankas al ili.
- Kaj kion oni donas al li por manĝi?
- Aj, karulino mia! el ĉio li manĝas, kaj estas tiel malsatema, ke ni ja tian econ dezirus! Da la psidiofrukto, kiun *Juan* alportis el Ameriko, li englutas trarĉaĵojn, kiuj malsanigus vin.
- Atentu — respondis la instruisto, — la naturscienco klarigas tre bone, ke kelke da ili estas antropofagoj.
- Kion vi volas diri?
- Ke ili manĝas krudajn homojn.
- Aj, Nia Sinjoro kompatu min! — diris la grasa virino. — Kiu povus kredi, ke kun ĉi tiu naiva mieno, ili estu tiel sovaĝaj!
- koncerne tiun ĉi, sinjoro instruisto, — respondis sinjorino *Karmeno*, li ne estas kapabla malbone agi. Neniam vi vidis estaĵon pli senteman, ol li. Li timas *Juan* kvazaŭ estus lia patro kaj patrino, kaj kiam li vangofrapas lin, vi vidus ke li tremas kiel folio.
- Ĉu li batas lin?
- Li diras ke tio estas kutimo, kaj ke tiel ili fariĝas pli fortaj. Sed malgraŭ tio, li amas lin; li devigas lin dormi apud sia lito, kaj morgaŭ li ekkomencos la lernadon, ĉar li deziras ke li skribu, legu kaj konu la kvar aritmetikejn ĉefajn kalkulojn. —

La sekvantan tagon li iris al lernejo, kaj dum ĉi tiu tago neniu lernis. Ŝajnis kvazaŭ rato, lacerteto aŭ la diablo, estus enirinta en la kolegion. La skandalo estis terurega: ĉiuj surgenuje, ĉiuj per la brakoj krucetenditaj, ĉiuj vipfrape punitaj, sed kriantaj kvazaŭ hindo, malkvietigante la negron, ĉiuj elfetantaj panbulojn al la kompatinda estaĵo, kiu malgeja kaj embarasita kiel juna pasereto, staris proksime de la profesoro, kiu vane parolis pri la rasfrateco, egaleco de la homoj, kaj la rajtoj kaj konduto, de unuj kontraŭ la aliaj. Oni vidas ke la leĝoj de la libroj ne sufiĉe eniĝis en tiun lernejan angulon.

Ĝin forlasante, la skandalo rekomenciĝis denove: la sekvantan tagon ĝi estis iom malpli granda, kaj post ok tagoj, ili kutimis la negridan koloron, oni parolis kun li, ludis, kaj permesis ke li partoprenu en la ludadoj. Sed ĉiam estas kaj estis por ili, stranga ŝof: frato pro Dia deveno, sed el tiel malproksima frateco, ke oni eĉ forĝesis ĝin; gaja kamarado, sed fremdulo de la tero; knabo kaj samludama kiel ili, sed kun tiu nigra vualo, kiu disigis lin por ĉiam; vualo sufiĉe klara por permesi ke iom da simpatio trairu la maŝojn, sed sufiĉe densa por haltigi la samradikan naskiĝantan amikecon inter trataj kreskaĵoj.

Tute sola li sin trovis, tute sola, meza de tiu vilaĝo, kaj baldaŭ li komprenis, ke por ĉiam li vivus sola. Kiam li ne ekompanis la mastron, oni vidis lin sur la trotuaroj malsante murapogita, kvazaŭ hundo kiu timas pro ŝtonĵetado; la krioj konfuzigis lin, la amasego lin kapturnigis, kaj lin timigis la malriĉuloj; kaj nur tiu tiel blua maro, etendita kiel kurteno funde de la stratoj, gajigis lin. Ĉie li vidis tiun maron: ĝi alflankigis de unu al alia terrando, banis lian perditan vilaĝon li ne scias kie; ĝi apartenis al li, kiel al aliaj; ĝi estis ebenaĵo sen homoj, hundoj kaj infanoj; ebenaĵo, kiun li amis per tuta sia koro de negro.

Multafoje sin renversinte gajecplena, sur la marbordan sablejon, li alvenis al la domo sabloplena, kaj ricevis unu el la kutimaj batadoj; aliaĵaĵojn li plenplenigis la poŝojn por konkaj, kiujn oni forĵetis kiam li alvenis al hejmo; iam li ludis kun la ŝaŭmo, kiu kuris por lin atingi; kaj enamigita de tiu maro, kiu estis la sola kolego, li kreskadis apud ĝi, fordonante al ĝi la momentojn, kiujn li havis, kaj akceptante la karesojn de ĝiaj ondoj, kaj la alparoladon de la venteto, kiun li, siamaniere komprenis.

Iam alveninte domen, li trovis teruran renversion: *don Juan* trafita de apopleksia atako estis sternita sur lito, ne vidanta, senparola, kun duonmalfermita, kaj premdolora tordita buŝo. Ĉiuj laboradis kaj sin movis. Virinoj, najbarinoj, alvenintaj parencoj, iris de la alkovo al mangoĉambro, konfuziĝantaj kunpuŝiĝantaj unuj kun aliaj, konsultante receptojn kaj miksante medikamentojn. La kuracisto eniris post la krucsignfaristino (1), la vikario parolis kun la kuracisto, ĉiuj ordonis, ke oni silentu, dum la negreto, malhelpanta ĉie, kuntirita kaj kvieti kaŝis sin en angulon ne huragante krieti pro riproĉa timo aŭ bato, kaj tie li restis dum du tagoj.

Post du tagoj *don Juan* mortis, kaj la antaŭa movado, tiu skuado, ektimigo de virinoj sin movantaj kvazaŭ sciuroj, la receptkombinado kaj taŝetaj bruadoj, fariĝis miriga kvieteco. Senbrua paŝado, interparoleto, kaj duonmallumeco ekokupis la domon, kaj pro la konfuziga okazintaĵo, neniu zorgis pri la negro. La kompatinda, tremanta, timema kaj malsatanta, iris al kuirejo, prenis kion trovis, haj iris en doman angulon por ĝin manĝi.

Ankaŭ pro la konfuziĝo oni forgesis pri lia funebra vestaĵo, kaj kun blanka jako, striita kaj mallonga pantalono, krudledaj botetoj kaj *caprica* ĉapo, la negreto iris al enterigo.

(1) Virino, kiu pretendas kuraci farante nur krucsignojn sur la malsanuloj.

Ĝi estis tiel luksa ke malmultajn similajn oni estis vidinta en la vilaĝo: unue la mortinto, kiun kvar viroj alkondukis per siaj brakoj; la pastroj, malavare kantante, survestintaj la plej belajn nigrajn mantelojn; du vicoj da kandelegoj portataj de pagitaj viroj; kaj la bando ludante la enterigon de la viktimoj, la plej malgajan marŝon, kiun ili sukcesis lerni. Sekvis la akompanantoj konsistantaj el plej ĉefaj vilaĝpersonoj preziditaj de la kvanto da parenco, kiujn la piastra flarado burĝonigis. Autaŭe la instruisto, apotekisto, la anoj de la komitatoj, prezidantoj de la kazinoj, la urbaj konsilantaroj kun la malplimultoj, la junularo kaj la amerikanoj; poste la ĥoristoj de tagiĝaj muzikaĵoj *El Pensil* (poezia ĝardeno), *Los amigos de la Costa* (la amikoj de la marbordo); la kuracisto, akcizoficisto, noktgardistoj, paro da ĝendarmoj, markaporalo, leteristo, kaj la gesinjoraro, ĉiuj seriozmarŝantaj, la ĉi opaj grupoj, mienmalgajaj, kaj ĉiuj funebre vestitaj, escepte la kompatinda negreto, kiu funebrevestita depost naskiĝo, kaj portante sur sin la malgajecon, kiu klare desegniĝis sub la malklara blankeco, marŝadis disigita sur flanko de la vojo, kaj solulo sekvis post la sekvantaro kvazaŭ senmastra hundido, kiel erariĝinta simio, maskita kaj konfuzita, kiu ĉentrenanta sekvas la popolamasegon por foriri de la forlaso.

Ĝus kiam ili alvenis la tombejon, ili ronde sin lokis, la vikario preĝis Aveon, kelkaj adiaŭis premantaj la manon de tiu vico da parencoj starantaj apud la pordo laŭ malgajecon kaj heredaĵa ordigo, kaj tiuj, kiuj restis, vidis la malfermadon de la platŝtono de la pompeja tombo (albuma stilo), kaj enfermi la mortinton tien.

Tiam, kaj nur tiam, la negro konsciis pri kio okazas. Vidante la fermadon per la ŝtono, li komprenis ke li adiaŭis la solan estaĵon, kiun li amis, komprenis la solecon, autaŭsentis la alvenontan malplenaĵon, sin sentis surtera kunŝippeanto, kaj plorante alkroĉigita al ŝtona ringo: «Mastro mia — senespera kriis, — mi ne movi, mi resti kun mia mastro, mi ami lin.» Kaj oni elŝiris lin, kvazaŭ oni elŝirus la radikojn de terenradikinta maljuna cipreso.

— La negroj estas tre fllelaj, — diris la instruisto.

— En la vojaĝoj al Afriko aŭ tra la mondo, mi legis pri tio strangaj kaj rimarkindajn okazintaĵojn, — li radiris, dum ĉiuj viciris, mirigitaj pri tio, kion oni nomis fideleco de la negretoj.

La «mi amo» (mastro mia) aŭ li distriĝis testamenti, aŭ testamente forgesis la negreton. La afero estas ke li nur heredis liberecon kaj la indienan vestaĵon, kiun li survestis dum la enterigo. Por la parencoj, la domoj, rentoj, vinberkampoj, kamparaj domoj, kaj por-

la negro la *terrenos a l'Habara* (tenic), t. e. la rajto de la mizero aŭ morti, se li preferis pli morti.

Sinjorino Karmeno, kiu el la distribuo ricevis fasketon de fervojaj obligacioj, pensis que ŝi havis nenian devigejon, kaj decidis iri Barcelonon por tie morti, kiam alvenos por ŝi la difinita horo; sed antaŭe, ŝi deziris senigi sin je skrupulo, kiun ŝi havis de longe. Ŝi sciis que la negro, pro mallaboremeco de *Juan*, li estu en la ĉielo, ne estis baptita.

Oni nomis lin Francesko same kiel oni povus esti nominta lin Santiago, Dominiko aŭ alia nomo de negreto, sed ne aliris al la baptopiloj, kaj ŝi ne deziris forlasi la kompatindan estaĵon, antaŭ ol solvi la aferon.

Tuj kiam la parĥestro sciis tion, li plezurigis kaj ĉiuj partoprenis. La sinjorincj de la religiaj kunvenoj, decidis donaci vestaĵon el nigra drapo; la preĝeja konsilantaro, ornami la ĉefaltaron kaj pagi unu el plej famaj predikistoj; la Mariflinoj, farus paperajn florojn; oni konsentis pri tio, ke *don Jaime* (Santiago) estus la baptopatro, bona viro, kiu, ĉar li havis bonegan ordenon, akceptis tiujn okazintaĵajn oficojn por ornami sin per la insignoj; kaj eĉ la orgeno, por gajigi la feston, ludus la plej paŝtistan verkitan muzikaĵon.

Kiam li alvenis, la preĝejo estis plena, kaj neniam la negro estis tiel zorgita, trokaresita, haj dorlotita de la virinoj. Oni vestis lin per la nigra vesto, nigraj botetoj, nigra kravato, ĉio nigra, kaj oni ne frizis lin, ĉar li estis jam sufiĉe tia. Proksime de la baptopilo, la baptopatro nomis lin Santiago, la instruisto Agusteno, kaj la parĥestro, Buena-ventura; kaj surversante la akvon sur tiun kapon, sur tiun densaĵon, kvazaŭ harego eliranta el kuseno de malnova tartano (1), kaj vidante la negron klinigitan, multaj virinoj ploris.

La prediko de la misiisto rememorigis la virinon, kiu devas aĉeti kronon el la skatolo de la amatoj geedzoj. Ŝajnis kvazaŭ elirita el perfekta misiisto, fako de la konvertigoj. Li parolis pri la Afrikaj dezertoj, misioj de Ĥinuĵo, Vasco de Gama, Hernán Cortés (Kortés) kaj Colón (Kolomb); parolis pri sklaveco, apostoloj, kaj konvertitaj herezuloj; li faris multe da latinaj citaĵoj, kaj per granda deklama voĉo diris pli, ol li deziris, ĉar la vortoj alvenis al li antaŭ ol la ideoj, kaj li devis ilin buŝeltiri per periodoj de superega vasteco. Neniu komprenis kion li diris, nek eĉ la instruisto, kiu estis *liberpensulo*, kiu legis Demostenes'on kaj la famkonatajn klasikulojn; sed la virinoj korprenigis, kaj kelkaj viroj certigis, ke li havas fluanparoladon, kaj profundajn konadojn.

(1) Tartano = veturilo durad, kun arka tegmento.

Koncerne la negreton, nur vage li konsciis, ke tio estas difinita por li. Li sentis ke denove estis kurioza la okazintaĵo, li sciis ke li kunportas interne novan nomon; kaj tial ke li leviĝis je la kvina matene, dolĉega dormo ekkaptis lin, kaj li ekdormiĝis en la plej ĉefa momento de la ceremonio.

Tuj kiam li estis baptita, neniu atentis jam pri li. Li estis libera, povis agi kiel li deziris, sciis legi kaj skribi, estis ĉirkaŭe dektrijara, kaj nomita *Jaime* (Santiago). Sinjorino Karmeno do, foriris kun malpeza kaj trankvila konscienco, permesante al la negro agi laŭvole.

Kion unue faris la publiko, estis ŝanĝi lian nomon. Ŝajnis kvazaŭ nenia nomo taŭgus por li, kaj oni ilin ŝanĝadis, kiel oni ŝanĝas de ĉemizo. La autaŭa *Pancho*, kaj la autaŭ ne longe *Santiago* fariĝis Santiago la nigra, kaj nun por ĉiam.

Kompatinda! Nomi lin *Miseroj* estus estinta pli deca ol *Jaume* ó *Jaumet* ó *Pancho* (Santiago) ĉar nigreco de malriĉeco devis nigriĝi baldaŭ lian vivon.

Dum li estis *negreto*, infanina, dolĉanima ludilo, kiu ŝparis aliajn por la filoj de amerikanoj, la malkara amuzaĵo okulmoviganta, krurpaŝiganta kaj neniam defektiganta, li estis akceptita ĉe la ĉefaj domoj; sed tuj kiam li fariĝis nur negro, kiu timigis la geinfanojn, kiam li voĉfortiĝis kaj plenkreskis, tiam neniu deziris jam lin apud si.

Pleje oni utilis lin por mendoj, oni devigis lin danci baleton de lando, kiun oni nomis lia lando, li devis ludi marŝon per dentkrakado, kaj kiel pago, oni donis al li mangrestaĵojn kaj vestojn de autaŭ longe pasinta modo. Unu tagon oni vidis lin kun jaketo, blanka vesto kaj kataluna ruĝa ĉapo; alifoj kun redingoto kaj kanabpiedvestoj; poste nur kun blua pantalonino kaj ĉemizo; kaj dum la festtagoj, kun la baptiteja vestaĵo, kiu fariĝis mallonga, perdis la brilon kaj iom post iom senlaniĝis kvazaŭ blatkonsumita besteto.

Ĉie li trovis plenlarĝe fermitaj la pordojn de la espero. Li estis juna, kaj la bela plenflora printempo, ekvekiĝis en lia animo; sed neniu fratilino deziris negron, kiu krom la nigreco estis malriĉa; li serĉis la amikecan konsolon, sed ĉie li trovis tiun rasan barilon, tiun funebran gazon, kiun li sentis en la lernejo, kiu densiĝis ju pli li viriĝis: sen amikoj, sen amoj, nek interrilatoj kun la similuloj, eĉ sen mastro. Unu tagon oni eĉ forigis lin el balo, dirante, ke tio estas Amerika kutimo.

Kompatinda libereco! Kiel malplena devis ja sonori tiu sankta vorto, en la orelo de la negro! Forlasita de ĉiuj; strata malliberulo,

kiel tiu poeto kiu povis eniri neniu domon; inkmakulo en tiu blanka skatolo, serĉis denove la teran rifuĝon en la maro, kaj fariĝis fiŝkaptisto.

Li bone agis, ĉar la malmultaj momentoj, kiujn li ĝuis dum sia vivo, al la maro li ilin ŝuldas, al tiu belega kurteno ĉiam sama kaj ĉiam ŝanĝita, rava unutona ĉefverko en siaj eternaj aliformiĝoj.

La barko estis la unua lulilo, kiu lin balancis; la akvaj bruetoj la unuaj kantoj, kiuj dormigis lin, lin lulanta; la ŝaumo kisanta la marbordon, la unuaj kisoj, kiujn li ricevis; la stelmantelo, la unua ŝirmilo de nekonata poezio; kaj meze de tiu senlimeco, plivastiĝis lia koro, li vivis la plenaeran vivon, kaj sin sentis homo kiel la aliaj.

La plenvivita kaj malfaldita velo, ŝajnis al li liaj flugiloj, lin alkondukantaj al nekonataj landoj; la ferdeko de la barko, senradika trairanta palaco, en tiu maldanka lando; kaj kiam li sin senvestigis, kaj nuda kiel Apolono, enakviĝis, naĝis, kaj supreniris la ondajn suprojn, tiam li ne estis la negro el aŭtaŭe, maskita, malriĉa kaj ridinda: li estis belega modelumita bronza statuo, la primitiva homo, energia kaj muskoluva aŭ Greka diaĵo eliranta el la manoj de Fidies.

Sed aj! en la maro ĉio ne estis maro! En la barko estis aŭkaŭ homoj, kaj blankaj homoj, kaj tiu ĉiama vualo, tiu rasa barilo, malsupreniris kiel fulmotondra nubo, prempatigante la plej malfortan. La ŝipestroj dungis lin nur kiam la braklaboristoj mankis, kaj kiel ili estis ĉiam nombraj, preskaŭ ĉiam li vagadis.

Tiam ne povante fiŝkapti kun la aliaj, por ne forlasi sian maron, li sola fiŝkaptis. Proksime de la rokoj li fiŝkaptis mitulojn, blankajn konkojn, akvaj ludiloj pli taŭgaj por beligi la marbordon, ol por perlabori sian vivon; kaj kiel li malsukcesis, same kiel multe da homoj sen rimedoj, sin donintaj al malespero, li ekebriĝis.

Tio estis la lasta folio de la libro. Nudpieda, senvesta, malpura pro forlaso kaj mizero, oni lin vidis eniri en drinkejojn, kaj eliri el ili balanciĝanta kvazaŭ ekŝippeanta barko, kiu jam perdis la direktilon, remilojn kaj velojn. Tiu ordama, ridema, hontema kaj malgaja negro, fariĝis terurega figuro: ĥinda idolo trenita sur la trotuaroj; arkitektura masko glazurita, kaperista ŝipo, ŝvitiganta gudron kaj muskon; funebre vestita koboldo; ĉio, escepte homa figuro. Foje, tremantaj kaj kuraĝemaj knaboj sekvis lin; kelkfoje dormanta sunbanita kvazaŭ li estus nigra vinberaro, tie haltis sur li la muŝoj, aliajnfojojn li kuris senespera kaj sin elfetis en la akvon, kaj aliajnfojojn li ploris.

Kompatinda Santiago Nigra! Efektive li pasigis la lastan folion de la libro. La lastan folion de nigra libro el malaperintaj literoj.

Dum ia ventega tago, oni trovis lin droninta apud la rokoj, kaj facile li estis identigita ĉar li estis la sola negro de la vilaĝo.

La kadavresploro, pruvis ke la negro estis drinkinte; sinjorino Karmeno sciigita pri tio, tuj tre saĝe diris. «Mi jam kredis ke li estas drinkulo. Kiam *Juan* mortis (li estu en ĉielo) ni trovis lin en la mangafejo. Fidu ja al negruloj kaj estu tro bonkoraj. Dio mia, se mi ne malproksimigas lin de mi!» La sinjoro de la ordeno diris ke li sin lavis la manojn pri tiu afero; la instruisto deziris fari la topografian karton de la rokoj aŭ loko de la okazintaĵo; multe da kuriozuloj iris vidi lin por scii, ĉu li ne fariĝis aliiĝita; sed kvankam tio, tio estas malgraŭ tio, ne unu estaĵo ĉeestis al lia enterigo.

Oni enterigis lin je pecetoj sub tera amaseto kie estis nenia ringo.

Se *don Juan*, kiu dormis proksime en la pompeja tombo (albuma stilo) estus dirinte al li «Rememoru ke ci estas libera» certe en tiu ĉi okazo, li estus estinta tute prava.

Fine, li estis tute libera.

La deveno de l' Arto

Carries' (Karries') la granda artisto kaj ceramikisto diras, ke li ĉiam kunportis en la poŝo, poton el tiu orlarmoplana ceramiko el metaligitaj rebriloj kaj koloraj spruĉetoj; el tiu belega ceramiko kiu al elementa formo aldonis japanajn nuancojn, la nebrilon kaj perditan verdecon de la Romaj moneroj, la atlasan malglatecon de la Tanagra'j figuroj, kaj la akriĝitan brilecon de la marbro de ruinoj; tiu ceramiko kies sekretojn li konis... kaj surportis en poŝo ĝin, nur pro la plezuro, kiun li sentis per la nebrila atlasa palpo de ĉarma nuanca rebrilo.

Ni pli bone aŭtaŭvidas la artiston pro tiu sentaĵo, ol per dek skademiaj paroladoj pri amo al Artoj, pri Beleco, Estetiko, kaj aliaj retorikaĵoj.

Kiu efektive ŝatas la Arton, tiu sentas ĝiajn delikatecojn; ne estas la materio, kiu lin allogas, nek la sceno, nek la transcendenco de la verko; ne estas la plastika scenejo, nek la reguldona skolo, nek la fizika laborado, nek la perspektivaj problemoj, nek la reliefa iluzio, nek tiu pompo por komplezi popolamasojn, kaj trompi ornamantajn kritikistojn; kiu reale ŝatas la arton same kiel Carries' ŝatis ĝin, tiu ŝatas ĝin, nur interrilatante kun ĝi.

La koloroj harmoniĝantaj kiel sur japana ŝtofo, nur ĉar ili harmo-

niigas; mura rebrilo sur blanka kurtenco, pro la delikataĵoj, kiun li enhavas kiam ĝi estas kisata de la lumo; Goya' fantaziita nebula impresigo, sencela, nur pro kunligo da observadoj; Verones'a fono, pro la nuancaj gradigoj; isj kolorvitraj fenestregoj, pro la heleco, kiujn ili disigas kaj poezio, kiujn ili enhavas; estas por tiuj, kiuj sentas la Arton, okulfrandaĵo kaj agorditaj sentaĵoj, kiuj enamigas sian animon. Linia ordumaĵo pro sia mistera allogo; la delikata desegnfarado de la primitivuloj, nur pro sia esprimo serĉanta la faldojn de l' spirito; la broditaj fligranoj de kapricema kreskaĝo nur pro sia silueto, sufiĉas por ravi intime la amantojn de la formo. La nuanca rebrilo de objekto, floro, antikva bronzaĵo, luksa fasado aŭ greka monero, de bizanca juvelo aŭ de gotika eburo, distilas jam sufiĉe da beleco por tiuj, kiuj ŝcias ĝin ĝui, same kiel la sonorilsono, du harmoniigantaj notoj, nekta kanto aŭ arbarbruo, ne bezonas orkestron por tiuj, kiuj komprenas la unuafuktojn de la Artoj, la unuan semon, la kanton de la fonto kie ili naskiĝas, kaj la unusjn ekĝemojn, kiujn ili ĵetas per sia mistera lingvo.

La orkestro, la teatro, grandaj pentraĵoj, la temoj de transcendaĵa fiereco, la poetiko kaj retoriko, ne estas la animo de l' Arto: ili estas la kostumo por ĝin vesti, kaj montri al la amasoj kaj al multaj krikitis-toj; al tiuj, kiuj ne komprenas ĝin nuda, kaj bezonas ornamaĵojn por trompi sian kompatindan animon, al kompatindaj fremduloj de la Beleclando, ĉar ĝi devas esti tradukita per pompaj formoj por ke ili sciu kiel ĝi parolas; al tiuj, kiuj pasigas la vivon vidante la staskvon de la Artoj, kaj ne priserĉas la fonton, kie la plej pura akvo elfluas.

Kiu ĉiuhore povus trinki tie! Revi aŭskultante ĝisjn kantaĵojn, kaj ekdormiĝi per ĝia brueto! Fari arton pro la konsolo, kiun ĝi provizas, kaj neniam lui la famon! Aŭskulti iom post iom, la gutojn el revema kantaĵo, kaj ne rakonti tiun at ditan kanton eĉ unu momenton, antaŭ la amasoj! Lerni parkere la strofojn, kiujn ĝi lernigas al ni, kaj al si mem ripeti ilin, dum la malgajaj horoj, kaj ne elfeti ilin al la publiko! Unu post la alia ilin noti sur la libro de la vivo, kaj meze de mallumeco preĝi ilin, nur per la lumo, kiujn ili radias, anstataŭ ilin traduki je pentraĵoj, libroj, aŭ simfonioj; ne ilin formvestantaj nek maskigantaj per versaĵoj, por ilin montri al la oscedemaj indiferentuloj, kiuj ne dankas kaj eĉ ilin ne komprenas!

La libro, kiun oni funde de l' penso formus, el la kolektitaj notoj, estus dolĉega libro ne makulika de ia ajn rigardo; la plej puraj folioj de malgranda intima libro, por preĝi ĉiuhore per ĝi.

Multiprofita tago

Estas printempaj tagoj, kiam la homo leviĝas enamita.

La aero de floroj, kiun oni spiras, la ĥoro da ekvekiĝantaj birdoj, la ekpuŝigo de nova suko plurlanta la foliojn, kaj la spiro de la Naturo, diras al la homo kiu ekvekiĝas: «Rapidu, amu, serĉu la muskon por garni cian ŝirmejon; kuniĝu kun la vekigantaj birdoj, estu viro kaj ebriiĝu, rigardu la okulojn, kiuj cin atendas, la tremantajn por malfermiĝi lipburĝonojn, kaj la blondan printempon kiu pretigas por ci verdecan baldakenon, por ombrigi ciajn revojn.»

Kaj la homo respondas al la aero, floroj, kaj Naturo: «Hodiaŭ estas ja, kiam mi sentas ke miajflugiloj moviĝas, mi sentas min troa, kaj homo papilia. Se hodiaŭ mi ne amas, mi estos simplanimulo. Hodiaŭ mi eliros kun pajlero en la beko; hodiaŭ mi nestkonstruos eĉ sub kolonsulko; mi plenvive amos, ĉar mi ne devas pasigi tiun ĉi tagon antaŭ ol skui de mi, tiun ĉi printempan malsanon. Hodiaŭ estas la tago kiam mi ne gardos plu la koron. Ĝi tuj apartenos al virino, kiu ĝin deziras. Ŝi nur palpebrumu, mi ĵetos ĝin sur la jupon, kaj kiu ĝin kaptos, tiu faru el ĝi kion ŝi volos.»

Sed bedaŭrinde okazas, ke en tiu tago li estas terurege okupata la tutan matenon. Li devas enspezi tri fakturojn, subskribi devigskribaĵon kaj paroli al prkuristo, pro antaŭ fiksita rendevuo je la dekunua. Li devas tagmanĝi rapidege, ĉar li devas iri al la borso, kie la Nordakcioj perdis sennombrajn meridianojn, kaj ankaŭ la Cubas' (Kubas') akcioj ekkomenciĝis malplikarigi, kaj nur restas por li, la posttagmezo de tiu printempa tago.

Sed, mil fulmoj! Kion fari, se li devas altranĉi pli da kuponoj, ol florojn burĝonas la branĉoj, li devas skribi du dekduojn de leteroj al eksterlandaj korespondantoj, forsendi luanton, kiu ne volas pagi, kaj viziti juĝiston por rekomendi al li proceson! Pro tio alvenis jam la horo de la vespermanĝo, kaj li havas nur duonon da horo por donacian koron, kaj ĝui tiun tagon.

Por profiti ĝin ankoraŭ pli, li devas bicikletrajdi, kaj efektive, li alvenas tre laca.

Li vespermanĝas.

Kaj vespere, meze de siaj kamaradoj, oni nur malbone parolas pri amo, virinoj, diboĉa juneco, kaj pri la disreviĝoj de la vivo.

Dankemeco

Mi tramveturis, kaj autat mi, mezaĝa vivo, legis ĵurnalon.

Per la ĵurnala titolo, per la rapida rigardo, laŭ kiu oni konas la liniojn, kiuj icmete suferigis nin, mi vidis ke la artikolo kiun li legas estis verkita de mi.

Li plezure legis ĝin, afable ridetis, ĉesigis la legadon, kaj laŭ la miena esprimo, mi konis la liniojn, kiujn li legis, ĝis kiam alveninte al la subskribo, li donis ĝin al iu el siaj amikoj rekomendante ke li legu ĝin.

Ĝuste en tiu momento la tramrevizoro petis de li la bileton, kaj li... estis perdinta ĝin.

— Atentu, — li diris; — mi ne scias kial..... mi ne devigas vin denove pagi.

— Kaj kial? — mi diris al li — Ĉu vi ne komprenas ke li perdis ĝin? Ĉu vi ne vidas ke vi diras grandan insultaĵon? Ĉu tiu sinjoro havas malbonpagemulan vizaĝon?

— Bone: sed vi..... kial vi enmiksigas, — estis dironta la revizoro. Certe: kial mi devis enmiksigi?

Kiamaniere mi povis klarigi al li, ke mi estus ĉirkaŭpremanta la senharaĵon de tiu simpatia sinjoro, ke mi estus pruntanta al li monon, kaj lin gastiganta, eĉ ne vidante lian identecan karton? Kiel mi povis klarigi al li, kiom malmultaj estas la sukerpecetoj, kiuj enfalas en la inkon? Kion scias la revizoroj pri la malgrandaĵoj de la animo!

Kiel simpatia estis, ja la vizaĝo de tiu viro!

Interna heleco

Sendube ekzistas heleco, kiu ne devenas el la Suno nek el la Luno; ĝi ne estas el flamagebla materio, nek el rebrilo, nek eĉ la heleco de la stelaro: ĝi estas interndevena heleco.

Estas iaj momentoj dum la vivo, iaj mallongaj kaj revemaj momentoj, kiam eĉ se estas nakte, eĉ se ĉirkaŭas nin la plej plena mallumeco, tiam oni vidas tiun ĉi helecon. Ĝi enhavas glorklaron, esperajn

rebrilojn, idealajn blindigojn, ĝi formas rezaŭreolon, kaj oni ne konas ĝian devenon.

En la mallongaj momentoj dum kiuj ĝi iluminas, ĉion oni vidas lumoŝanĝa, ĉio kantas kaj vibras, kaj ĉio montras belecon.

El kie devenas tiu ĉi lumo?

Eble el la animo, eble ni ĝin kunportas interne duone malflamiĝanta kaj velkanta, eble ĝi estas la lasta lanternego, kiu gvidos niajn paŝojn tra la vojoj de la alia vivo.

Kiel malofte ĝi ja ekbruliĝas!

Kiel ĝi fortigas kaj revivigas, kiam iomete ĝi lumigas! Kiel ja rapide estingiĝas!

Kiel malluma estus sen tiuj ĉi fajrejoj, la mondo!

La blua korto

Pardonu: ĉu vi malkonsentus al mi pentri tiun ĉi korton?

— Aj, ne sinjoro: tute ne,—respondis al mi virino kvardekjara, alta, funebre vestita, kaj kun afabla mieno.—Sed mi ne scias, kion vi povos pentri. Ĝi estas malgranda kaj malzorgita, ĉar nur mi, kaj kompatinda malsana fratino loĝas tie ĉi, kaj mi havas tempon por nenio.

— Mi nur deziras pentri la florojn.

— Aj, vi pentru, vi pentru. Se vi estus ĝin vidinta la lastan jaron, kiam ni ĉiuj boufartis, kaj mia edzo (li estu en ĉielo) vivis, tiam certe plezurigis, vidi ĝin. La liano rampis ĝis la teraseto, kaj ĉi tie, ĉiam estis ombro. Sed nun ajl mankas al ni gajeco, kaj la kreskaĵoj same kiel la personoj, deziras, ke oni zorgu pri ili. De kiam mia malgranda fratino estas malsana, la floroj ŝajnas tion kompreni.

El la strato, mi estis vidinta tiun korton, ian helan truon en la fundo, lumajn kinturojn, stalan (1) helecon, la murojn blujajn, el tiu akra bluo, tute blukolora kaj sen duonnuancoj, el dubevio-kolora ultramaro, hontiganta eĉ la marbordajn ĉielon; puton ankaŭ bluan, bluan ŝtuparon, kaj antaŭ tiu bluaĵo, vicon da terpotoj, blankajn kiurpotojn, kestojn kaj vazflorojn, montrantajn kvantegon da floroj. Estis tie ruĝaj malvoj flanke de ruĝaj diantoj, malkombante sin kaj falante kvazaŭ kolorigita kaskado; senmakulaj blankaj lilioj proksi-

(1) La verkisto diras *pessebre*, kies kataluna signifo estas, kaverno kie naskiĝis la Savinto de la mondo, per kiu oni ornamas ĉambron kaj, kiun oni lumigas dum la kristnaskaj tagoj.

maj de malgrandaj trikoloretoj kun duonmalfermitaj okuloj kaj marlstaj barboj; grandaj verdaj hortensioj celante atingi la rozkolorigon, kaj granda liano makulante per oraj punktetoj la ombron de la brikoj.

Alproksimiĝinte mi vidis, ke efektive la kreskaĵoj estas malzorgitaj; ili soifas kaj estas varmaj, la folioj velkis, kaj la floroj senkoloriĝis: ili malgajiĝas; ili sopiris la dorlotantan manon, ĝia vizaĝo elmontris la forlason, kaj la plej akrasentaj, kiel la lilioj kaj la junkviloj, senkuraĝaj klinis la kolojn kaj ŝajnis kvazaŭ ili suferadus; sed tio faris ke, kion ili perdis el aroganteco, tion ili gajnis el simpatio.

Prenante seĝon, kiun proponis al mi la bona virino, mi komencis batali kontraŭ la senartifkeco kaj la pentraĵo. Mi refrotis la kolorojn sur la tolpentraĵon, forigis kaj desegnis, kaj ĉion mi reforigis por ĝin komenci de la kapo ĝis la piedoj, per la febro de nova pentraĵo; kaj la poststaranta virino ŝajnis interesiĝi multe pri mia managado, kaj dume paroladis al mi jene:

—Ĉu vi komprenas, mia edzo estis murpentristo, kaj mi jam scias, kio estas la pentrarto. Por pentri kurtenojn sur la salonaj muroj kaj anĝeletojn sur la alkojoj, por imiti la marmoron kaj la lignojn, neniu tiel lerta kiel li. Li havis plej taŭgajn manojn. Aj, Dio mia, se vi estus vidinta lin laborantan. Antaŭ ol diri vorton, li estis jam fininta la laboron. Sed kompatinda, li mortis, kaj nun mi havas la fratinton, kiu ankoraŭ laŭ diras la kuracistoj, estas mortonta baldaŭ.

Aŭdinte tion, mi rimarkis ke ŝi atente rigardas fermitan balkonon, staranta en la korto. Mi laborpriokupita, respondis unusilabaja vortojn; kaj tial ke ŝi kredis malhelpi min:—Bone do,—ŝi diris;—mi surprizos. Vi mem: agu kiel vi intencos, kvazaŭ vi estus en via hejmo.

Mi pentris ankoraŭ dum momento. La suno forkuris, rampante bluaĵonsupren; kaj mi ekpretiĝis haltigi la pentradon, kiam post la fenestraj kovriloj de la balkono, kiun rigardis tiu virino, mi vidas vizaĝon de teruriganta flaveco: du grandajn kaj malplenajn okulojn enigite en kadavreca frunto, kiuj vitralnajlitaj dolore rigardadis. Ŝi similis al juna kaj tute malsana fraŭlino; mortintino post la ĉerka vitro; unu el tiuj frostremigaj vizioj. Ŝi preskaŭ estis la impreso de vaksfiguro mortanta en vitrita ŝranko; impreso, kiu dum la nokto sonĝigas ion similan.

* * *

La sekvantan tagon, alveninte je la sama horo por daŭrigi mian pentraĵon, mi trovis la malsanulinon, sidanta antaŭ la floroj de la fundo.

Interne de tiu helecbano kaj malgraseco, ŝi ŝajnis malpli fantoma al mi, ol la antaŭan tagon, pli virina, kun pli da belaj trajtoj. La okuloj estis blukoloraj kiel la korto, kaj ŝajnis enhavi interne, estingigitan gejecon kaj naskiĝantan malgejecon per tiom da juneco ili brilis, kaj kelkfoje vualigis per tiel profunda melankolio, ke oni ne povis rigardi ilin. Ili estis la spegulo de juna koro, fotografiantaj unu post la alia la sennubaĵojn kaj nebulojn, kiuj trairis interne de penso. Malsana violkolora aŭreolo ilin ĉirkaŭis, kaj ili fariĝis kvazaŭ du subirantaj sunoj, ĉirkaŭitaj per gazoj de sunkuŝiĝo. Kelkfoje ŝi ŝimilis infaninon, kaj aliaj maljunulinon, sed ŝi devis esti ĉirkaŭ deksesjara. Kompatinda floro! Nur burĝono kaj jam senfoliiganta!

— Aŭskultu, — ŝi diris al mi, per estingita voĉo, — ĉu mi malhelpas vin?

— Tute ne, mia kara.

— Mi tion diras, ĉar se mi malhelpas por ke vi vidu la perspektivon, mi foriros.

— Ne moviĝu: estas mi, kiu unue forirus —

Ŝi ne moviĝis, kompatindulino; ŝi ne eĉ unu momenton moviĝis, nur kiam ŝi tuis. Ŝi ne moviĝis dum la suno banis ŝin, karesante ŝiajn manojn, kisante ŝian vizaĝon, plenigante ŝin per oraj kisoj, kronante ŝin per rebrilaj rondaĵoj, amindumante la malvarmecon de tiu estingita korpo.

Mi ne povis pentri: ne vidis la pentraĵon, mi nur ŝin vidis. Senmova, kuntirita kaj trema, la floroj, la aliaj floroj ŝajnis kvazaŭ ili rigardus ŝin, kaj ĉio rigardis la figuron, kaj ĉio malaperis, kaj ŝi estis la tuta pentraĵo. La cetero estis aŭreolo, fono, blua ĉielaĵo. La velkintaj kreskaĵoj, la pentritaj muroj, la liana ombro, la sunaj rondaĵoj, ĉio malaperis, difuziĝis, ĉirkaŭante tiun tiel malgajan noton, tiun grandan floron, pli belan kaj velkintan ol la aliaj, klinante la kolon kiel la lilioj.

Parkere, kvazaŭ aldonante alian floron sur la pentraĵo, mi komencis ŝian portreton sen tio ke ŝi atentu pri tio, kaj estas neeble priskribi la miksaĵon de malĝojoj kaj egoismo de pentristo, per kiuj oni serĉas ĉiujn suferadajn faldaĵojn, la alproksimiĝantajn mortpostsigaĵojn, kaj la malaperintajn kolorojn, kiam oni sin trovas antaŭ modelo. El tiu teruriganta flaveco, oni vidas nur la delikatecojn de la malbrilo; el tiuj malsanaj vejnoj, la violkolorajn duonnuancojn fariĝantaj delikataj koloroj; el la doloro, la eksteren elirantan formon, kaj la esprimon de la korpremoj de la animo. Ekpentrate, pro senkonscia krueleco, la kompatinda malsanulino estis nur figuro, io el makabra beleco, la morta senartifikaĵo perfektege bela.

Post momento, ŝi turnis sin kaj ridetis kvazaŭ dirante, ke ŝi jam atentis ke mi faras ŝian portreton; sed ĉiam senmova konsentante la daŭrigon de mia laborado. Poste, kun granda peno ŝi leviĝis, alproksimiĝis al la pentraĵo kaj rigardante ĝin iomete, ŝi diris al mi:

— Dio mia! Ĉu tiel flava, ĉu mi estas tiel malsana?

— Ne fraŭlino: ĝi estas nur skizo; ĝi nur... —

Kaj ŝi supreniris.

Tuj kiam ŝi estis post la balkono, kredante ke mi ne observas ŝin, mi vidis, ke ŝi prenas speguleton sur kiu ŝi rigardadis sin; ŝajnis al mi ke ŝi ektimas, kaj ŝi lasis sin fali sur seĝego, alnajlinte la okulojn sur la vitroj.

*
*
*

Se vi estus konante min antaŭ tri monatoj! — Ŝi diris la sekvantan tagon je la sama horo. — Nun mi povas tion diri al vi: tiam, jes vi estus povinte fari tre belan portreton. Tiel gaja, tiel ridema, kiel mi estis! Ĉio ridigis min. Mia fratino ĉiumomente devis riproĉi min, sed senutile... La danco min ravis ĝis deliro. Atentu: ĉu vi vidas tiun ĉi jupon? Mi survestis min per ĝi dum la lasta vesperfestoj. Kiu ja povus tion kredi, ĉu ne? Ĝi estis la unua kiun mi ĉeestis, kaj mi dancis ĉiujn dancojn, ĉiujn: kaj ne pli, ĉar oni ne ludis plu. Oni diras ke tio min malsanigis, sed mi ne kredas ĝin. Mi akiris tiun ĉi tuson, ĉi tiun oni certigas estas afero ne grava; sed mi ne scias, mi ne scias, kion pensi pri tio. Foje mi kredas ke ĝi estos nenio; sed aliaj, mi tiel timas morti, ke eĉ mi ploras, kiam mi neniam ploris! Sed mi ne komprenas, kial mi sciigas vin pri tiuj ĉi aferoj.

— Estu kuraĝa, ĉar vi resaniĝos baldaŭ.

— Ĉu vi estas kuracisto?

— Ĉu vi ne vidas ke mi estas pentristo?

— Mi tion vidas: ŝerco mi ĝin diris. Kiel mi ŝatas la pentrarton! Atentu, se mi estus pentristo, ĉiam mi pentrus gajajn aferojn: ombriĝitajn arbarojn, videjojn, novajn konstruaĵojn, virinojn belajn kaj bone kostumitajn, kaj, kion mi ja scias? aferojn kiuj estus gajaj. Ĉu vi deziras ke mi iru sidiĝi?

— Kiel vi deziros. Mi estas okupota pentrante florojn, por multe da tagoj.

— Kompatindaj floroj! — Ŝi diris, trapasigante sian manon sur iliajn supraĵojn, kvazaŭ ŝi karesus ilin, kaj irante sidiĝi sur sia sidloko.

— Ĉu vi vidas: ŝajnas al mi, ke hodiaŭ mi fartas pli bone. Kaj eĉ mi dancus, — ŝi diris al mi per rido el sendifina malgajeco.

Kompatinda knabino! Iom poste kiam ŝi sidis, ŝi tuis per tiu tuso eliranta el fundo de sia internaĵo, tuso, kiu eliris ŝian vivon, lasante trankvilan ŝian animon. Kompatindulino! Mi vidis ŝiajn du unuajn larmojn rulantajn sur la flavkoloraj vangoj, kaj spireganta kaj kapklinita ŝi fariĝis revema. Kion ŝi pensis? Eble ŝi ne pensis aŭ vage pensis, kaj nenio pli maldolĉa ol tiuj ĉi malgajecoj faritaj el nebulaj revoj, el duboj, el strangaj antaŭsentoj; tiuj ĉi sennomaj malgajecoj, kiuj estas kiel longa nubajo kiu trairas antaŭ la animaj helecioj, kaj forlasas la koron meze de nebulaĵoj; kiuj estas sunsubiroj de la vivo, eknoktiĝoj, kaj sopiradoj pri nekŝnataj aferoj. Morti: morti estante nur deksepjara, kaj scii ke oni mortas, kiam malfermiĝas en la plena larĝo, la fenestro plena de lumo kaj espero, kaj dirante al si mem: post unu monato, post ok tagoj, eble morgaŭ, ĉi devos diri adiaŭ, ne nur al ĉio, kion ĉi amas, sed ankaŭ al ĉio amota!

Kial mi komencis tiun pentraĵon?

Poste, ĝi estas mi kiu fariĝis pensema, rigardante ŝin kaj kun la penikoj senmovaj. Ŝajnis al mi, ke ŝi estas kvazaŭ sablhorloĝo plena je sanggutoj. «Nun mankas kvin — mi pensis, — nun kvar, tri, du». Kaj alveninte al la lasta, mi diris al mi. «Nun elfalos el ŝia koro la lasta guto, kaj ŝi mortinta falos sur la florajn terpotojn».

— Kion vi pensas? — ŝi subite demandis, kvazaŭ ŝi legus funde de mia penso.

— Mi estas priokupata, ĉar la pentraĵo ne bone sukcesas.

— Ĉu mi ne restas senmova?

— Jes knabino: mi parolas pri la fono, pri tiu ĉi korta blukoloro. Ne maltrankviligu kaj ripozu.

— Mi jam sufiĉe ripozos baldaŭ! —

Por kuraĝigi ŝin, mi deziris fari ŝercon; sed vidante ŝian rezignacian kaj konvinkitan rigardon, la ŝerco fariĝis nodo en mia gorĝo, kaj mi min kaŝis per la pentraĵo.

*
*
*

La sekvantan tagon ŝi ne malsupreniris nek ankaŭ la postsekvantan. La postmorgaŭan, mi vidis ŝin post la fenestraj kovriloj. Ŝi ridetis kaj salutis min; alproksimiĝis al la vitroj, ŝi tuis, kaj ilin kovris per nebulo, kiun ŝi viŝis per senkarna mano, kaj ŝi malaperis.

Unu tagon eniris ŝia kuracisto, kaj tial ke mi konis lin, ni ekpar-

lis, dum el la ĉambro ŝi klopodis por vidi, ĉu ŝi malkovros signon, movon, kiu forigus ŝiajn dubojn. La kuracisto diris al mi ke ŝi ne vivos ok tagojn.

Mi ne malĉeestis tie eĉ unu tagon. Simpatia magneto alkondukis min tien, kaj mi utilis la pentraĵon kiel senkulpigon. Mi vidis trairantajn la amikinojn, la fratinojn, multfoje mi foriris vidinte nenium, kiam unu tagon ŝi malsupreniris, kvazaŭ dirante: « Mi alvenas por ke ci finu la pentraĵon ».

— Rapiĉu, faru mian portreton, — ŝi diris al mi.

— Ni jam havas sufiĉe da tempo, — mi kuraĝis respondi.

— Faru mian portreton, — ŝi respondis alirante sidiĝi sur sia kutima sidloko.

Neniam ŝi estis tiel gaja: ŝi nur pensis pri estontaj projektoj kaj fantazias okazontaĵoj. Kiam ŝi pli bonfartos, tiam ŝi sangas ĉiujn ĝardenajn florojn: ŝi tie enmetos rozojn kaj multe da diantoj. Neniuja liliojn, ĉar tuj kiam ili velkas, tiam ili ŝajnas malgajaj.

Ŝi mendus rozkoloran veston, saman ol tiu de ia amikino, kaj dum la ĉefesto, ŝi partoprenus ĉiujn balojn. Jes: ŝi denove dancus, ŝi deziris amziĝi kaj vivi, precipe vivi, ĉar ne estas prava afero, morti tiel frue. Eĉ ŝi deziris superverŝi la florojn, kaj la vidvino kaj mi, estis devigitaj fari ĝin. Akvensorbantaj, ili dankemaj reviviĝis kaj ŝi ilin rigardis tiel mistera, per tiel malklaraj okuloj, ke ŝia rigardo estis sekreta mondo plena de duboj kaj esperoj.

*
*

Ŝi ne malsupreniris jam plu.

— Ĉu vi deziras vidi ŝin? — diris iam al mi, ŝia maljuna fratino. — Ŝi mortas, sed, vi trovos ŝin levitan. —

Mi supreniris, kaj ŝi estis ĉirkaŭita de la amikinoj, ĉiuj junaj, gajaj, kaj helkolore vestitaj: printempaj floroj apud tombo, birdamaso proksima de kuntiriginta pasero, pasero kun falditajflugiloj, okuloj duonfermitaj, kaj agonio korbato.

— Ĉu vi jam finis la pentraĵon? — ankoraŭ ŝi diris al mi.

— Jes, ĝi estas finita.

— Nu, mi jam povas morti.

— Sed knabino, kial vi parolas tiel?

— Por ĉerci. Mi ja neniam fartis tiel bone, — ŝi diris, kaj ŝi ekdormiĝis.

*
* *

Ŝi ne vekigis plu.

La ĉerko blanka; la amikinoj blankvestitaj, tra blankaj stratoj, ĝi estis la enterigo de lilio. Per la floroj de la korto ni faris por ŝi kronon, kiun ni surmetis sur la katafalkon, kaj se mi estus kuraĝinta, mi estus almetinta tien, la pentraĵon.

Oni forportis de mi, fono kaj figuron, kaj de tiu blua korto, antaŭ ne longe tiel gaja, restis nur kvar eluzitaj muroj. Malgranda kiel ĝi estis, ĝi similis bluan skatolon malfermitan kaj difektitan, el kiu oni estus eltirinte la juvelojn: tono de Mario'a monatfesto, senornamigita kaj difektita de la vintra vento; malplena kaĝo. Ĉie regis kvieteco; supre, la liano pendis kvazaŭ sveninta; malsupre, la suno sen rebriloj; en la ĉambro, nigra burdo zumbanta post tiuj vitroj

Post multe da tempo, mi elmontris la pentraĵon, kaj oni diris al mi ke iaj parencoj demandis ĝian prezon.


Tio estis kuzoj, kaj mi iris viziti ilin. Kompatinda personaro! Eble ili deziris konservi ian memoraĵon de la kompatinda mortinta knabino!

— Vi vidis, — ili diris al mi; — la domo, kiun vi konas, estas vendota de ni, kaj kiel iaj Amerikaj amikoj, intencas aĉeti ĝin, ni deziris sendi tien la vidaĵon kiun vi faris (se ĝi estas malkareta), por ke ili vidu la bienon.

— Kaj la knabino?

— La knabino... la knabino estas superflua: forigu ĝin. —

SOMERAJ FOLIOJ



Fabrika de sanktulfiguroj

Tio ne estis fabriko de Barcelona antaŭurbo, ne: ĝi estis kiel tute prava mi diras, fabriko kun patentoj por la farado de sanktulfiguroj el ŝtonkartono, lignopasto, gipsopapero aŭ kio ajn alia, ĉar por tio ĉi ili havas patenton, kaj ĝi estas sekretoj de la metio.

Tio, kio antaŭ longe estis arto serioza, inspirita kaj mistika arto, prilaborita en revema malprecizeco, ricevanta gloran helecon; kio antaŭe bezonis la inspiran lumeton kaj la anĝelan rigardon, la rideton de virgulinoj, la ekstaton de la kredemuloj kaj eĉ la palmbranĉon de la martireco, hodiaŭ oni ĝin faras per privilegio, per turbino aŭ vapormaŝino, kaj per la sekreto de pasto.

Por fari allogantan figuraĵon, oni ne bezonas monaĥejon, nek la solecon de preĝejo: hodiaŭ la modelilo faras ĉion: ĝi modelas, lakas kaj atingas enamigantan brilon; hodiaŭ ni havas transkopiaĵojn por enĉarnigi la anĝelojn; por fari la violkolorigon, sufiĉas la anilino: la afero estas vendi malkare, fari la anĝelojn vicare, ilin numeri kiel soldatojn, ilin provizi je vestoj kiel kromoj, kaj konstrui ilin el ia substanco, kiu estante longedaŭra ne malutilu la monujan.

La afero estas eltrovi paston. Estas kiu komencas kapeton, kaj la pasto de tiu kapo, estas la patentita modelilo de tuta vivo de artisto; estas kiu pentras tri pajlejojn, kaj tiuj pajlejoj, envidigas tra longa vivado; kiu trovas tombon kaj ĝin aliformigas je Appia' vojo, kiu trovas arban modelilon, kaj faras per ĝi senliman promenejon; kiu, iam renkontas maŭron aŭ konatiĝas kun haremanino kaj ĝin montras, tra la mondo, dum oni barakeniras.

Tiu fabriko de sanktulfiguroj trovis la paston, kaj ĝin elprenis el korpremanta maniero.

Imagu al vi la figurojn, sanktulojn, virgulinojn kaj anĝelojn envicigitajn kvazaŭ rekrutoj: tie ĉi, vicaro da Sanktaj Jaimoj ĉiuj samaj, faritaj per sama modelilo, ĉiuj kun surskribeto; pli malproksime la samaj sanktuloj pli malgrandaj kaj kompreneble malpli karaj; la Sanktaj Jozefoj po dekduoj, la Sanktaj Virgulinoj liniaranĝitaj laŭ formatoj, kaj la krucifiksoj plafonpendantaj po vicare.

Pli malproksime, kaj en alia salono, oni fabrikadis iajn Sanktajn

Rokojn, kiuj estis la lasta mendo. Metitaj sur breto, viro pentris la genuojn, per peniko kaj potu entenante vundkoloron, kaj li faris nur tion, ĉar li estis ia specialisto; apud li, du aliaj viroj pentris la makuolojn de la hundo: per granda simetrio ili iris de unu al alia profitante la koloron de taseto, kiun li havis; knabinoj ĉirkaŭe dekjaraj pentris la kukurbajn boteletojn; aliaj pentris la apogbastonon, kaj la mastro rapidigis ilin, kaj korektis la vizaĝojn kopiitaj de la modelo, iu Sankta Roko funde enmetita, kvazaŭ li estas la kapitano de tiu vicaro da figurafoj.

Mi eliris el tiu fabriko deziranta ridi kaj kun bedaŭro. Tiu kartonpasto malkariganta la belecon, vulgariganta la legendon, enmetanta la idealon en modelilon, estas unu el plej malpleĝaj folioj de la vivo, kiujn mi legis. La kromo igas nin hindaj kaj baldaŭ la misaloj kaj kodoj, la horaj preĝolibroj, la meditigaj kaj la fidaj, estos ekribitaj per presrekopiigilo kaj transdesegnaĵoj plensaj.

Kiel povas esti modernistoj tiuj ĉi pastfabrikistoj!

Apud maro

Tio okazis apud la maro, dum la sunsubiro, kaj en soleca marbordo.

Plej malproksime, banitaj de la lastaj dubeflavaj sunradioj, oni vidis kvanton da purketoj enirantaj kaj elirantaj el akvo, sin rulante kaj kurante sur la sablo, kiel homŝerca flugado; en la dua antaŭaĵo, la ebenan kaj brilantan sablon, la akvon sternantan sur ĝin kaj la alvenantajn ondojn, ĉiam alvenantaj kaj kantantaj la kanton de la vespero.

Rekte al la maro, palpanta per la bastono la sablajn amasojn, kaj kun la kapo supren rigardanta, mi vidis alveni blindulon.

Li rekte parkere marŝis, gvidata de tiu akva kanto, kaj de la plaŭdobruoj de la ondoj, allogita de la plendo, kiun li aŭdis, delogita eble de ritma, de li aŭdita bruo; kaj pli gvidis lin la instinkto, la palpado de la blueco, kiun li ne vidis kaj la saleco de la aero, ol la neutilan bastonon, kiun li portis, kiel nuran akompananton kaj gvidilon, kapablan por koni la malmolaĵojn de la tero, sed ne, la senlimecon de la etenditaj konfuzajfoj.

Jus alveninte ĝis la rando de la ondoj, kaj atidante kiel ili glitas per delikatega murmuro, la blindulo haltis, enspiris la vesperan par-

fumon, plenigis la pulmojn de vivo, kaj restis iomete sendecida, ĝuante la kvietecon, kiu el ĉie ĉirkaŭis lin.

Kiam li konvinkigis, ke li estas sola antaŭ la senlimeco, havante antaŭ siaj malplenaj okuloj nur la estingita mallumeco, la ebenafon el difinita koloro, kaj la ĉielan kurtenon el ne konata formo, li sin eksenvestigis sen hontemo, sen duboj, serioze, kvazaŭ la tero estus blinda.

Li senigis al si la postlasaĵojn de malriĉulo, la ŝtofojn senkolorigitaj pro mizero, amasigitajn flikaĵojn plenajn je nigra polvo, okazajn vestaĵojn kudritajn sur alia vesto; kaj kiam li sin senvestigis kaj defalis de li la mizeraj pecetoj, tiam ekeliris el interne, kiel kverko meze de ruinoj, la formo de tuta viro, maljuna kaj angula, blankkapa kaj osta, kvazaŭ Memling' sanktfiguro, dubeflava kun altartablaj tonoj, sed belega kaj respektiginda, kiel sankta figuraĵo.

Staranta kaj nuda antaŭ la maro, kaj la suno origantan lian frunton, li tute similis figuron el ŝirita de la Biblio, legendan profeton sondantan interne de la fermitaj okuloj, la grandan misteran navon, aŭ maljunan Judujan araban izoligulon konsultantan la lingvaĵon de la ondoj.

Ĉiam kun la bastono kiel gvidilo li paŝadis marantaŭen, kaj kiam li eksentis la ondajn kontaktojn sur siaj genuoj, kiel enigman bapton solenigitan antaŭ la Naturo, li malsekigis sian maljunan kapon, per la mano, kaj haltis pensema.

Kion pensus tiu viro? Kion li pensus pri tiu maro, kiun li ne vidas, balanciganta sub liaj piedoj kaj debobenanta ondojn? Per kia mistero li ornamis tiujn kisojn flavkolorigitajn de la suno, kies subiron li sentis, malgraŭ ke li ne povis ĝin adiaŭi? Funden de sia penso, el kia koloro li devis vidi la verdecon de la ondoj, la blank-dubeviolajn koloroj, la dolĉegan flavecon de la sablo, la dubeviolkoloron de la stelbrilo, kaj la roz-kaj fajrokoloron de la marnebulo? Kio estis por li la profundaj ĉielkonfuzaĵoj, ĉio kio flugas kaj glitas, la nesondebleco de la akvo, kaj la granda Naturo, malproksimaj de lia bastono, kaj malaperintaj el lia rigardo?

Ĉiam palpanta, li surpaŝis marantaŭen, ĝis kiam li sentis la malvarman impreson de l'akvo proksime de siaj larĝaj ŝultroj; kaj ĉiu alvenanta ondo estis por li nova frosttremo, nova mistero nubafalveninta; ĝi estis nekonata aĵo alportanta sendifinajn bruojn, gutelfaloj de vojirantoj, kaekadoj venintaj el la malplenaĵo, arbaraj ekpuŝoj; ĝi estis la nokto kiu paŝis, kaj lin eljetis sur la marbordon.

Al la nigra nokto de la blindulo, iom post iom, kuniĝis la malvo-

kolora nokto de la tero. La suno subiris. La maro fariĝis el metala verdeco, erpita per delikata violkoloro; la ĉielbluo estingiĝadis per rozkoloroj preskaŭ tuŝante la ondojn kaj zafiraj bluaĵoj, etenditaj ĉirkaŭantaj la naskiĝantajn stelojn; tie en Oriento, la nuboj vaporiĝis, kaj trans la staranta akvo eklumis: tio estis la blanka lumo de la luno, kiu majeste supreniris.

Ĝi flama eliris el la maro, post la ŝultroj men de la blindulo, klare desegnante lin per silueto.

La antaŭa sankta figuraĵo, la biblia apero, la maljuna respektinda figuraĵo, estis konfuza ombro. La malvarma lunobano stompis la bruligan sunobanon; la ondoj triumfis puŝante sur la sablon, kompatindan, nudan kaj moviĝeman ostaron; kaj sidanta tie surtere, sin kovrante ree per la malriculvestaĵoj, per la plenpolva vestaĵo, per la kompatinda mizero flukita el postlasaĵoj, kiam la vizio malaperis, ree li similis forpelitan skorion, senvaloran forĵetaĵon de la ventegoj de la maro, teran ŝippeulon malakceptitan de la akvoj; kvankam ili skvadis la ĉiaman balanciĝon, kantante la eternan kanton, kovrante per nova nokto, la nokton de la blindulo.

Trairantaj birdoj

Veturante per vagonaro marbordoantaŭen, oni trairis pirejon, altan monton, kaj en tera plataĵo, oni vidis starantan Mason, kun du maŭraj turoj, gotikan pordegon, kaj fenestregon ornamitan per koloneto sub la celfendo.

Ne trairis ekspresa, poŝta eĉ duspeca vagonaro, kiam en tiu larĝa fenestro, oni ne vidas figuron de knabino sin kubutapoganta sur la kolonon per sopira sintenado, el sentimentala bildo, el itala romanca vinjeto; kun la kapo apogita sub la kapitelo, kun unu mano pendanta, kun la okuloj supren turnitaj, kaj sube iom da liano, kaj iom pli supre, iun neston de hirundoj.

Sia eksterĵo taŭgis por sia sintenado: nigraj okuloj ĉirkaŭitaj de romantika malvokoloro, longaj kaj etenditaj, kaj farantaj de malproksime, du grandajn ombromakulojn; la vizaĝo longa, la figuro ondolina kaj malgrasa, orienta serkuraĝiĝo, iom da samarianino kun mi ne scias kion de haremanino; nigraj haroj el lord-Byron' versaĵoj presitaj per litografio; aŭreolo de malgajeco, kiel kaperlista aro aŭ strofa kastelmastrino, kiu atendas sian trubaduran amanton, tuj kiam la

luno aperos; ĉio tio ĉi igis ŝin kvazaŭ legenda mistero observata en vagonaro, el antikva vizio, trairanta post la vitroj.

Tial ke la vagonaroj ne ĉesis pasi kaj ĉiuj ŝi vidis pasi, iu pasaĝero rimarkis ŝin: iam, li eble salutis ŝin, kaj ŝi ankaŭ lin. Aliaj tagoj li eble revidis kaj ree ŝin salutis, kaj denove li kredeble estis salutata de ŝi; kaj de tiam, ĉiam kiam li trairis, neniam li devis forgesi signofari al ŝi staranta en la sama fenestro, super la sama liano, sub tiu kapitelo, kaj apud la nesto de hirundoj.

Same kiel tiu ĉi, sendube iu alia pasaĝero kredeble vidis ŝin, kaj ankaŭ li trairis antaŭ ŝi per ekspresa aŭ poŝta vagonaro; same kiel ĉi tiuj, multe da aliaj ekmontris la kapon; kaj baldaŭ estis neniu pasaĝervagonaro, kiu ne kondukus pretendantojn, kiuj tuj kiam ili estis antaŭ la fenestro, ili sendis tien kison, aŭ trairantaj salutis.

Tiel multenombraj fine ili estis, ke rigardante vagonaron laŭlonge, oni vidis en la fenestretoj vicaron da manoj signofarantaj kaj sendantaj adiaŭojn; estis kiu veturis per la duspeca vagonaro por ne trairi tiel rapide kaj plidaŭrigi tiun vizion; kelkaj eĉ ŝvingis naztukon; kaj la knabino neniam malĉeestanta la intervidiĝojn, ĉiam en tiu fenestro apogita sur la kolono kaj kliniĝinta sur la liano; vidis, je fik-saj kaj precizaj horoj, trairi tiun flugadon de enamiĝintoj, tiujn okazajn pretendantojn, tiujn vicarejn da birdoj, kiuj sendis al ŝi adiaŭon kaj foriris per la rapideco de revaĵo, trans la montaron.

Kompatinda knabino! Ŝin vidi amindumata tiom da horoj dum la tago, kaj ŝi konis ne unu vorton, ne aŭdis vorton nek promeson de tiu juneca aro, kiu antaŭ-kaj malantaŭen trairis! Senti kiel foriras kaj glitas la juneco, forportita per tiuj ferserpentoj fumeljetantaj; rigardi la tutan sanktan tagon, tiun antaŭ si, flugantan nubon, forportantan esperojn, kaj neniam aŭskulti la muzikon de ama vorto! Posedi la tutan provincon enamiĝintan el malproksime, kaj ne scii kiel ili estas nomitaj, kiuj ili estas, nek kien ili iras!

«Se almenaŭ elreliĝus tiu terura maŝino! Se almenaŭ mi povus enlokiĝi en ĝi kaj foriri de tiu novspeca turmento! — Ŝi devis iam pensi. — Se almenaŭ ĝi ne marŝus tiel rapide!».

Sed, tute ne! La pasaĝeroj estis pli nombraj kaj ŝi plinombriĝis la salutojn; la hirundoj de la nesto, foriris kaj denove revenis; la liano krekadis, la jaroj pasis kaj la vagonaroj neniam ĉesis trairi, ĝis kiam la knabino aŭ laciĝis, trovis fianĉon, aŭ ne deziris sin montri plu, la afero estas ke la migrantaj pretendantoj ne vidis ŝin plu.

Unu tagon proksime de la domo okazis frekasa elfalo, kaj ĉiuj, kiuj vagonarveturis devis malsupreniri por ŝanĝi de vagonaro.

La unua ideo estis iri al la domo kaj demandi pri la knabino.

— Ŝi monahiniĝis, — diris virino.

— Cu ŝi monahino havante tiom da pretendantoj?

— Tiel nombraj kiel vi deziros. Sed ĉiuj estis migrantaj pretendantoj: neniam iu haltis.

— Vidu, hodiaŭ eble ŝi estus edziniĝante; sed la vagonaroj neniam elreliĝas ĝustatempe.

Bona personaro

La bruo de la tamburo kaj la krioj de la klaŭnoj nin altiris al la placo.

La placo estis malgranda kaj tute plena. La tabakvendejo kaj la apoteko, la ŝtupoj de la preĝejo kaj eĉ la baikonoj de nobleca domo, tute fermitaj la tutan jaron, elfluis kamparanojn, burĝojn, maljunulojn kaj infanojn, por vidi la reprezentadon; kiun kvar kompatindaj gimnastikistoj organizis, per granda reklamo.

Partoprenis en la trupo knabino ĉirkaŭ dudekjara, lentughava kaj malgrasa, el malheligita blankeco pro skuadoj de la plenaero; la haroj el tia blondeco ke ili similis flavan haregon de seka paniklo; la okuloj el bluo preskaŭ sen bluo, kaj ŝi tute, kiel kompatinda plenpolva floro deprenita el la norda ĝardenoj, kaj alveninta en tiu vilaĝo per mal-kara pakado; seka knabo elartigita kiel salika branĉeto ankaŭ blonda kaj malgrasa; kaj fine du viroj, kies rolo en tiu aro ŝajnis ia kontraŭ-senco: la klaŭno, kiu devis ridigi, havis tiel ĉagrenan vizaĝon, ke oni ne povis ĝin rigardi; kaj, kiu devis esti la herculeso kaj subteni la mastrumadon, tiu apenaŭ povis stari, kaj elporti la mizeron.

La klaŭno ekkomencis cirklordigante la ĉeestantojn, dirante kelkajn spritaĵojn, kaj eltiris ludilojn el la vastaj malfermitaj kaj mal-kudritaj poŝoj; kaj tial ke li gratis la perukon, kaj ĉar la publiko suspektis la kialon de la juko, tiu gracia spritaĵo venkis la ĉeestantaron, kaj li fariĝis mastro de iliaj volo.

Oni komencas. Dum li poŝserĉis, la malgrasa atleto eniris la arenon kaj salutante per pli da afableco ol edukiteco, atentul per salto se ne mortigebla sufiĉe danĝera, li supreniris sur la fiksan ferstangon, kaj briligis sian eksterfaĝon.

Ni devas tion nomi eksterfaĝo, por ne ofendi la metion; sed lia aspekto kavis multon da bartiro kaj iom da tenoro. Li ridetis per ia

baletistina rideto, sed konservante la esprimon de forta kaj nerva viro, kiu se li ne havas muskolaron, li ilin devus havi, ĉar la metio tion postulas. Se li ne havis ilin, la kompatinda viro, ne estas pro sparemo da gimnastikuloj, sed ĉar al li malsufiĉis la nutraj manĝaĵoj; kaj malgraŭ ke li komprenas ke la fortoj, kiujn li elmontris estas multe pli malgrasecaj fortoj, ol fortoj de korppotenco, malgraŭ tio, li faris ĉion eblan per sama indeco, kiel la fultrovastaj viroj. La vesto estis trikoto, kaj li klopadis por ke ĝi estu el palega rozkoloro, el tiu rozkoloro kiu imitas la personan haŭtkoloron, per kiu sin ornemas la kapitano Mania' (1) kaj tuta lia sekvanto; sed oni devas diri ke malgraŭ ke tiuj soldatoj havas la ruĝkolorcon sur la kruroj, tie ĉi okazis tute kontraŭa afero: la korpo kiu estis vinkolora, malsupreniris krurojn suben, ĝi serkoloriĝis kaj eĉ malaperiĝis apud la sandaloj, kiuj blankiĝis pro la aerpolvamato de ĉiuj vojiroj de la mondo.

Jam sur la fiksa ferstango, dum la klatno daŭrigis la ŝercon, li ekturnis kaj turnis sin tiamamere, ke nur malplena stomako, kiel la lia povas tion toleri; balanciĝanta li provis kelkajn ekvilibrojn, kiuj estis pli senfortecaj kapturigoj, ol memvolaj ezercadoj; li malsupreniris aŭ eble falis, pagante per la ĉiama saluto; li supreniris denove per sen-trankviligo de liberiĝinta sciuro; kaj pendanta de ferstango kun la kapo malsupre, per la dentoj, li kaptis la knabon, kaj la knabo kun ŝvelinta ventro, elartigitaj kruroj kaj per tiu vira rigardo, kiun la perdiĝintaj infanoj havas funde de la okuloj, streĉis la brakojn ĉien, kolektante la avelojn al li ĵetitajn de la kamparanoj, kvazaŭ li estus marmoto aŭ gurda simio.

Dume la klaŭno ne ĉesigis la ŝercojn, kaj la akrobato komencis alian ekzercon. Li sternis sin teren sur drapaĉon, kiun ni devas nomi tapiŝo, kaj kun la piedplandoj supren, tio estas, kun la kapo malsupre, li faris signalon, kaj la knabo supreniris, per subita salto, sur la plandojn, kiuj utilis kiel manoj, kaj per ili kiel maŝinaĵaro, li piedfrapis lin tiel forte, ke li estis ĵetita je branĉalteco, kvazaŭ li estus pilko.

Al tiu tiel malforta viro, malmankis krurforto por forĵeti tiun lontan malsanecan korpon, kiu supren kaj malsupreniris, rulis, kaj kuntiris kiel fasko da nervoj; tiu viro el tiel virinŝajna vizago, ne havis kompatan anguleton por la kompatinda knabo, kaj por perlabori al li la vivon, li difektis ĝin al li; la knabo pagis per rideto, per devigita rideto, per ĉagrena gesto ĉiun skuon, kiun li ricevis, kvazaŭ li havus

(1) Viro kostumita kiel Roma soldato, kiu antaŭiras en la procesioj de la sankta semajno kun kelkaj aliaj viroj kostumitaj ankaŭ kvazaŭ romsoldatoj.

rizorton, kiu kiam ĝi frapis sur liaj ostoj, movigis la fadenon de la lipoj, kaj ŝetigis kison al la publiko.

La klaŭno, kiu ne fesis ŝerci por amuzi kaj distri la afablan ŝes-tantaron, devis plenumi sian programan numeron, kaj tie ĉi mi haltus, ĉar estas neeble priskribi la strangejn gestojn, la ĥimerajn grimacojn, la fremdajn ridojn, la tordiĝon de la vizaĝo, korpo, kaj kruroj, kaj la kaptrapadojn kontraŭ la tero, platanoj, kamparanoj, kontraŭ si mem, kaj kontraŭ ĉio, kion li trovis, tiel ke li fine sukcesis ridigi tiujn bonajn personejn, taŭgantajn kiel *klera aŭdantaro*.

Li ja ridigis ilin. Tiuj vizaĝkurbigoj, kiuj kliŝitaj per instanteca fotografilo montrus grimacojn el superega malgajeco, kiel ja ridigis ilin. Tiuj nervkuntiriĝoj, kiuj similis al rida agonio, ĉiujn ja ridigis. Tiom ili ridigis, ke kiam li montris peton sub la vizaĝfaruno, la sulkoj ridis ankoraŭ, kaj ankaŭ la simplanimuloj kaj la tuta vilaĝo miris pri tio, ke povas ekzisti tiel amuzaj personoj, kiuj gajejplenas, almozpetas. Se li estus havinta maltrankviliĝojn li ni estus tiel ŝercema. Tio estis nur ŝerco, kaj estis preferinde foriri.

Ili jam foriras, kiam el la amaso eliris ekkrio, surpriza ekkrio el neatendita amuzaĵo.

— Vianda'! Vianda' alvenas! — Venu tie ĉi Vianda', kaj faru ion. —

Vianda' estis la feliĉegulo de la vilaĝo, la oficiala feliĉegulo; feliĉegulo grasa kaj fortika, malpura kaj kurbkrura kaj el malrekta rigardo, kiu alvenis malrapide, kun pantrancoja longa je duonmetro.

Ĉiuj apartiĝis por ke li paŝu, kaj starigis lin antaŭ la klaŭno.

Oni starigis lin antaŭ la klaŭno, kiu vidanta lin antaŭ si, kaj aŭdinte ke oni komparis sian ciganan ŝercon, kun la simplanimeco de la alia, certi li sentis ian profundan maldolĉecon enirantan en lian animon, ĉar li rigardis tiun amason da bonuloj per rigardo tiel penetra kaj reverna, ke eĉ la faruno de lia vizaĝo ruĝiĝis, kaj du malgajaj kaj malestimaj sulkoj montriĝis eĉ ĉiu lipkomisuro.

— Faru ion Vianda'! — ili kriadis.

— Faru ion!

— Diru ion.

— Kantu!

— Faru gimnastikon.

— Nu, Vianda'!

Kaj Vianda' ne scianta kio okazis, senpripenza, mira, kaj simplanima, komprenis pro propra spertado, ke tiuj viroj almozpetas, kaj li faligis sur la pleton, tiun grandan pantrancojaĵon.

Tio iniciatis eksplodon de ridoj kaj krioj.

— Kia spritaĵo! — diris ĉiuj tiuj bonaj personoj. — Li estas la feliĉegulo pli feliĉegula, kiun ni havas en la tuto vilaĝo!

Mizero malbrila

Kiu alvenis hodiaŭ?

(Tiun ĉi demandon faris junulo al alia junulo malpli juna, apud pordo de termala kuracejo, kies akvoj estis iomete termalaj, sufiĉe alkalozaj kaj iom bikarbonik-gasigitaj).

— Kiel ĉiam: kvar paralizitoj kaj kelkaj aliaj laŭ kutimo.

— Kaj ĉu ne iu knabino?

— Jes: unu ĉirkaŭ dudek-dujara, tre interesa; grandaj bluaj kaj malsanaj okuloj; malgaja sintenado kaj malfortika figuro, sed ne tro: kvazaŭ ia duonbonfarto. Ŝi alvenas kun sia patrino; sed ŝajnas al mi, ke la malsanulino, devas esti la knabino.

— Bone, do: mi iras trinki la *toma* (kvanto da akvtrinkado).

Termala banejo je numerigitaj ŝambroj, la korto plena de ekdormigintaj personoj, la promenejo ornamita per kvar akazioj, tra kiu ir-reiras la solaj kaj silentemaj banprenantoj kvazaŭ kalkulante la paŝojn, aŭ plenumante la religian promeson enui je precizaj horoj, faras al mi la saman efikon, kiel frenezulejo, sed el senmalicaj frenezuloj, kvietaj frenezuloj, kiuj konas sian malfortan flankon, kaj malproksimiĝas de la personoj, por nenion defekti.

Iri observi ĉu aliaj alvenas, jen estas la nura distro, kiun havas, tiuj kompatindaj akvtrinkuloj; rigardi ilin elsalti el veturilo aŭ vagonaro, kaj diri al ili per filozofia mieno: «Aj, vi jam sciigos pri la tede suferota!» tio estas la nura venĝo; taŭgelekti la vizaĝojn de la alvenintoj, la sola distro de tiuj gajeckankuloj, kondamnataj sin bani, ŝviti, promenigi la akvtrinkadon, esti promenigitaj kaj promeni.

Tiun tagon, la hazardo feliĉe helpis nin. Alveni en termalan kuracejon belvida knabino, estas same kiel pligrandigi la kvanton da sulfura sodo de la akvoj; revivigi la gajecon de tiuj korpoj plenaj de haŭtvundoj; estas konsola spruĉeto en tiu kvartalo da invalidoj. Ĝaron kiam alvenas belaj knabinoj en termalan kuracejon, la akvoj ofendiĝas kaj la banejo gajnas, ĉar grandaj okuloj resanigas multe pli, ol ĉiuj malsekaĵoj kaj naĝejoj, kaj la dolĉacoj de esprima rigardo, taŭgas multe pli por la kompatindaj malsanuloj, ol la tuta hidroterapio.

Oni povas tute prave diri, ke la alveninta knabino estas bela. Ŝi estis bela, kaj la plej stranga afero estas, ke malgraŭ ke ŝi multe tia estis, ŝi ne atentis tion, kaj ŝiaj okuloj, la maniero kiel ŝi sin vestas, kaj ŝia indeco enfermita en modesteca parfumo, ŝtelis la simpation de la kleraj, por legi koron de knabino.

Tiu griza robo, bone konfekciita, sed el absoluta senafekto, antaŭdiris elegantecon kaj mizeron, ĝi kaŝis falintan altrangon, kaj suspektigis pri ia historio.

Efektive, patrino kaj filino estas perdintaj sian bienon, kaj el la antaŭa bonhavo restis al ili ne unu meblo; el la rasa nobleco, la aristokrataj linioj de la malsana figuro. Per la kudrado kaj brodado, ili devis perlabori al si la vivon, kaj tiel malbone ili plenumis tion, kaj tiel kaŝitaj ili vivadis, ke por ebligi al si la akvokuracadon, kiun oni receptis ai ili, por aĉeti robon kaŝante iliajn suferadojn, por sin prezenti antaŭ la publiko ne per troa lukso nek tro mizeraj, ili difektis al si pli da sano, ol tiu gajnata per tiuj dek precizaj tagoj, dum kiuj ili povis medikamentiĝi.

Kiel la knabino estas bela, baldaŭ ekaperis pretendantoj el tiuj senokupaj kaj dolĉakvaj trinkuloj; vespere ŝi dancis, tage oni invitis ŝin; ĉiuhore ŝi ricevis amindumaĵojn kaj eĉ tri aŭ kvar kundancantoj, malkovris sian amon al ŝi. Kiel ŝi unufoje vivis nenion farante, ĉiutage eĉ ĉiuhore ŝejnis ke ŝi reviviĝas kaj naskiĝis al nova vivo; kiel neniam ŝi aŭdis flatajn vortojn, la unuaj, kiujn ŝi aŭdis ŝejnis al ŝi nekonata muziko, kiun ŝi ravita aŭskultis; kaj tiu belega florbutono, tiu distinginda floro, ĝis tiam blindigita pro modesteco, paroladis, resaniĝis kaj malfermiĝis kvazaŭ rozo.

De post sep tagoj ŝi trinkis el tiuj akvoj; sep tagoj, kaj mankas tri por foriri, kiam unu tagon, kiam oni invitis ŝin por fari ekskurson, la patrino bedaŭris ne tien iri, dirante ke la knabino ne fartis bone.

Ĉiuj interesiĝis, sed ili ne akceptis la kuraciston, kaj tio mirigis multe ĉiujn.

La sekvantan tagon frumatene kaj nenfon dirante al iu, ili forlasis tiujn akvojn, la tiea loĝantaro surpriziĝis, kaj komenciĝis la komentarioj.

— Laŭ mia opinio, ŝi estis fiera, — diris unu.

— Ŝi devas havi ian kaŝitan aferon, — aldonis alia.

— Tiuj modestaj knabinoj kutimas esti la plej malbonaj ekzistantaj aĵoj.

— Kiel povis agi ja, tiu ridinda patrino? — Ĉu vi scias kio estas? —

diris viro tre respektinda — Estas ke la protektanto revenigis ilin. Ne fidu al tiuj misteraj personoj.

Kompatinda knabino! Tiel simpla kiel estis ja la kaŭzo. La honto devigis ilin foriri! La honto pro la eluzitaj piedvestoj, kiuj eĉ ne daŭris dum la dek kondiĉitaj tagoj! La honto ne posedis aliajn, kaj montri la mizeron al ĉiuj, tiuj pretendantoj, kiuj estus turnintaj la dorson, aŭ estus proponintaj aĉeti al ŝi aliajn novajn.

Historio de du pordofrapiloj

Ni trakuris la Consuegra'n (1) urboruinojn.

La rivero estis detruinta la tutan vilaĝon.

Tio estis la kampo de la morto, nova Pompejo; sed Pompejo ankoraŭ varmeta, kun postsignoj de agonio.

Plafonoj falintaj sur aliaj plafonoj, brikmuoj renversitaj, pajlejoj sur tere, florpotoj kotplenaj, amasoj da gipsoruboj, kio estis antaŭe plenfloraj fruktogardenoj, difektitaj domoj, muroj larmplorantaj, kaj la tuta vilaĝo reserĉanta kvazaŭ granda nesto de formikoj kies kaverno oni detruis, kaj kiuj portante greneron, marŝas malorientitaj.

Tie ĉi pendis reliekvokesto, tie statueto, plimalproksime respektigita figuraĵo; apud la malordigita lito sanktakvujo kotplena; lulilo sur kesto; laŭrobranĉo sur amaso de balaaĵoj; ŝvelintaj portretoj de amataj personoj sur la horloĝoj; la jaraj fruktoj, la iloj de la laboro, ĉio, kion oni amas, kaj gardas per fervoro kaj volo en la mondo, ĉio hakita, disrompita, difektita; kaj tie sur la plej alta loko, sin subtenante ĉe la rando de fenestra kadro, kiu havis la ĉielon kiel fono, palmbranĉo pro pieco, haltinte tie, en tiu malplenaĵo de dispecegitaj ruinoj.

Ni trakuris tiujn mizerojn, tiun turmenton de senkoloriginta blanka vilaĝo, plena de ŝippereuloj kubutapogitaj sur la muroj, kiel elmigrantoj de la morto, kiam sur la pordo de domo duontalinta, mi vidis du pordofrapilojn tie lokitajn per tiu majesteco, kiun havas la antikvaj aĵoj.

Ilin vidi, kaj vekigi en mia koro, tiu tenta avido, kiun ni, kompatindaj kolektistoj suferas, estis subita afero. Ili estis gotikaj! Gotikaj, kvazaŭ oni nenion dirus! Kaj du gotikaj pordofrapiloj estas, tento, kiun

(1) Legu Konsuegra'n

eĉ la virta Sankta Antono ne estus rezistinta, se li estus estinta amato de antikvaĵoj.

Ĉirkaŭitaj per najloj, tie ili surmontriĝis, per superega majesteco. Ambaŭ tutaj, dunaskitoj, elpensitaj de sama penso, elrintaj el la sama mano, forĝitaj sendube en sama forĝoformo, konzervis la freŝecon de la tempo. Du drakkapoj el stranga mitologio, subtenis la ringojn, floro tre bone forĝita akceptis ilin, kaj interplektitaj meze de junkoj alkroĉitaj de la akvokurado, desegniĝis la rondaĵetoj de gotikaj folioj el akra formo, sed propramovaj kaj forĝitaj per nura martelfrapo.

Dezirante ilin, longe mi ilin rigardadis.

Mi levis la ringojn, kaj movitaj pro la tento, ili mem vokis la dommastron, kiu alvenis, kaj ni pritraktis la aĉeton.

Ili jam apartenis al mi!

Ili jam apartenis al mi, kaj rapide pro timo ke ili ne malaperu, la seruristo post nelonge elŝiris ilin el tiu nervohava pordo; kaj malgraŭ ke ili apartenis al mi, kaj mia manio, la batalado por ilin elŝiri estis tiel sangavida, ke dum momento, mi estus ilin forlasinta se en la amo de kolektisto ne estus pli da radikoj, ol tiuj, kiujn ili havis. Tiuj feraĵoj krustiĝintaj sur la vermborita lignaĵo, kvazaŭ mituloj sur rokoj, ne volis forlasi tiun pradomon, kie dum tiom da jaroj ili vivis; tie ili estis manpremitaj de multe da generaciaj manoj; tie pro maljuneco ili fariĝis antikvaj; tie ili sin kroĉis per tiom da amo kaj rifuĝo, ke ni estis devigitaj rompi tiujn radikojn pri kiuj ni parolis, kaj la kontraŭstaro fariĝis heroa.

Tiel heroa, ke ĉe ĉiu frapo, kiun ili ricevis, tiuj pordoj krakis, ili splitis, la ĉarniroj tremadis kaj la najloj moviĝis; tiel heroa, ke ekvenis virinoj, la scivoluloj haltis kun alvenintaj najbaroj, kaj ili grupiĝis, rigardantaj tiun bruegadon, kaj demandante al si la kialon de tiu Manĉa' (Manĉa) malordigo, ĝis kiam bona virino klarigis al ili, pri iliaj duboj.

— Fraŭlino—ŝi diris,—oni ilin forportas, ĉar ili savis tri virojn.

Kaj tio estas vero: tiuj pordofrapiloj savis tri virojn.

Tio okazis, dum tiu terurega nokto de la Consuegra' detruo. La ventego komenciĝis. La ĉielo estis nigra, pluvego falis tondromiksita, kaj meze de ektima tremado, oni aŭdis ke venas kaj alproksimiĝas teruriganta bruo meze de la mallumo. Per la helco de fulmoj, oni vidis la tuj falontan grandan kaskadon, kaj la tuta vilaĝo tremis kvazaŭ sola persono, kaj ĉagrenŝirita ekkrio eliris el ĉie, kvazaŭ ĝi englutus la vilaĝon.

Tiam komenciĝis tiuj korpremantaj horoj, kies priskribo estas .

nebla. La konfuza ombro de la morto giitis sur la nubojn, falĉante per senkompatema mano. La rivero disvastiĝis; elpelita de tiu morto, ĝi divastiĝis, kaj ĉiam malsata, neniam kontentiĝis; malgraŭ ke ĉion ĝi ĉie okupadis, ankoraŭ ĝi avidas, kaj ĉion ĝi terurigas, kaj ebenigas la detruaĵojn. La akvo renversis la pordojn, laŭlarĝe ĝi eniris en la salonojn, supreniris la tegmentojn, supersaltis per malpuraj kaskadoj, balais per falsilbatoj, kaj ĉiam kuranta, kurante senripoza, estingis ĉian vivon, ĝin forportante laŭ la fluo, ĉiam flumalsupren.

Tri viroj estis persekutitaj de la fluo; tri senesperaj viroj forkuris, ne sciante kien ili forkuras, gvidataj de la dezirego vivi; kaj kiel respondo al iliaj senesperaj ekkrioj, ili vidis la pordojn fermitajn, kaj ili jam aŭdas la morton kiu murmuris post ili.

Ili sin kredas mortintaj.

Ili forlasis jam la vivon.

Jam la akvo ilin puŝpelas kontraŭ la sojlo de pordo, kiam ili ekvidas apud la arkaĵo, la du gotikajn pordofrapilojn, akcele alkroĉiĝis ili tien, kiel la ŝipperento sin alkroĉas al sur splitaĵan pecon.

Trafrostegitaj de malvarmo, kion ili aŭdis, kaj vidis de tie, tio mortigas per teruro.

Kelkfoje, en strato oni aŭdis, malfortan voĉon, tio estis viro forte kaptita sur lignaĵo, kiu agonianta preterpasis, kaj la akvo nenion atentis, kaj lin forportis kvazaŭ salikan branĉeton, la plendo malgrandiĝis mallumaĵo malsupren, kaj fine ĝi perdiĝis; aliajn fojojn preterpasis mortanta ĉevalo kun rekta harego, ŝvelintaj aerserĉantaj naztruoj kaj tremantaj oreloj, kaj ĝi supren — aŭ malsupreniris meze de akvo; kelkanj fojojn paŭze alvenis ombro de ŝvelinta bovo, turniĝis en kota akvoturniĝo, kaj tie haltis. Oni vidis lumeton kiu estingiĝis, tio estis domo, kiu frakase elfalis en la riveron; silentiĝis voĉo, ĝi estis viro, kiu ĵus mortis; viroj, virinoj kaj geinfanoj sin defendis per ekkrioj, kaj ĉiuj kunigitaj plendoj, faris la ĥoron de la morto; al la voĉoj petantaj helpon, nur la eĥo respondas; kaj la rivero neniam haltis, freneza je fiereco kaj rava je vaneco, submetante per sia forto, tiun mizeran angulon.

Dume alkroĉitaj al la pordofrapiloj, tiuj tri viroj kriis per ekkrioj trafantaj la animon. Ili kriis la tutan nokton, dum tuta, tiel longa nokto; kaj kiel respondo al iliaj krioj ili aŭdis nur aliajn, kiuj respondis al ili, kaj la tremadon de la iom post iom falanta domo.

Tiel, ili restis ĝis la sekvanta mateno.

Lacaj, senkuraĝitaj kaj duonmortaj, malfirmiĝis fine tiu pordo, tiu por ili ĉiela pordo, kaj oni eltiris ilin el tiuj gotikaj pordofrapiloj.

Al ili, ili ŝuldas sian vivon, ili estis la ringoj de ilia savinta haveno.

Por ili, tio estos du rememoroj; por mi, maniula kolektisto, ili estos inter siaj frataj, la du plej dorlotitaj feraĵoj, kiujn plej ame mi gardas.

La Floraj ludoj de Consuegra

Ne estas nur pordofrapiloj, kion ni forportis el Consuegra.

La Asocio Amikoj de la Malriĉuloj, komisiis nin, por ke meze de tiuj ruincj, ni kunprenu tri ortojn el la plej malfeliĉaj, kaj ke ni ilin alkonduku.

Ili ĉiuj estis ja sufiĉe malfeliĉaj.

Ĉie la akvoj estis feliĉe gepatrojn, forlasante la orfojn meze de la bordkotaĵoj, kaj la domoj estis plenaj de senhejmaj infanoj.

Same tiu, kiu juĝas la prempoeziojn kaj poemoj de florldoj de la morto, ni devis elekti tri el ili, la tri plej malgajajn poeziojn, la tri verkajn plej dramajn, ilin premiante per la tri bonfaradaj floroj, kiujn proponis la Asocio de Amikoj de la Malriĉuloj.

Ni aljuĝis la jasmemon al ne plena sesjara infano, kotplena ankoraŭ de tiu terura nokto; ruĝa koto, kiu fariĝis rigida sur la vestoj, el la sama ruinkoto, kiu kovris liajn gepatrojn, kiam la domo frakase elfalis.

La violon ni donis al alia sepjara infano je pli eleganta tipo, ol la unua, pli malgrasa, kun grandaj, pro timo, malfermitaj okuloj, kun unu brako rompita, kaj kun tremado pro rememoro de la horoj, kiam li rajdis sur lignaĵo, kaj glitis tra la mallumaĵoj.

Kaj, fine, ni aljuĝis la naturan floran al kvarjara orfeto, mirakle ankaŭ savita, kaj fariĝinta sola en la mondo, kiel la aliaj premiitaj fratinoj.

El la trio, tiu lasta ĉar li estis la plej juna, malbela, kaj plej malfabla, estas kiu inspiris al mi grandan simpatian.

Kiam oni eltiris lin el la koto, oni povas diri ke li estis en sovaĝa stato: li preskaŭ ne parolis, ploris, nek iam ridis; sed lia trema kaj samtempe kuraĝa rigardo, liaj okuloj grandaj kaj malfermitaj, ekmontrantaj la miron de infano, kiu vekigis, donis al li la aspekton de bona hundido, kiun oni deziras dorloti; la vizaĝo freŝa kaj rozkolora, pri kiu estis neeble sukcesi, ke li ĝin purigu; ebena nazeto ĉiam malpura ĉe la pinto; blondaj haroj disigitaj sur la frunto, desegnadis nekonsen-

tigeblan sintenadon de trema infano, kiu per sia pensmaniero paŭza, kaj balancanta paŝado kun la fingro en la buŝo, donis al li seriozan aspekton, kiu ŝtelis la volon; li estis kompatinda kaj samtempe ridigis.

Kial li estis preskaŭ nuda, ni vestis lin per la donacitaj alvenintaj kestoj plene je malpretaj komercaĵoj, kaj nenio pli ridinda kaj malgaja, ol tiu obstina infano vestita per tiuj amasalvenintaj restaĵoj, el ĉiuj kvar flankoj de Hispanujo; marista pantalonon sur vioilkoloraj ŝtrumpoj ĉiam kun faldaĵoj sur la maleolo, krudledaj botoj el kajera ledplando, vastega jakko, kiu malbone sidas sur li, pro amplekso; ŝelkoj, kiuj havis pli da maŝino, ol da elastgumo, ĉapeto kun oraj literoj per kiuj oni legis *Lepanto* sur silka banto, kiu devis esti en la malantaŭa parto, sed kiu neniam tie estis, kaj malhelpis lin por vidi; kaj sur ĉio, la manteleto de kariko kvazaŭ Madrida mantelo, kovranta lin tiel, ke kiam li marŝis, oni vidis nur banton sur la malpura vizaĝo, kaj grandaĵon, kiu marŝis per rava serieco.

La unuajn tagojn malgraŭ niaj dorlotadoj, ni ne sukcesis ke li sidu apud la manĝotablo. Dum la aliaj knaboj paroladis kaj manĝis, tuj kiam li kredas ke ni ne atentis, li malrapide alpreksimiĝis kun forko, forkpiniĝis, kaj foriris en anguleton manĝi la kaptiĝon. Por trinki li faris la samon, kaj nur kiam alvenis la desertoj konsentis sidi kune kun la kamaradoj, akaparante per manpreno biskvitojn kaj kukojn, plenigante siajn poŝojn, tiujn larĝajn poŝojn, kiuj tiel entuziasmiĝis lin.

Kaj tio ne estas ĉar li ne malsatus, kompatinda trompanto. Tiel malsata ĝi estis, ke iam, kiam oni multe manĝadis, dum tagmanĝo, kiun la manteleto ne povis kovri, plena festa tagmanĝo, ĵus finiĝinte la desertoj, ni eniris en tartanon, kunportante ion por manĝeti.

— Kiam vi estos malsataj, tiam vi avertos nin, — ni diris al ili, antaŭ ol forveturi.

— Nun — diris la pli juna. Kaj same se li ne estus tagmanĝinta, manĝis la tutan manĝeton, ĝin mikante al la biskvitoj, la desertoj kaj al la provizoj de kukoj.

Kompatinduletoj! Iom, post iom, ili kutimis al ni; ni ne estis jam fremdaj por ili, ili parolis kaj kriis, petis de ni karamelojn, kaj supreniris sur niajn genuojn; kaj kio korpremis pli nin, tio estas ke ni parolis pri nia foriro kaj ili konsentis, kaj eĉ revis landojn, ludilojn, kaj nekonatajn aferojn montritajn al ili de tiuj, tiel malproksimaj sinjoroj, kiuj devas ilin adopti.

Fine alvenis la horo.

La vilaĝo estis sekiĝinte, kaj la vetero estis ĉarma. Oni kolektis la

safranon, ĉe ĉiu hejmo oni senfoliigis ĝin; kaj kiel ili ĵetis la florojn el supereĝa blueco, ĉiuj kortoj, la koto, la tuta vilaĝo, estis tapiŝita per bluo; la ĉielo blua, la muroj bluaj, bluaj la stratoj kaj domoj, nenio rememorigis pri la morto, kiu ekokupis tiun ĉarman bluan, antaŭ nelonge.

Tuj kiam la ĉaro alvenis ĉe la pordo, ni eniris en ĝin, kaj la duono de la vilaĝanoj venis por adiaŭi la tri premiitajn orfojn, la tri plej malfeliĉajn, se estas eble ke oni povu elekti la mezurilon de la mizero; kaj en la vizaĝo de ĉiuj desegniĝis ia jaluzeco, kaŝita en viemo, kvazaŭ antipatia vualo por ni, kiuj agis kiel juĝistoj de tiuj ludoj je mallumajfoj.

Kaj kontrastoj de la vivo! Ĉiuj ŝajnis ridemaj inter tiom da floroj, ĉiuj, escepte la *sortanoj*, escepte la tri orfetoj, kiuj amasiĝinte en la ĉaro, tute proksimaj unu de la alia en tiu kusena nesto, sin ĉirkaŭprenis plorante, vidante ke ni ilin forportas.

Malgaja horo

«Kara amiko:

»Mi jam pensis ke ci surpriziĝos, tuj kiam ci sciigos pri mia eniro en la korporacion de la edziĝintoj per kunligo de la Sankta Edzeco.

»Sed, karulo ci surpriziĝos pli, kiam ci scios, kiu ja povus tion pensi! ke premkorneto estas kulpa pri tio.

»Mi klarigos: premkorneto kaj ŝi; sed mi aldonas ke pli pro la impresio de tiu, ho ve! premkorneto, ol pro la virtoj kaj logaĵoj de tiu, kiu estas hodiaŭ mia edzino.

»Atendu, ne estu malpacienca. Ci jam scias ke per grandaj klopodoj kaj batalante kun mi mem, mi malpacigiĝis kun ŝi. Tial ke ŝi estas pli maljuna, ol mi; ke ŝi havas kvanton da fratinoj, ĉiuj tiel avidaj edziniĝi, ke ili tremigas la domon; la suzopo ke mi ne estis korespondita, kaj aliaj detaloj el kiuj, iuj estis ĥimeraĵoj, kaj la ceteraj, nun mi vidas ne estis tio, tute decidigis min. Nu, ke mi skribis tion al ŝi, kaj ke mi ne deziris edziĝi.

»Aj, kiel mi povis imagi similan aferon! De post tri tagoj, tri tagoj kaj du noktoj de moviĝado en la lito kaj kapkusenmovado, tri precizaj tagoj de kiam mi sendis la ameksiĝon al ŝi, kiam, aj, ree dum sennuba kaj malgaja posttagmezo, kiel tiuj priskribitaj de tiuj, kiuj oni

nomas poetoj, mi ne scias kio allogis min, por ke mi eliru iomete de la vilaĝo; kaj pli kormalvarmumita, ol la ĉielo de tiu, tiel malgaja posttagmezo, mi iris ĝis arbaro.

» Kia arbaro, kara mia! kia arboj! Ĉiu kverko havis sur la branĉaroj, junan verdan baldakenon por ŝirmi sub sia ombro, kvanton da geenamiĝintoj. Kaj kia musko por sterni sin tiel Freŝa, ebena, plena de floroj kaj violoj, tute ŝajnebrodita de aro da papilioj, kun varmeta parfumo, kiu dormetigis la spiritojn! Kiel kantis la akvoj, kaj kia feliĉo, karulo mia!

» Tio okazis dum somero, je vesperiĝo, kaj oni ĝuis tiom da kvieteco! La arboj estis senmovaj, ne tremis herbero, nek eĉ folio: Ĉio silentis en tiu trankvila horo, dum kiu, tiel ŝatas pentradi tiuj, kiuj partoprenas vian melion.

» Ĉio silentis, krom tiu premkorneto, kaŝzo de mia edziĝo.

» Imagu ke eble okazas la ĉefesto de iu proksima vilaĝeto, kie mi ne scias, kion ja oni ludis: la afero estas ke meze de tiu kvieteco, tie en malproksimeco eliranta el intermonto da arboj, iom post iom, oni aŭdis voĉon tiel plendantan, ke ĝi penetris en mian animon.

» Ne ridu: Mi certigas, mi ĝin ĵuras al ci, ke tiu premkorneto ploris. Malgaja, kompatiga, alkondukita de la aera voĉo, alvenis sub la arboj per tia, tiel plenda tono, ke ŝajnis kvazaŭ ĝi suferas sopiron, ke ĝi ekĝemis pro doloro, aŭ ke mortante, ĝi ellasis la lastan noton. Kelfoje ĝi sendis longdaŭran plendon, kiu malĝojigis; kelkajn fojojn ŝajnis malsana animo, kiu adiaŭas la arbaron; aliajn fojojn ĝia voco perdiĝis valoantaŭen, kaj ci estus dirinte ke ĝi elmigris; kaj enfine aŭdita de kie mi estis, sub tiu baldakeno da folioj, kaj antaŭ tiu sunsubiĝo, mi ne povis ĝin aŭskulti: mi sentis sopiradon eliranta tiel profunda de mi, ke ŝajnis kvazaŭ mi estus jam internmortanta.

» La ceteron mi supozas, ke ci jam divenas.

» De tie, mi iris pardonpeti, diri al ŝi, ke mi ne povas vivi sen ŝi, kaj ĉio, kion ni diras en similej okazoj.

» Ci jam vidas el kio dependas la sorto. Jam diris, mi ne scias, ĉu Homero' ĉu Cervantes', ke se la premkornetoj ludus dum taŭga momento, eĉ la historio ŝanĝiĝus, kaj la paĝoj de la vivo ŝanĝiĝus je folio.

» Kio okazis al mi, ne devenas el mallerta horo: ĝi okazis pro malgaja horo.

» Ĝis nun mi estas tre kontenta.

» Korsalutojn».

Blanka kaj nigra

Negro estis duonsternita sur kajo de Barceloneta (1). Liaj pendantaj kruroj tuŝis preskaŭ la akvon, la kapon apogita sur granda ringo, kaj apud li, korbo plena de ŝtonkarbo.

Li estis tre nigrega negro, longa kiel nigra tago, malgrasa kaj osta, kaj lia tuta vestaĵo konsistis el pantalonon fadena, kaj blua flanelvesto brustmalfermita, montranta la ripojn unu post alia.

Kiuj iras ofte al havenmarŝejo, tiuj vidis la negron rondiranta la tutan tagon inter la ŝarĝoj, kotonpakoj, grenamasoj, kaj bareloj de petrolo, la tagmezon, dormanta en ombro de budo aŭ de levilmaŝino; kaj se okaze estis dum vesperiĝo, oni vidis lin zig-zagmarŝanta, balanciĝanta kvazaŭ ŝipo, kaj iranta kun la ŝtonkarba korbo, kiun neniam li forlasis, de drinkejo al drinkejo; nekte, kiu povas scii ja, kie li dormis.

Ne forlasante kiel li ne forlasis la havenon, ŝajnis kvazaŭ ia ŝipo lasis lin tie sur la kajo, aŭ ke li alvenis per naĝado, ke li elvojiris, aŭ ke li ne sciis kie li estas.

Sen metio, lia rimedo por perlabori sian diboĉan vivon, estis naĝi, subakviĝi ĝis la fundo de tiuj akvoj, ĝis la malpurajplena lito, kie nur la ŝkrapilego atingas, kaj eltiri ŝtonkarbon de tie.

Ĉe ĉiu subakviĝo li supreniris nur peceton da ĝi kaj multafoje neniom; je ĉiu submara vojaĝo se li sukcesas, gajnis du aŭ tri centimojn; kaj jam vesperiĝinte se li bone plenigis sian korbon, kompatinda negro! gajnis kvin aŭ ses realojn.

Tiun tagon li tute plenigis ĝin kaj havis ĉe sia flanko; kaj tial ke vesperiĝis kaj ke ne estas nur akvo, kion li trinkis, li estis duonsternita ne povanta porti sur si la korbon, kiam mi vidis la jenon:

Trairis virino kombita per harglatigaĵo kaj blankigita vizaĝo, kaj vidante la negron ebria, ŝi deziris fari al li ŝercon.

Unue ŝi piedfrapis lin, kaj ridis.

La negro intencis stariĝi, sed neniel trafis sian celon.

Poste ŝi streĉis al li la harojn.... kaj ridadis, dum la alia sin defendis.

Kaj fine, ŝi pensis gravan aferon.

(1) Mara Barcelona kvartalo.

Si vidas tiun korbbon, tiun kunigon da ŝvitoj, da korpremoj kaj danĝeroj, la sola kapitalo de tiu malfeliĉa drir kulo, kaj kion ŝi faras? Ĝin ŝi prenas, kaj malplenigas en la maron.... ridfreneze.

La negro ne sukcesinte sin movi per elparolado de lia lando, mi ne scias, kion li diris al ŝi; fine li leviĝis, prenis la korbbon kaj ekploris per tiel funda ploro, ke li kortuŝis la akvojn.

Sed ŝi, ridis kaj ridis senĉese.

Kaj la negro senĉese plorante.

Nenio pli ĉagrena kaj malgaja, ol la kontrasto de tiu nigra figuro kun la vizaĝo larmplena, kompare kun la blanka figuro, tute farunplena.

Pravigi simion

Tie en la vilaĝo, de tempo al tempo trairis gurdo.

Ĝi estis gurdo el tiuj je malsanaj tuboj, tegita per blatdetruita flanelo, por ke ĝi tute ne perdu la malmulton da voĉo, kiun restis al ĝi: muzikpecetoj de *Marta*, *Norma* aŭ de *Paŭlino*, kiuj eliris pro senĉesa turniĝo de la maŝinmanturnilo, kaj elirantaj tiel plendaj kaj per tiom da senkonsoliĝo, ke anstataŭ amuzaĉo, tio ŝajnis malgaja skatolo, plena de strangaj vundoj.

Sed, kio gajigis ĉe tiu senta kesto, kaj gajnigis pli da mono por la dresisto de la muziko, tio estis mezekreska simio, kiu staranta sur la *tapiŝo* jen kostumita kiel Nelusko, jen kiel Faust, je kalabra *rabisto* aŭ turka kantinistino, ĉiam havis ion por fari, kaj por manĝi sen ceremoniojn nek ŝkrupuloj.

El ĉiuj bohemiaj simioj, kiuj sur gurdoj trakuras ĉia ajn ĉefajn, kaj intervilaĝajn vojojn, neniam mi vidis alian, kiu kvankam besteto kiel ĝi estas, havus aspekton tiel personan kaj el bona persono. Kun tiu tiel pura vizaĝo, kvazaŭ antaŭ nelonge rozita, la blondaj vangharoj, ĝiaj petolemaj okuloj, blankaj dentoj, maldikaj oreloj, haroj strakkombitaj, kaj ĝia modesta sintenado, kiam ĝi ne estis devigita movi la ĉokoladan kirlilon, trairi ringegojn, ludi la triangulon kaj basktamburon, kaj li havis liberan momenton, vi estus vidinte ĝin tiel kvietan, senmova kaj prudenta, ke vi estus pruntinte al ĝi cent durojn, aŭ doninte la manon al ĝi, kiel konfida pruvo.

Ĉio ĝin distris: neniu kiel ĝi por pasigi du horojn elektante vostaĵojn, nun unu, iom poste alian, kaj nun tiun ĉi, kiu ŝajnas al mi blon-

da, kaj poste tiu, kiu estas pli nigra: kaj ĝi elŝiris ilin unu post la alia por fari per ili poŝhorloĝan ĉenon aŭ paciencan kadron; tiel, ni ripetas ĝi pasigas du horojn. Mordi peceton da pomo kaj dormiĝi kun la peceto en la buĉo, neniu kiel ĝi. Por iri kaj reiri sur la gurdo, sur tiu ebenaĵo longa je kvar manmezaraĵoj kaj tion plenumi, per plej granda kontento, neniu kiel ĝi. Ĝi estis kvietaj simio, simio lerninta, sinjoro distinginda, respektema kaj dolĉanima, ĝi ne mordis la mariĉulojn, ne mokis la malfeliĉulojn nek manĝis avelon, se antaŭe, ĝi ne estis gajninta ĝin, per lerteco aŭ gimnastiko.

Tiel bona ĝi estis, kaj ĝia mastro tiel ŝatis ĝin, ke eĉ li konfidis al ĝi tiun gurdon, kiu estis lia tuta riĉeco, li lasis ĝin sola kun ĝi, sen timo ke iu ajn kuraĝus tuŝi ĝin, ĉar se tiu tiel modera kaj trankvila besteto, estus vidinte ke iu alproksimiĝis aŭ tuŝis la manturnilon, ĝi estus kaptinta lian fingron, orelon aŭ harojn, kaj ne elektus ilin unu post la alia por fari por si poŝhorlaĝan ĉenon el ili, sed je harligaĵoj tutaj bukloj kaj je peruko, senharigante personon kvazaŭ ovo de papago.

Iam, do, la mastro iris aĉeti manĝaĵojn aŭ mĉne scias kien, kaj la simio gardis la gurdon, ĉirkaŭata de geinfanoj kaj aliaj, kiuj tiaj ne estis, kiam atendante la horon difinita por la promenado, viro de la grupo antaŭeniris por doni al ĝi avelon.

El la viroj, kiuj loĝas ĉe tiuj ĉi landoj plenaj de vilaĝoj kaj vilaĝetoj, neniu alian mi vidis ĝis nun kiel li, kiu kvankam devigita esti kiel persono, estus tiel simiŝajna. Li ornamis sin per vangharoj same kiel la alia, sed pli senkulturaj kaj malglataj; li estis ankaŭ razita, sed liaj vizaĝsulkoj estis el malnobleco; li estis strek kombita, sed virinŝajna; kaj se li ne estis tiel vila kiel la afabla bestelo, li havis malbonan personan vilon, kiu ĉe la brovoj pendis sur la okuloj, kvazaŭ du araneaĵaj prenetoj.

Kiam li donis la avelon al la simio, unue la simio ne akceptis ĝin; sed dubanta kaj pensanta ke oni povas akcepti avelon el kiu ajn li estu, kontraŭ lia kutimo, ĝi ekkaptis ĝin per ungozataĵo.

Tio ofendis la viron (?), kiu minacis ĝin per bastono.

La simio ankaŭ ofendiĝis, kaj montris al li la dentojn.

La viro komprenis la aludon, kaj donis al ĝi du bastonfrapojn.

Li bastonfrapis ĝin, kaj la ekkrio de la besteto, la furiozeco havi tiun ĉenon, kaj la terura rigardo el supera indignado, estas ne priskribeblaj.

Sed la viro ne kontentiĝis, kaj denove levis la bastonon; sed tial ke la simio ne dormis, per simia movo ĝi forprenis ĝin de la manoj, kaj

donis al li tiel fortan bastonbaton maza de tiu ligna kapo, ka li fariĝis duone senkonscia.

Dume la mastro alvenas.

Li alvenis, kaj estas vidinda afero, kiel la kompatinda simio kaptis lin per la jaka brustrandajo movigante la okulojn, la vizaĝon, trairante la manon sur li, montrante la bastonon, furioze rigardante la viron, kaj movigante la ĉenon ĝi klarigis al *gurdenisto*, ĉion, kio okazis al ĝi, la bestecon de la viro, sian propan prudenton, kaj la ateston de ĉiuj, kiuj ĉeestis la dramon.

— Ĝi komencis — diris la brutsimilulo de la bastono.

— Ne estas vero — diris ni ĉiuj. — La simio estas prava.

Jes sinjoro: la simio estas prava. La simio agis kiel homo.

— Mi preskaŭ nenion faris al ĝi, kaj al mi, ĝi ĝibetigis la kapon.

— Bedaŭrinde, tio ja ne sufiĉas, — ni kriis, dum la besteto prenis siajn ilojn kaj daŭrigis la gimnastikajn ekzercojn, kiam la ĉeestantoj foriras kaj ke mi pensis: «Tiu viro voĉdonas, partoprenas en voĉdono kaj eble li estas *cacique* (vasalestro).

Kiel bone sidus sur li, tiu kostumo de Nelusko, de kalabra rabisto aŭ de turka kantunistino!

Kiel bone taŭgus por li gurĉo, kiu dolĉigus al li la sentojn, se lia internaĵo enfermas iom da ili. Kiom da simioj trakuras la mondon sen gurdo kaj sen ĉeno!»

La freneza orangutango

La boneco kaj prudento de la simio de la gurdo, kontrastis kun freneza orangutango, kiun mi iam vidis.

Oni havis ĝin en menaĝerio, kaj kial oni observis iujn strangaĵojn en ĝia maniero mordi, en ĝia nerveco, en ĝiaj ekdormecoj kaj ekkrioj, oni konkludis ke ĝi estas freneza, kaj formatante ĝin el la aliaj, oni ĝin enfermis en pli dikan kaj mallarĝan kaĝon.

Tie estas kie mi ĝin vidis. En malhela angulo funde de la butikoj, inter kromaj kaĝoj, ringoj, seĝoj kaj trapezoj de foira menaĝerio, oni vidis ĝin post la ferbariloj kaj timigis rigardi al ĝi.

Kuntirita kiel ĝi preskaŭ ĉiam estis, tute brakfaldita, kun la kapo ĉirkaŭita de la manoj, malgrasa kaj nervhava kaj el ruĝcindra koloro, ĝi similis nodeplektitan longan ŝnregon, kun la du pintoj flaman-taj, kiuj estis la duberuĝaj okuloj el teruriganta rigardo; ĝi ŝajnis esti

malgranda; sed kiam iom post iom ĝi starigis kaj disvolvigis, ŝajnis kvazaŭ la ŝnuroj streĉiĝis kaj malaperus tiuj nudoj; kaj tiam staranta kaj streĉita en la konfuza heleco, oni nur vidis kapon kun tiuj karminaj okuloj, kaj du veksaj oreloj, sin subtenantaj sur ostaro el makabra malgraseco, el longega malgraseco, kun la brakoj, kiuj pendis kaj balanciĝis kvazaŭ ili estus senvivaj.

Ĝia stranga frenczo ŝanĝigis al ĝi la dezirojn ĉintage, ĉiuhore, ĉiunmomente. Estis por ĝi tagoj, kiam ĵus vidinte helecon, ĝi fikse rigardadis tra pordeto de la fundo, kie estis la aliaj simioj kaj tiun tagon, neniel ni povis distri ĝin: ĉiam per malfermitaj kaj fiksej okuloj, ĉiam rigardante tiun punkton, hipnotigita kaj terura; dum aliaj, ĝi havis la manion de la kurado, kaj tiam ĝi fariĝis eterna movado: ĝi supreniris, subiris, rondiris kaj rerondiradis la kaŝon, ĝi supren-kaj malsupreniris ree, ĝis kiam nerva kaj senkuraĝigita per dentknarado, streĉita falis sur la plankon; kelkfoje ĝi terurege malsatis, kaj mordis la ferbarilojn, aliajn fojojn ĝi ne volis manĝi, kaj forĵetis, kion oni donis al ĝi; horejn ĝi havis, dum kiuj ĝi senhaŭtigis sin; momentojn kiam ĝi supreniris la plafonon kaj sin lasis fali kiun la kapo malsupren; momentojn kiam ĝi ekkriegis, ridis aŭ kriis per agonij ekkrioj; kaj eĉ momentojn dum kiuj ĝi ploris. Ĝia malamo estis kontraŭ la aliaj simioj. Ĝi toleris ĉies rigardojn; sed kiam ĝi aŭdis ekkriojn de siaj ekziliaj kamaradoj, tiam estis tiel granda ĝia malespero, ke ĝi resaltis kontraŭ la feraĵoj, intencis eltiri al si la okulojn, mordetis siajn piedegojn, kaj senhaŭtigis sin per aĵoj, kiuj korpremis, kaj per longedaŭra roto, kvazaŭ mortanta gardstaranto kriante «vige!».

Sed kiam ĝi mortis, ĝi ne kriis.

Tagon, oni bone ne scias kiel tio ekkzis, ĉu ĝi interplektiĝis per ŝnuroj, ĉu ĝi deziris salti aŭ ĉu ĝi volis memmortigi sin, oni trovis ĝin pendanta de la plafono.

Tie mi vidis ĝin.

Meze de la kago, kaj inter tiu malsana lumo, ĝi tute similis ian sendormecon. Oni vidis la kapon flavecan, el flaveco de dubleblua vakso; la oreloj pendis duone falditaj, la brakoj pli longaj, ol neniam; velkaj subtenis la manojn ostajn kaj malfermitajn kun dubeblankaj manplataĵoj; la kruroj elartikigitaj tufis preskaŭ sur tere; kaj la du, kiel ĉiam ruĝaj okuloj, rigardis unu la pordon, kaj la alia nin, je teruriga maniero.

La nova incenso

La pintomontoj de Montserrat'o similis flamiĝantajn fajrokarbcjn vibrante rozkoloriĝintaj per la lastaj lummakuloj de la subiranta suno.

La kvieteco de la vespero estis pli vaste aŭdita ĉe tiuj altaĵoj; la koro pligrandigis ĝin: estis la tuta Katalunlando kiu silentis ebenafo-aataĵen, vasta kiel kristnaska panoramo.

Tio estis kvieteco de popolo por ke oni povu aŭskulti la Anĝelusion, kiu eliris el la fundo de la monaĥejo, la majesta preĝo, la grava preĝo, kiun la eĥoj de la tiesaj ŝtonaroj forportis kaj resoniĝis de eĥo al eĥo, ĝis la lastaj limŝtonoj de la konfuzaj bluaĵoj.

Jen estas la knaboj tiuj, kiuj kantas, kaj tiuj kristalaj voĉoj ŝajnis kvanto da birdoj aŭ flugado da anĝeloj nestirantajn; jen estis la monaĥoj, kiuj kantis la fidon, kaj la ondoj de la voĉo majeste memorigis la kantojn de la legendoj; jen estis la orgeno, kiu preĝis per sia melankolia plendo; kaj tiam la monto fariĝis kvazaŭ la orgeno mem, kaj ĉe ĉiu harmonia eksplodiĝo el la fundo de la ebenaĵo, de tiu Katalunlanda ebenaĵo, supreniris amasiĝo da nebuloj, kiu ŝvelinta per poezio, incensis la monaĥejon.

La konfuza bruego de la kanto de la Ave Mario en tiu dolĉega horo, kaŭzis al mi tiun ĉie impreson, el la promenejo de la cipresoj; mia koro flugis jarcentojn pluen en la vivo, kiam aj! ŝajnis kvazaŭ oni fajfas miajn rememorojn aŭ ke oni fajfis la preĝon.

La ŝnurvagonaro de la tri kvaronoj de la sepa suprenrampis, kaj la suprenirantan fumon ne estis nebulaĵo, nek incenso, nek estis kataluna la vagonaro.

Ĝi estis meblo, kiu supreniriĝis pasaĝerojn, kaj de tie, forportis poezion.

Nova izoleco

La sekvantan tagon, kun tiu fajflbruo en orelo, mi iris viziti la groton, kie, laŭ tradicio, aperis la Sankta Virgulino.

Tie estas peco de altarplato, mi diris al mi; tie nestas la legendo;

tie sub la Stonegoj, mi trovas libron skribitan per literoj kodaj; tiu mistika groto devas esti sakra rifuĝejo por vivi sola, malproksime de ĉio monda, malproksime de la praktika vivo, kaj malproksime de la ceteraj homoj.

La ermito, kiu tie loĝas, devas ĝui tiun revitan pacon, tiun spirantan ripozon, tiun koran oazon, la koncentriĝon vivi interne de si mem, aŭdante la voĉon de la rememoro, la paroladon de la venteto, kaj la preĝon de la steloj.

Ne ankaŭ tiel!

Tiu moderna ermito, havas jam telefonon, kaj eble fonografon kaj fotografilon.

Eble, kiam ree mi iros tien, mi trovas turnokrucon en la ermitejoj, loĝiojn kaj seĝojn por vidi la ventegojn, la sunleviĝojn kaj la malvarmecon de la luno; eble oni estos devigata pagi por eniri la ĉambron, kie estas la Sankta Virgulino.

Tio estos nenia strangaĵo.

Hodiaŭ, kiam eĉ en Jeruzalemo oni faras ekspozicion, kaj kiam baldaŭ oni supreniros la kalvarion per lifto, mi ne miros, se iom post iom oni falsos ĉin, monto de niaj revoj!

Ili estas tiel multnombra la vekigintoj, kaj tiel malmultaj tiuj, kiuj revas!

La nigra tagmanĝo

La tablo de la hotelo preskaŭ ĉiam dezerta, pleniĝis de stranga personaro.

Ili estis kongregantoj de ia kongregacio, kiuj helpinte morti, aŭ pli bone, mortigi iun sraŭbligil-komdamnito el la tiea najbaraĵo, prefitis tiun senmakulan bluan tagon, por iri al la kamparo, manĝi bone, kaj reveni hejmen de la sunsubiĝo, kiam ne ĝenas la suno.

La vizaĝoj de tiuj sinjoroj estis unikaj en la landkarto de la vizaĝoj: ili havis trajtojn de fratoj de ia mistera monaĥejo kaj korpgraseco el kontengita persono; ili similis oficietojn de juĝejo butikistzreftitajn; dubelavaj kiel aktoroj, kun ruĝaĵoj je sano; vakraj figuroj de foira barako sunelirantaj, sur kiuj, oni vidis la vizaĝaldonojn, la flikaĵojn de la vestaĵo, kaj eĉ tiun malsekan polvon de la nefleksebla vesto.

Laŭ tio, kion ili diris tagmanĝante, oni komprenas, ke ili vidis je proksime, mortigon de sana viro en plena Naturo; perfidmortigisto.

jes; sed malgraŭ ĝio homo; malbonfaranto; sed filo de patrino; kaj ke oni mortigis lin, havantan la ĉielo kiel baldakeno, la maron kiel fono, kaj plenfloran ebenafon etenditan antaŭ liaj okuloj, pro la printempa florado.

— Ĝis la lasta momento li ne pentiĝis, — diris unu, — kaj se ne estus estinte pro la *obstineco*, li ne estus konfesinte.

— Hieraŭ vespere ankoraŭ, — diris plenbuŝa grasulo, — ankoraŭ hieraŭ vespera, li manĝis kotleton kaj trinkis du glasetojn da Jerez.

— Mi, — diris la alia, — asistis pli, ol dudek kondamnitojn kaj li estas unu el plej trankvilaj, kiujn mi vidis. Tion oni konas per la pulso, kaj tiun matenon mi palpis al li la pulson multfoje: li havis okdek ĝis naŭdek pulsatojn. Hieraŭ vespere, mi ne povis pulsi lin, kiam li adiaŭis sian patrinon.

Multe estus plaĉinta al mi tion, ĉar mi ĝin notas.

Ĝi estas scivolemo, kiun mi havas de kiam mi ekzercas.

— Mi ne kredis, — diris alia, — ke tiom da personoj ĉeestus tie. La hoteloj kaj drinkejoj estas kiuj profitas je la okazintaĵo. Tiun frumatenon mi trovis grandajn malfacilaĵojn, por povi manĝi iom.

Dio mio, kia popolamaso!

— Mi kunportis la matenmanĝon, — diris la alia. — Mi ne povas malfortiĝi, kaj tiuj ĉi fortaj emocioj, se mi ne atentis, difektas al mi la sanon. Tion, kion faras kelkaj, t. e. rigardi ĉu li mortas trankvile, ĉu li ŝajnigas adiaŭan rideton, ĉu li tremas antaŭ la katafalco kaj la sratbligilo, ĉu li deflankigas la okulojn por ne rigardi la ekzekutiston; kaj ĉu li indmaniere tordiĝas, kiam oni frakasas al li la ostojn, mi ne povas ĝin fari, neniam mi povis kutimiĝi: estas io, kio malpermesos ĝin al mi.

— Mi ĝin komprenas, — diris la grasulo, — kiuj kutimas ĉeesti tiujn okazintaĵojn, estas multaj el la samaj kiuj ĉeestas la taŭrajn batakuradojn; multaj por kiuj ne sufiĉas la ĉevalmortigoj, kaj deziras pli fortajn emociojn: ili deziras veran mortigon, senpagan feston kun tuta granda spektaklo. Neniam mi vidis la taŭrajn batakuradojn; kaj se ne estus ĉar mi konsideras kiel devon, akompani kaj konsoli per ĉeesto, la mortonton, tre kredeble, mi neniam plu irus vidi la mortigon de iu.

— Oni kutimiĝas. — Ankaŭ min, tio kortuŝis je la unuaj; nun, mi pensas ke ĉar estas neniu alia rimedo, iu devas tien iri, kaj mi iras tien.

— *Señores* (sinjoroj), ni ne parolu pri malgagaj aferoj, — diris

sinjoro kiu prezidis la manĝotablon. Kaj oni parolis pri aferoj malpli malgajaj.

Tiom malmulte malgajaj, ke dum la desertoj la ridoj resaltis kontraŭ la salono: oni rakontis fabelojn, malŝtopis pli da boteloj, kaj tiuj viroj el vaksobildoj, dum momento similis anaron de *San Mus* (†) Sankta Mucio), bataliono de la morto, makabra juĝantaro, asketoj de la turmento, festante nigran tagmanĝon.

Dum la desertoj, unu el ili eltiris papereton en kiu estis duono da biskvito.

— Ĝi apartenas al la mortinto, kiu ne povis ĝin elmanĝi, — diris unu.

Kaj transdonante ĝin de mano al mano, ili eltrinkis la glasetojn kaj foriris silentemaj.

(†) Kuniĝo da viroj, kiuj ĉiujare festas la togon de Sankta Mucio. Ili iras al ermitejo de la sanktulo marŝantaj kvazaŭ soldatoj, portante grandajn manĝilarojn, kradrostilojn k. c. kaj tagmanĝas sur la kamparo.

AŬTUNAJ FOLIOJ

Soleco

Sin trovi malproksime de la lando, kaj pro volo de la sorto troviĝi en malgranda stacidomo, en lia ajn stacio staranta apud ebena, brilanta kaj longa relvojo, longa kaj glata ĝis mi ne scias kie de la ebenaĵo, kaj sin trovi tie sola, kaj dum vespere, tio estas sentaĵo el la plej malgajaj, folio el la plej malvarmaj de la vivo.

Ĉie, tiu fremda kvieteco, glaciaero, malsana kaj funebra heleco, verda lumeto funde de la malproksimeco por nura konsolo de la okuloj, la vilaĝo, kiu ja scias kie, ia dormanta figuro, tiu nedifnita malpleneo, kaj tiu malfortiganta kvieteco, kredigas al la animo ke la mondo estas dezerta.

Nenie la koro sentas tiun mortan malvarmecor, kiel ĉe tiuj stacidomoj, sencele enlckitaj, elĵetitaj parkere meze de ruinigita kampo. Kiam oni troviĝas tie, kaj oni aŭdas la malproksiman malsanan voĉon de korno, kiu sonorigas longdaŭran noton kvazaŭ ploranta birdaĉo, kiam alvenas vagonaro kaj haltas tie, konfuze lumante tiujn tiel glatajn murojn, kiom da deziroj sentas la koro por eniri tiun vagonaron kaj foriri; kiel ja revas la spirito pri iomete da cindrovarmo, viva internaĵo, iom da fajro, kaj amo de rigardoj!

Kiel malgajaj estas la fremdej stacidomoj!

La smikoj de la plafono

Mi pasigis multe da tagoj en ĉambro de hotelo pro malsano; multe da febrotagoj, da korpeno.... Ĉism en la sama lito, kun refleksbla kolo, devigita rigardi ĉism la plafonon.

La ĉambro estis blarka kaj icmete sekkrustigita, karaktera ĉambro kun tri krompentraĵoj: *La conversión de Recaredo*, *Los amantes de Teruel* y el *Embarque de las tropas* (La Rekaredo'a konvertiĝo, La Terveŭa geamantoj kaj la Enŝipiĝo de soldatoj); ekulptita mahagona spegulo; du florumoj kun marduono da konkvoj; kurtenetoj el virtamisigitaj klepodoj; tableto kun tapiŝo farita el detranĉaĵoj de indiana

specimenaro; feltra tapiŝeto kun stampita nedresita dolĉanima besto meze de ŝvelintaj floroj; kaj en la plafono tuko utilanta kiel plafonkoverilo.

Ĉar apenaŭ mi povis moviĝi, la plafono, tiu plafono estis por mi horizonto, la perspektivo kaj la pezjaĝo plena de gutakvaj makuloj, de retrospektivaj pluvoj, de landkartoj kaj kontinentoj kun insuloj kaj ŝtonegarioj, kaj tuta geografo. La tutan tagon mi rigardis ĝin. Tuj kiam sunradio glitis karesante tiun bestaĉon de la feltro, rapidulci rigardu la plafonon; tuj kiam mi ne sciis kien sendi la penson, tiam en la plafono mankas iu! Tuj kiam miaj okuloj malfermiĝis, mi havis ĝin jam antaŭ mi.

Mi tiel rigardis ĝin, ke unu tagon mi malkovris profilon sur ĝi, poste kurbaĵoj, kaj granda makulo, kiu kaŝis meze de la plafono fariĝis virinkapo; ne el vulgara virino, sed belega vizaĝo desegnita de primitiva pentristo.

Tiu vizaĝo devigis min serĉi aliajn, kaj ili ne malfruis aperi. Ĉe ŝiu makulo de la plafono, ĉu en la antaŭa parto, ĉu renversita, ĉu transversa, naekiĝis virinkapo, ideala kaj fantazia kapo, tute malsimila de tiuj de la mondvirinoj, kapo, kiun nur mi vidas, kapo kiu apartenas al mi, kaj vivas kaŝita por la okuloj de la aliaj.

Mi absorbiĝis inter tiuj insuloj, mi trakuris la tutan esploreblan teron, kaj baldaŭ el tiuj vizaĝoj eliris figuroj, tutaj figuroj, vualitaj virinoj, kavaliroj kun mantelo, militistoj kun armilaro, sirenoj ne maraj, sed pluvaj, fantomaj fiŝoj, flugilhavaj dragonoj, apokalipsaj monstroj, kaj ne kalkuleblaj vizioj, kiujn neniu alia vidis; kaj tiu tiel dezerta plafono inter tiuj glataj muroj, tiu malvarmeco de la tute blanka kaj malbone zorgita ĉambro, tiel hompleniĝis, ke mi ektimis, ke tiom kaj tiom da figuroj eksaltus sur mian liton, aŭ ke tiu ĥimera danĉo fariĝu sendormeco.

Fine mi resaniĝis, kaj kiu povis tion kredi! kiam antaŭ ne longe mi reiras al tiu hotelo, kaj vidas ke oni pentris la ĉambron, kaj ke tiu plafono estas pura, aj! mi sopiris tiujn vizaĝojn, makulojn, kaj tiujn figurojn, kiujn mi konis nur pro atenta rigardado, kaj kiujn mi amis miamaniere, kvazaŭ amemaj figuroj kiuj vidante min sankuraĝigita akompanis min.

La feliĉegulo

Estis mortinta la vilaĝa feliĉegulo.

Ne demandu kie, nek kiun tagon li naskiĝis.

Same kiel la plej multo da estaĵoj, kiuj alvenas en la mondon kun vunditaj kapabloj, kaj plie, vinditaj per kvar mizeraj tukoj, tute neeble estas scii, el kie li venis, kiun tagon li venis, kaj kiuj estis liaj gepatroj.

Pieje vi trovos en la registrolibro, ke oni baptis infanon, ke li malaperis tra la preĝista portalo, preskaŭ sen baptopatroj, sekvantaro, heleco, nek gajeco, kaj ke ĵus elirinte, li malaperiĝis el la hommenso.

La gepatroj trovis sur siaj brakoj kreskaĵon, kiu naskiĝis malsana, kreskaĵon sen floro, sen rido, sen tiu belega gajeco per kiu la infanoj malfermas la okulojn al la vivo, kaj etendas la braketojn por ĉirkaŭpremi ĝin, sen tiu mistera dezirego koni la lumon, kiun li vidas, diveni kion ili ne scias, lerni tiun nomon, kiun ili aŭdas. Tiu malsana plantaĵo, kreskas same kiel la aliaj; sed ĝi kreskas seka, senakva kaj senkolora, iam la gepatroj malaperas, el la terpoto kie ĝi mamnutriĝas falas sur la straton, kaj la homoj, tie ĝin trovas.

De post tiu horo, neniu scias kiel li kreskas kaj enradikiĝas: li laboras, almozpetas, vivas per panmolaĵetoj, kaj kvankam la korpo vastiĝas, la kipo restas dormemiĝinta pro intelektomanko.

De tiu horo la kroma estaĵo, la kompatinda frukto sen matureco, nek gajeco, iom post iom viriĝas kaj ekfariĝas infano. De tiu horo estaĵo, kiun neniu konas, fariĝas amiko de ĉiuj pro sia sendesa elmontrado al rigardo de la kunvivantaro, kaj de tiu horo, la vilaĝo enhavas la plantaĵon kiu kreskas kaj arbiĝas, fariĝanta vilaĝa silueto, same kiel platano de la placo, vilaĝa sonorilejo, aŭ la cipreso de la tombejo.

Neniu scias el kie li devenas, sed ĉiuj konas lin; neniu scias kiam da jaroj li travivis, sed ĉiuj parkere lin scias. Li estas kvazaŭ vilaĝa peco, voĉo de la vilaĝo mem, morta figuro, kiu mankas en la fono de la konata pejzaĝo; viva peceto de la vilaĝo, kiel la voĉo de la amika sonorilo pri kiu ni ne atentis kiam ĝi sonoras, sed kiun ni sopiras, ĉiam ĝi silentas.

Tiu feliĉegula rido; tiu maŝina rido, kiun oni liberigis, kaj resonas senbridigita, tiu rido, kiu ne gorgoreterpasas skuante lian bruston densa, kiel malfermita arbetoĵo, kvankam jam mortinta, ŝajnas ankoraŭ respondi en la blankaj stratoj de la vilaĝo; tiu malluma figuro, ridin-

da kaj kompatinda, gaja kaj malgaja, samtempe gracia kaj kuntirita, ŝajnas ke ĝi devas trairi ĉiun angulon de la vilaĝo, aŭ ke ni devas ĝin trovi sub blankigitaj portikoj, kuntirita kvazaŭ bulo sub la postlasaĵoj, kiuj kovras lian ostaron; tiu kanto lernita pro instinto de rutino, kiel stranga birdaĉa kanto, kaj ekkantita kun suprenlevita mano, ŝajnas ke ni devas ĝin aŭdi ĉe ĉiu, de ni, farita paŝo; kaj tio estas, ĉar la kompatinda figuro, estas ombro konata, kiu nin konsolas, kiam ni komparas lian mizeron, ĝi estas senkonscia gajejo infektante lian ridon, korpo mondrairante ne okupante lekton, nek lasante ombron sur ĝi.

Feliĉegaj tiuj, kiuj ploras, sed feliĉegaj ankaŭ tiuj, kiuj ridas, ne sciante kial ili ridas! Se la feliĉegulo, pro ia nekonata volo, subite fariĝus klera, vidante sian vivon, li mortus pro malgajejo, pensante, kio estis estinta lia granda malfeliĉo, malgraŭ ke li nenion sciis pri ĝi. De post la infaneco, malgraŭ lia senkonscio, kvankam mankas al li la intelekta lumo, la bivrantaj delikatecoj de la nervaj fibraj, kaj la mistera horloĝo, kiu atentigas pri saĝeco; malgraŭ ke li estas senigita de tio, kion oni nomas «homrajtoj» li estis devigita plenumi devojn, kiujn neniu povas eviti. Li devis batali kontraŭ la vivo de instinktoj petante de ĝi por sia korpo, la deziregon kaj soifon de la vivo; li devis vidi sian frunton idemalplenan, sed malsekan pro la laborŝvito; li devis anstataŭi per kompatito, kion li ne povis trafi per sia limigita intelekto; fine, li devis nutri tiun korpon, kiun li trenis sur la teron, kvazaŭ ŝipo en mallum: ŝo, marvojirante sen kompasoj nek steloj sur maro, sen marbordoj.

Feliĉe por li, la surdaj lin gvidantaj instinktoj, ne estas malbonaj. La malboneco ne trafis eniri en tiujn fermitajn pordojn; kaj la bono enradikas ĉe tiuj kompatindaj postlasaĵoj, same kiel floro en la muroj de ruinoj. La ventegoj de la vivo, ne malbonigis lian koron, kaj li havas ĝin pura kaj sen makula, same kiel la tago de lia naskiĝo; la malbono haltas protektita de la nenionsciado, kaj tiu kompatindega korpo entenis virgan animon. Kiel ja estus preferinde esti inteleksurda, anstataŭ aŭdi la malgajan muzikon de la venenaj pasioj filtrantaj en la koro de la homo!

La nura spiritualismo, kiun sentas la vilaĝa feliĉegulo, estas la mizera silueto: li ĝin sentas kiam li sonĝas. Tie, dormante sur pajlo, la plafonaj araneaĵoj ŝajnas al li silkoj kurtenoj; la ĉistala malluneco, palaco el ĥimera riĉeco; la sur lin trakurantaj ratoj, blankaj animoj karesantaj lian dormon, ekvekiĝantaj ĉe la dormantaj ĉeloj, lumetaj malmulte lumbhavaj, kiuj vapore ekflugas kaj samtempe tiklas al li la animon.

Kompatinda feliĉegulo! Ne estante eble por li sonĝi dum la tago, ne povante movigi la duonestingitajn interncindrojn, neniam trafante la ekbruligon de la sankta fajro de l'ideo, li petas de la vinvapor, ke ĝi movigu en lia cerbo, la ekdormecon de la fibroj.

Li petas vinon, vinon ĉiuhore, vinon por atente kurigi la maŝinon de tiu rido, kiu neniam preterpasas la gorĝon de tiu senviva rido, de tiu rido de sufokanta viro, de tiu rido de rustaŝplenaj ĉarniroj, sen konsolo, nek gajeco.

Subtenanta sin pro kutimo, oni vidas lin vagi perdita kiel ŝipperulo, ŝippereinta en seka tero; oni vidas lin monologi parkere marŝanta, oni vidas lin maljuna kaj perdita ŝercanta la lastan ripozon, ĝis kiam en unu tagon li kuntiriĝis sub la suno, kaj tiu senflora kreskaĵo mortas, kvazaŭ sekiĝinta folio.

Eble li vivas feliĉa! Eble li elvokas pli da simpatio, ol li mem povas senti! Eble ne sentas la morton, estaĵo, kiu ne sentas la vivon!

Same kiel Greklanda viro antaŭvidis ĉielon nubeplenen kun ĉiuj dioj de l'Olimpo kronantaj la mortulojn; same kiel viro el Arabujo vidis la ĉielon de la Huris'oj, la ĉielon, kiun la feliĉegulo antaŭvidas, estas grandega drinkejo, kie la vinberbranĉoj ombrigas ĉiujn homojn.

Kompatinda frenezulo! Same kiel kelkaj korhavaj homoj, nur sonĝante li ĉesas ridi, kaj nur la ploro de la morto resanigos tiun animeton.

Lumo eterna

Se esti blinda, estas unu el plej maldolĉa turmento de la multaj vivoturmentoj, ĉiam vidi, estus ankaŭ ne elporteble.

Fermi la okulojn, kaj vidi helecon; ekdormiĝi kaj senti senfinan brilegon; sin enfermi en mallumaĵon kaj vidi lumon ĉiuhore; persekuti la malhelecon kaj eĉ dum momento ne trovi ĝin; serĉi ripozon por la rigardo, la silenton por la vido, kaj suferi pro blindiĝo dum la daŭro de la ekzistado, sen paca oazo, sen kvanto da mallumeco, nek ripozo por la kompatiuda animo, tio estus Danta turmento.

La deziro vidi sonĝante, vidi la viziojn, kiujn nur kuraĝas aperi meze de la konfuzaj limboj, la deziro pensbalanciĝi meze de la nebulaj esperoj, kiuj malaperas en la heleco; la deziro spiri la aromon de la misteraj floroj, kiujn entenas la fantazio meze de la nevideblaj faldoj; malkoni la viol-kaj nigrbluajn nuancojn; senĉese okulsuferi

pro blindigo de la lumo senkonsolo, estus morti en vivo pro blindiganta asfiksio.

La pro tio suferantoj, fanĝus je Idealo: anstataŭ belega lumo post la morto, ili senpacience atendus Idealon de mallumaj fejoj.

Lumo malvarma

Nokte, irante domon, tra irante mallarĝajn stratojn, en tiu soleca horo, kiam oni nur aŭdas la tinton de Slosiloj de la preterpasanta observogardisto, la veturilon de kuracisto, la akraŝonan manfrapadon de apud pordosojlo staranta viro, aŭ ian balkonon avidan vorton alvokante la noktogardiston; en tiu kvietaj horo, kiam la paŝoj sur la ŝtonoj sonoras interne de la malplenaĵo de subtera urbo; en tiu horo, kiam duone dormante oni iras hejmen; se ĉkaze oni rigardas supren, kaj tie en la fermitaj balkonoj de la tieaj altaj lastaj etaĝoj, kie la loĝantoj ne parolkunvenas, oni vidas flavovitrojn pro interna lumo, «Tie devas esti malsanulo», oni pensas, kaj rigardas dum momento, tiun tiel flavan lumon.

De tiam, reirante domon, ĉiunokte oni rigardas tiun balkonon; tra irante oni ĝin rigardas; kaj dum oni vidas ĝin lumigatan, oni antaŭvidas, ke tie, oni pasigas korpremajn horojn, noktojn el tiuj dum kiuj neniam ĉktagiĝas, noktojn kiam la horloĝo ne rapidas; kaj kiam tra irante, oni vidas la lumon estingita, oni pensas: «Ĉu eble jam mortis aŭ resaniĝis, la malsanulo de la fenestro».

Kaj tio ĉkzas ĉar estas belecoj kiuj sciigas pri malsano; lumetoj kiuj ĉklumigas aŭ estingiĝas laŭ la febrotakto; lumoj, kiuj ne sufiĉe aŭ tro lumigas; tremantaj lumoj, kiuj ŝajnas atendi la morton por subite eatingiĝi; lumoj de lastaj etaĝoj de mizera flaveco; senmeĉaj lumetoj, kiuj nur vitronebuligas; verdaj lumoj de agonio, sen cindrovarmo nek konsolo, kaj malvarmaj kiel luna kiso.

Ĉambreto kun brulanta lumo dum la malfruaj horoj de la nokto, ĉagrenas la koron, same kiel granda apartamento en plena mallumo.

Estingita lumo

Antaŭ la balkono kie mi loĝis estis unu el tiuj lumoj.

Ĝi estis petrola surtabla lampo, kiun oni vidis post la kurteroj; surtabla lampo kun verda lumŝirmilo; surtabla lampo lumiganta saloneton, tablon, junan kaj blndan kudrantan virinon, kaj infanon pli blndan, ol ŝi, kiu gaje kuras kaj iom post iom iras al ŝi, por akcepti kareson.

Ĉiutage, ĉirkaŭ la oka, la surtabla lumo lumigis junan viron kiu alvenas, kisas kaj ludas kun la ambaŭ; ŝi alportis la vespermanĝaĵojn kaj la trio vivas, poste ili hejtis kamenon, kune alproksimiĝas al ĝi, kaj pli rapide la surtablo lampo ĉesas lumigi, ol la trio esti feliĉaj.

Unu tagon mi vidis ĝin malpli lumigantan, kaj nur estis du.

Alian tagon, oni malaltigis la meĉon, kaj oni ĝin elportis kaj enportis en la apudan ĉambron.

La sekvantan tagon, ĝi lumigis la tutan nekton.

La tagon poste ĝi malmulte lumigis, kaj oni fermis la fenestrajn kavrilojn.

Pasis kelke da tagoj, kaj nur tra la fendoj, oni vidis de tempo al tempo, helfendaĵon, el tiu nebulita heleco, el tiu flava lumo, malvarma kiel luna kiso.

La sekvantan tagon, la balkono estis plenlarĝe malfermita.

— Ĉio serhoma.

Tiu malfermita balkono fajnis morta buŝo el kie estus foririnta la heleco. La hejmo malvarmigita, la lito malordemetita; la geedzoj irintaj plori mi ne scias kien, kaj sur tiu tablo, sola kaj malpurigita per polvo, oni vidas la surtablan lumon estingiganta, elfeŝanta fajrolumetojn el teruriganta blankeco.

Nokta

Mi amuzis min kunigante per la fortepiano kantojn kaj notojn, kiujn mi mem akŝkultis, unue ĉar mi estas sola, kaj poste por ne tedi la aliajn.

Kiel eble mi sekvis, kion diris al mi la muziko, kaj dume en la salono ekmalheliĝas.

Tiel malheliĝis, ke noktiĝis pli rapide, ol sin movis miaj pezaj manoj.

Mi estis en malheleco.

Kaj kial mi nenion vidas, malgraŭ ke mi havas la muzikpapirojn kaj la klavaron malfermitajn, malgraŭ ke la kordaj estas en ĝia internaĵo, kaj mi havas la fingrojn por ludi, kaj la orelo por ilin sekvi, mi devis fermi la fortepianon, ĉar mi povas nenion vidi.

Ĝus ferminte ĝin, mi pensis, vundita per la melankolio de tiu revema horo: kiom, kaj kiom da fojoj, sentante la arton tre proksime, havante ĝin kiu atendas antaŭ ni, sentante la elspiraĵon de ĝiaj lipoj, kiuj alproksimiĝas al niaj lipoj, kaj ĝiajn brakojn por ilin premi, ni ne povas ĝui ĝiajn kisojn, ĉar ni restas en la mallumo!

Se oni povus havi la helecon!

Bruoj de kvieteco

La saloneto kie mi skribis estis turnita al la maro je unu flanko, kaj al dezerta strato de la alia. Estis vespere, mi estis sola, kaj la kvar-talo estis sen homa: ŝajnas do, ke la plej absoluta kvieteco, kaj plej solena silentado devas ĉirkaŭi min.

Tiel estus okazinte, se mi ne estus aŭdinte apud mi, la misterajn voĉojn de la neparolantaj aĵoj; la senvoĉajn voĉojn, la kvietajn bruojn, kiujn oni aŭdas, kiam ĉio silentas.

Unue estas la maro kiu parolis: je ĉiu alvenanta ondo, frapante sur la rokojn, ĝi faras tiujn ŝaŭmajn bruojn, tiun akvan spruĝigadon, tiun interakordan ritmon, kiu direktas la takton de la malgajeco; poste estas la vento kiu trairante murmuris, ĝi siblis kvazaŭ longflugila hirundo, kaj alpuŝante la foliojn, oni aŭdas kvazaŭtuŝon de sekaj ostoj preterpasantaj stratantaŭen; poste grandan senbrilan eksplodantan ondon, kaj pli malproksime la venton, kiu forkuras mondantaŭen, siblante per maltrankvila plendo.

Dum la kvietaj momentoj, oni aŭdis la gutojn de la akvoĵetilo tintante per rava tintado: dring, dring, dring, jen unu, kaj unu pli, kaj aliaj takte falantaj per dolĉega ritmo, kaj harmoniĝantaj vualitaj kun la tik-tako de la horloĝo; kelkfoje la pordoknarado ŝiris tiun silenton; poste malproksime de ĉio, oni aŭdis sonorilon aŭ blekegon, aŭ la mu-

zikpuŝon de ia erarinta *gardo*; kaj kiam la murhorloĝo kvankam mallaŭte batis iun *horon*, ĝi bruege resonis.

Ĝi resonis, kaj la salonoj disigis la eĥojn, kaj ree oni aŭdis la gutojn, unu post la alia, klarajn, malgajegajn, bruantajn, tute kvazaŭ larmbruoj; kaj la koro, duone ekdormigante, estus preferinte multe pli kriojn da ebriaj najbaroj, infanridojn, kaj bruegadojn de fortepianoj, ol tiujn voĉojn de kvieteco, kaj tiujn bruojn, kiuj ne estis tio.

Griza sentaĵo

Tie, en ruinoj de katalunlanda kastelaĉo frenezulino, de longe sin kaŝis.

Neniu sciis kiu ŝi estas, el kie ŝi venis, kial ŝi vivas en la kastelo, nek kiaj estas la motivoj de ŝia frenezo.

Nur tie vespere, kiam ventis kaj la vento siblis kiel furioza serpento, traitante la fendojn de la altfieraj ruinoj, de la senkadraj fenestregoj kaj de la mallumaj arkaĵoj, oni aŭdis ŝin bleki per teruriganta aj, agla aj, longedaŭra kiel ploro de pantero, kaj malgaja kiel agoniekkrio, makabra viglakrio, kiun la vento resonigis sub la malplenaj muroj.

La popolo scias, ke ŝia stranga manio estas ke oni ne vidu ŝin, kaj nenion plu ili scias; kaj la najbaroj de la domaroj kompatintaj tiun frenezulinon, lasis sur herbon nutraĵon por ŝi, kaj nokte ŝi eliris, kaptis kion ŝi trovas, kaj iris denove sin kaŝi.

Por trafi vidi ŝin, kaj viziti la kastelaĉon, unu posttagmezon, mi tien supreniris.

Estis aŭtuna plennuba posttagmezo, griza kiel cindra mantelo, malvarma kaj malgaja, kaj renversita de la vento, kiu krakigas la branĉojn, skuas la lianon, kriegas la lignaĵojn, kaj tremigas la murojn.

Mi eniris tra truo, kiu iam estis la pordo el kie elbordiĝis ŝtonoj ruinigante la kastelon, kiu rulfalis al abismo; mi trovis malgrandan korton muskmalsekan, cisternon en la mezo kvazaŭ buŝo de tiu korto malfermita montmalsupren; grandan turon kun malliberejoj ruboplenaj, kie meze de malmulta heleco kreskadis strangaj floroj, arbaraj figuoj, bluaj kardoj, branĉetoj de flavaj floroj maldikaj kaj malsanaj pro senluma vivado, utilante kiel lito por la drakoj kaj kaŝejo de lacer-tetoj; mi trairis plataĵon plenan de tiu herbo, de tiu malseka freŝeco,

kaj lakita liano, kiu nur kreskas en tombejoj; kaj suprenirante per ŝtuparo, mi alvenis al sonorilejo.

Vesperigis. La suno transiris la montaron lasante la malvarmajn ruinojn de viciĝolora grizaĵo; kaj forirante, la vento pli forte siblis, ĉiam pli forte; kaj tiuj senplafonaj ĉambroj vidataj de supre, ŝajnis amaso da malplenaj ĉerkoj sonante kaj ripetante la plendojn de la aero unu post la alia:

Oni vidas nenium.

Sube, la dorson de la preĝejo; pli malproksime, la fidelfuran turon, supren malsupren fendiginte; la herbebenajon kiu formis la tombejon; la platŝtonojn de la korto, la faŭkon de la cisterno kaj ĉie truojn kaj dornabetaĵojn; ĉie Liantavolon, ĉie solecon kaj ne vivantan animon en la tuta ebenaĵo de la ruinoj.

Noktiĝas. La mallumaj aroj da nuboj foriras, la nigra gazo malsupreniras, kaj tiuj misteraj bruoj, tiuj nizaj ek-krioj, tiuj strigaj pepadoj, kaj tiu iom post iom ploranta voĉo kvazaŭ vespera horloĝo, plenigis min de melankolio, teruro, kaj elspiraĵoj de malĝajeco.

Mi malsupreniris.

Mi malsupreniris, kaj alveninte al malheleco de tiu malvasta ŝtuparaĉo, flugilekbato kaj pluma takto, kvazaŭtuŝis mian vizaĝon; kaj longedaŭra teruriganta kriego rulglitis la ŝtupojn, resonante en la arkaĵo.

Mi eliris al la korto, kaj alveninte apud la cisterno, mi faras ekkriion por voki min mem, kaj tiu krio respondita de la cisterno fariĝis harmo-nigita ĥoro, plenvoĉa ĥoro, mistera himno, kiu ŝajnis al mi preĝo de monaĥoj, kiuj vicordigitaj kaj mortanoncaj, sub nigra kapuĉo, malsupreniris suben, ĉiam suben, funde de subteraĵoj, de profundaj subteraĵoj alkondukantaj al malsaj malliberejoj, al nigraj kavernoj, kie ili eniĝas kantante per tiuj enterigaj voĉoj, kiuj stompigis ĉiam malsuprenirantaj ĝis la koro de mallumaĵo de tiu funebrvestita faŭko.

Mi rigardis internen.

Mi rigardis, kaj meze de la ŝlimo de malklara akvo, ĉirkaŭita de stakoktetoj, kreskaĵoj, travideblaj ruboj, ŝvelintaj punktoj sin movantaj en akvo per la vosto, tie en anguleto, senmova sur la koto, kun duonfermitaj okuloj, kaj elfetante aervez ketojn per la okuloj, ŝajnas al mi ke mi vidas grizan fiŝon, kiu envolvita kaj dormanta, ripezis de post centjaroj.

Fine mi jam foriras, kiam antaŭ ol trairi la pordon ekra kaj dolora ekkrio, senespera bleko longedaŭra kiel pantera ploro, kaj mal-

la serĉon, kiun tie ni intencis enlokigi: modesta, protektita kaj travitigita, akriĝita pro frotado de aliaj ŝercoj kaj nuancigita per ruĝa vino, kaj fumo de malkara cigaro. La muroj estas pentritaj per maledukita kaj senhonta flavkoloro, kun disemitaj simetriaĵoj, tranĉejo da akvomelono, kaj granato meze de la kornicplataĵoj; pendantaj, estis unu kromo el la luksaj, litografio de du fremdaj sanktuloj, kaj kalendaro, kies paĝojn oni forgesis elŝiri; angula ŝranko plena je neŭtilaj objektoj, kiujn ĉiam oni enmetas en tiuj ĉi starantaj mebloj; mateto, vico da seĝoj atendantaj la grandegan ŝercon; kaj en la antaŭparto meblito tegita per bilarda drapo, kun vitrbalono kiu kuŝas sur ĝi, kaj enfermante ruĝan fiŝeton kiu rondiras la fiŝujon, kaj eltiras ekstere la buŝegon iom post iom, por enspiri iomete, kaj ree rondiri tiun akvan taseton.

Ni sidis mezan antaŭ tableto provizita per la tuta elspezita trinkado, kiu naĝis en plifortigitaj glasoj, kiel aŭtaŭvido de kia ajn okazintaĵo, kaj ni ne sentis ja tiun vivigon, kiu aŭtaŭas la sinceran gajecon.

Ni parolas, sed parolas pri aferoj el ridinda seriozeco ilin utilante kiel enkonduko de nia estonta agmaniero: ŝajnis ke ni etaĝeraris kaj, ke ni estas en kazina salono de iu katalunlanda vilaĝeto, priparolante niajn aferojn, kaj diskutante pri niaj kaprompiloj; nia kapo estis tute malproksima de la *juerga*; distritaj kaj parolvojaĝante, ni ĝuis unu el tuj letargioj, kiuj eble estas la nekonscia sopiro el koramataj aferoj, kiam ni aŭdas bruon funde de la ŝtuparo, kaj alproksimiĝanta andaluza paroladeto, malaperigas nian revadon.

Ili ĵus alvenis: tri *flamenques*, kaj gitaristo; la trankvileco finiĝis jam en tiu ĉambro.

Ha karuloj miaj! kia kvanto da logbukloj! Kiom da floroj sur tiuj kapoj plenaj de harglatigaĵoj! Kia kolorsenhonteco en la vestoj, kie mordis reciproke la ruĝkoloroj la verdajn, la flavajn la violajn, kaj kia belsinteno kaj korpomovado! Tio estis ekatolo de sekvimberoj enirante per toreadorara paŝo. La kvaroj estas kolorhavaj, broditaj, flamfetaĵaj kaj belsintenaj, subite ili blindigas, kvazaŭ sunradio falanta sur plena vizaĝo, sed antaŭscianta la vidon pri tiu perfida apero, la impresiĝo malgrandiĝis multe.

Unu el ili estas dikaĉa kaj vasta, kun blanka ŝmirita vizaĝo dro-nante la suban brunan koloron; la brovoj estas nigraj, kaj sekvis la desegnaĵon de survangaj platigitaj bukloj; la buŝo korforma, sed koro malfermita por ĉiuj kompatoj, kaj nigraj okuloj same kiel la aliaj; la dua kompatinda! estas malbela: nazeto nenova, buŝo hazarde tie

lokita, kaj rigardo jam mortinta pro nigreco; la tria kvankam ne estas belulino, havas malgrasan kaj kurbiĝantan talion, kaj sin movis per gestoj el eleganta senartifiko; kavaj okuloj sub kaverno, kaj ia malsana sinteno, kiu ŝtelis simpation. Kaj koncerne al gitaristo de la bando, li estas korka homo: tiu de supre malsupren razita vizaĝo maskita per la brilhava *pan y toros* (1) ornamita per komunaj pecoj, estis vizaĝo, kiu neniam ridas, neniam ĝi sin ornamis per esprima ombro certigante posedi internan animon, neniam ĝi montris spiritan vivsulkon. Li estas, kion mi scias! el difinitiva seriozeco, glacigita seriozeco, el sekoitaj nervoj, el malvarmiganta modelilo, el kartoniĝinta metalfadena masko, el kvazaŭhomo movante la brakojn por paroligi la gitaron.

Kvarope ordigitaj en tiu vico de antaŭ aranĝitaj seĝoj, ni nin trovis tute antaŭ ili, ilin rigardante kaj atendante ian ridindaĵon, kaj ili atentante pri nia komencsignalon.

Ni ĉiuj silentis. Tio similis al ceremonia domo. Fremda aero kuris inter la tablo kaj la seĝoj, la ombro de la malhelpo, kiu faras ke ĉu pro unu, ĉu pro la alia, la serco embarasiĝis, antaŭ ol naskiĝi.

Por rompi tiun Andaluzion glacion, ni proponis al ili trinkglaseton, kiun ili trinkis per nura engluto, kaj tre seriozaj ili reiris sidiĝi. La afero komencis fariĝi spirita: ŝajnis ke ni plenumis ian strangan promeson, ĉiuj rigidaj nin rigardante reciproke, kvazaŭ scivolemaj birdaĉoj; kaj ni ne scias ja kiel la afero finiĝus, kiam subite kvazaŭ ili estus sin okuluminte, ekkomencis tia manplat—kaj piedfrapado, ke oni vidas ke tio ja estas serioza afero.

Jus aŭdinte tiun laŭtaktan aplaŭdojn, la grasulino de la bando faris ekkrion, malgraŭ ke ŝi nenion antaŭsciis.

Tio estas rabia kanto, la malĝasteco kaj la sep ĉefgravaj pekoj bruegantaj per tiu malrekta buĉo, vigla ekkrio, kiu levigis la okulkavan virinon, dancigante ŝin per enpuŝigo de freneza gajeco.

Oai flanklokis la tablon. Kia brakmovado, kuntiriĝo kaj kia subita turniĝado! Kia fingrotordado kaj korpbalanciĝo, jen sin apogante per la piedfingroj, kun la kapo alta kaj teren okulrigardanta, jen kliniĝante kaj kapinklinante malantaŭen! Kia malgaja rideto el estingiĝanta fajro; kaj kiaj krioj, Dio mia, kiel kriadis tiu virino mastrino de la vastaj logbukloj, sidanta tie en la vico!

Ni ne estus povinte ŝtopi ŝian buŝon eĉ per granda biskvito, nek malgraŭ ke ŝi englutus fiŝoston, ne eĉ se rizerio enirus en ŝia faringo.

(1) La haroj rekte tonditaj kaj platigitaj sur la temploj, kutima hararanĝo uzita de *flamencos*.

Tio ne estis ŝerci: tio estis bruado permesita de la malvarma animo de tiu sensenta gitaristo; tio estis trouzado de voĉo, kaj tio. . estas la trouza rigardado de la danco de tiu malfeliĉa estaĵo, kiu eksufokiĝas, ŝvitplena, flava, ĉiam ridetanta, ĝis kiam ektusanta per profunda tuso, ŝi falas duonmortanta flanken de la kvazaŭhoma gitaristo.

Ni komencis malplezurigi. Tiu kompatinda *flumenca*, kies malfeliĉaj ostoj kliniĝis, kiu avide pumpas per tiu kolorigita buĉo, aeron, kiun ne enhavas tiujn lacajn pulmoj, ornamita per floroj kiuj odoris je katafalko, kaj tiu ridinda homfiguro, serioza kiel *Turka kapo*, malkvietigas nin, ŝi pro simpatio, kaj li, pro antipatia mallogo; sed ni alvenis al la duono de la danco, kaj devas obzervadi kiel ili dancas, ĉar ni interkonsentis por tri horoj da ŝerco.

La dikulino leviĝis, kaj la dua kantas per *aj! aj! aj!* kaj *eso es!* (tio estas) kaj *anda ya!* (iru do) kaj aliaj ekscitiĝoj; kaj la danco de tiu virino se ne distras, almenaŭ ne korpremas: ŝi ŝajnis rulanta barelo, ŝi deziris klini kiel la alia, kaj ne havas ĉarnirojn; ŝi volis moviĝi, kaj movigis la glasojn, la angulan ŝrankon, la kromon, la fiŝon de la taseto, kaj ĉion de la salono, escepte la korkan gitariston, kiu gitargratanta kaj ĉiam gratante ĝin, frapante la plankon, neniam ŝanĝis la piedojn de la sama loko, nun devigante danci la duan, kaj ree la dikan, kaj poste denove la saman, antaŭ ni, kiuj per tiu mieno de Angloj rigardante la kreskajĝardenon, komprenis ke la festo fariĝas senvivo, kaj ni suprenirigis *mansanilla'n* (1) kiel oni kutinas en similaj kompromisaj okazoj. Tio estis reviviĝo. Ni kuraĝis paroli iomete la andaluzian lingvon: ni diris *olé* kelkfoje, ni alfrapis glasojn je la *salud der pueblo granadino y por el señor presidente* (sano de la Granada popolo, kaj de sinjoro prezidanto) kaj tio viviĝis, kiam la gitarista sentaugulo, kiu ne lokŝanĝis por ne difekti la sidon elektitan en la komenco, kaj, kiun ni jam trinkigas kvazaŭ li estus krurligita, faris signalon al la *flamencues*, kaj ili reiris viciĝi sur la sama seĝon, same kiel dresitaj hundidoj; kaj oni daŭrigis la ŝercon malgraŭ nia deziro, ĉar kvankam lacaj, ni ne kuraĝas malŝati ilin. La malgrasa knabino ekscitita de la *mansanilla* vaporo, havas alieciĝitan kolorigon sur tiu antaŭtempa difektita flavpudrumita vizaĝo, subitan ruĝecon pentritan per malversaj koloraj; la okuloj neniam tiel kavaj, brilis multe pli, tie sub ombro de la maliumo; kaj malgraŭ ĉio, kuraĝigita per trompa forto, ŝi volis redanci. Kompatinda velkinta lilio! Ŝi jam tordiĝas kiel salikbranĉeto, kurbiĝas kaj mallaviĝas rigardante per korpremana ĝojeco, aŭ ridetante per neklarigebla malĝojeco. Kom-

1) Manzanilla, andaluzia blanka vino, trinkata en *juergas*.

patinda lilito! Ĝiaj folioj faldis! Laca, spireganta, kaj kortufita, ŝia karpo haltis, ŝi faldis la fingrojn, kiujn ŝi rutine ankoraŭ moviĝas, kaj lasante fali la kapon, kaj subklinante la belegajn brovojn, ŝi fermis tiujn vivokulojn kaj falas sveninte.


Ni ĉiuj alkuras tien. Ni ne scias kiamaniere revivigi ŝin, la gitaristo deflankiĝis, la drinkejmastro supreniris demandante, ĉu ni deziras pli da *manzanilla*, la du amikinoj malbutonumas al ŝi la vestaĵojn por ke pli bone ŝi spiru; kaj post tiuj violaj kolorigoj, post tiu eksplodo de flamfetoj korptukoj, vidiĝas malgraseco kaj nebrila teruriganta flaveco, ostoj subtenante mortan haŭton, eknaskiĝo de vivo mortante antaŭ ol eksplodi, velkinta florbutono, pro la kisoj de la unua roso.

Kia juergal! Eĉ la surtabla lumo malgaja, teda, kaj vivmanka estiĝas iom post iom; kaj interne de duonmalheleco imagu do, kion oni povas vidi: la kompatindan knabinon svenintan ĉirkaŭita de la amikinoj; la gitariston kvazaŭ senviva fantomo, nedistingebla en la ombro, kiu ankoraŭ ne piedmoviĝis; la malplenajn glasojn sur la tablo makuilita; la grizajn murojn malproksimigitaj pro la densa fumo de cigaroj; kaj meze de tiu interna nebulego, pro lumfrapo sur la vitrbalono, la duberuĝan fiŝeton, ĉiam rondirante, sekvante sian senfian vojon interne de sia akva skatolo.

Tiam por revivigi la svenintan, ni plenlarĝe malfermis la fenestron: foriris la fumo serĉante pli sanigajn horizontojn, kaj eniras el ekstere aŭtuma aero, bruo de sekaj folioj elŝiritej de la vento de *Sierra Nevada* (plenneĝa montaro), kraketado de arboj ostoj, ĉagrenanta noktokvieteco, kaj eĉ luna spruĉeto, flaveca angulrigardanta duonluno, kaj hontiganta tiun malsanan surtablan lampon per ĝiaj argintumitaj fajeroj. Dio mia! Kia malgajeco regis ĉe tiu ĉambro! Per rideto resaniĝas la malsanulino, ŝi malfermas la okulojn grandajn kaj timemigitajn, kvazaŭ malfermiĝas la pordoj de ŝia vivo, kaj ni ĉiuj mortante pro malvarmo, kvazaŭ ni estus en vizito, ne priatentante jam ke ni estas tie por ŝerci, aŭskultas la priskribon de suferadoj de tiuj gajaj kaj frenezaj dancistinoj. La dika, ne kutimas danci: ŝi nur dancas pro mizero, kaj precize tiun tagon, ŝi havas infanon tre malsanan, tiel malsanan, ke eble ĝi mortos; la dua ne konas siajn gepatrojn: ŝi ĉeestas la *juergas* kiel metio, portante enfermita interne, la kutimen kvietecon, la glacigitan aeron de deviga bruega vivo, la ekpuŝon de la fatalismo, kiu antaŭenirigas ŝin, kvazaŭ seka folio; kaj la kompatinda malsanulino havas tuson, tiun tuson, kiu difektas al ŝi la metion kvazaŭ pulmmalhelpo, kiu ne gajigas la klientaron, kaj forigas la ŝercemulojn; je ŝia apudaĵo «enuigitaj» pro sufokiĝo kiu ne taŭgas por *juerga*.

Fine, ni finis tiun tedan *juerç'a'n*; kaj malsupreniris la ŝtupojn, dirante al tio, adiaŭ por ĉiam plu.—La gitaristo restis en la drinkaĵo por trinkadi, bone akceptita kaj dorlotita de konuloj, kiuj atendis lin; el ni, jam sub la stelplena ĉielo, kiun ni konas, alvenis al penso landkanto, *ĉ* n parkere ni kantis; dum apud la Alhambro, traŭrante voĵeton da buksoj, kaj laŭroj arabaj lunmakulitaj, la malsanulino foriras apogita ridetante al ni de malproksime, kaj krakigante sub la piedoj, flavan tavoloŝton da sekaj folioj.

VINTRAJ FOLIOJ



La domo en Parizo

La folioj, kiujn ni elŝiris tiujn tagojn, jam duone foriĝintaj el la memoro, estis el vivo bohema.

Mi kunloĝis kun Utrillo (Utriljo) Clarassó (Klarassó) kaj Canudas (Kanudas) en la kvartalo Montmartre'a, en dezerta strato, senelireja strato, herbotapiŝita, lumigita per petrolo, griza kiel zinko, kaj pli nuba kaj nigra, ol la nin ĉirkaŭantaj stratoj.

Oni eniris en la domon, tra brikmortera muro, malpura muro plena de forlasitaj aŝaĵoj, kiujn neniu legis; plena de musk—kaj araneaĵoj, semrestaĵoj, kaj velkitaj kreskaĵoj.

Enirinte, oni trovis ruiniĝinta kokejon; galerion el ĉiaj dimensiaj vitroj, sed ĉiuj difektitaj, paperplenaj kaj flikaŝenhavaj; florvarmejon utilante kiel neĝujo; la malgrandan domon en la fundo, kaj la ĝardenon sur la teretaĝo; kvar arbojn nur ostaj, angulamasegon da herbo plena de ladrestaĵoj, hotelpecetoj, harligaĵoj, ostroŝeloj kaj el ĉio, najbareŝteta aŭ difektita: akvujojn senakvan kaj akvkonduktubojn; lignan benkon sub la *poetika angulo*, kaj kompatindan kreskaĵon, kiu amuziĝis florante, serioza akceptante tiun ĝardenon, kaj ne atentanta pri sezonoj, klimatoj, nek elŝajnoj.

Trairante la ĝardenon oni supreniris du ŝtupojn, enpuŝigis pordon, kaj oni sin trovis en la domo, kiu estis duetaĝa kaj subtegmenta, kun pretendoj de subetaĝo, tegmentaĵo kaj florvarmejo; kaj malgraŭ tio, ni tie malvaste loĝis. La ĉambroj de la unua etaĝo apartenis al tiel malforta individuo, ke kiam oni piedfrapis, tiam tremis la tegmento, kuirejo kaj kokejo; la ŝtuparo estis tiel malvasta, ke oni lernis edukitecon, komplimentante por permesi ke oni povu pasi; la salonoj de la unua etaĝo estis tute komediaj; la balkonaj balustradoj estis altaj ĝis niaj genuoj; la ĉapelo tuŝis la plafonon, la kubutoj ĉiujn flankoj; kaj la malvarmeĉio ĉie regis; la surmuraj tegitaj paperoj permesis ke oni vidu iliajn difektaĵojn; la vitroj ne permesis vidi la difektiĝojn de la mebloj nek la nebulon; la plafonoj estis el pasto, kaj la pordoj neniam plenfermiĝis.

Interne ĝi estis skatolo el maltegitaj tirkesto, kaj plena de araneaĵoj kaj cigarrestaĵoj; el ekstere ĝi similis ŝtonkartona; el malprok-

sime ĝi estis internigita; el proksime estas vera miraklo, ke ĝi ja ne fra-
kase elfalus; sed en la fundo de tiu skatolo, ni konservis tiel kvanton
da iluzioj, kaj tiel kelon da esperoj, ke por nenio malhelpis la neĝoj kaj
pluvoj, la najbaroj kaj fendoj, nek la tuta hompotenco. Tie ni elŝiris la
foliojn atendantaj la morgaŭajn, kaj neniam atentante pri tiuj, kiujn
ni elfetis.

La Regularo

Kion unue ni faris por la domornamado, tio estas kelkajn pliboni-
gojn por gajigi nian enloĝadon. Tiuj ĝardenaj arboj, baldaŭ kom-
prenis ke ili estas luigaj, serĉaj arboj, arboj el provisoro trunko,
sensukaj, senfoliaj, kaj sen konvinkoj; kaj por beligi ilin, ni verd-
koloraj pentris ilin. La oleo trakuris el supre-malsupren, kaj estis
ne unu branĉeto kiu ne montris ŝaluzian tonon, kaj estis vera ple-
zuro tion vidi; de la akvujo ni faris benkon eĉ lianornaminta ĝin,
por ke ĝi simulu malkaran poezion; sur la balkonoj kaj teraszinko ni
knedis, per plenmanoj da koto, kvar nestojn de fremdaj hirundoj;
kaj la domo, tiel griza, blatita, kaj vermborita antaŭe, fariĝis novmas-
kita, montrinda por la vizitantoj, kaj inda akcepti la kvartalan urbes-
tron; kaj fine, por la regado de ni ĉiuj ni aĉetis unuakvalitan amelon,
faris amelpaston kaj afiĝis sur la pordo la jenan regularon:

«Reguletoj kaj domaj ordonoj por la taŭga praktikado de la enlo-
ĝantoj katalunlanddevenaj, en la Montmartre'a kvartalo de la urbo
Pariza.

»En la una monatago de la ĵus komencinta jaro, kiun ni nomas
donacplena 1889^a, sen mandaj notarioj nek ia ajn ĉeestanta scienculo,
ni luprenis tiun ĉi kampdomon. Samtempe ni luis la ĉiam fluantan
akvon, kvankam bedaŭrinde glaciigintan; legomejon nebulsuperver-
ŝita; ŝirmejon kun difektiĝintaj vitroj por la varmigo, kaj bona vivado
de la fremdaj legomoj; bovinejon por se iam ni posedus bovinejn, bovi-
dojn, aŭ aliajn lanbestojn, skvamajn, lardokrustan aŭ kapridajn;
manĝetejon sub la senvinberuja branĉa traŭbo; kaj du etaĝojn kuŝan-
tajn unu sur la alia, kun subtera kelo kaj pajlejo supre je alteco de la
subtegmento; kun hundo kiel aldonajo, naskiĝinta en malproksima
insulo, granda kaj dika, nigra, kaj haroj, haŭto, kaj buŝegmakulita,
kiel pliaĵo al ĝia trankvilanimeco kaj bonhomeco.

»Utilas kiel ornamaĵo de la kampdoma vasteco la jenaj rimarkin-
daj aferoj: unu lito po ĉiu, kun matraco preskaŭ ĉiuj, kaj litkovriletoj
el delikata lano, kun pentritaj floretoj kaj apra ĉasado, luneliro kun

sinjorino Julieto' atendanta sinjoro Romeo', duonmalfermitaj granatoj, kaj tri koloretoj stampitaj sur la ŝtofo. Kuvo por la lesivaĵoj, ĉar ni bone atentis pri pureco; du pluvombreloj kun pluvgutejoj kaj fervergetoj, du vicoj de fervergetoj, kaj tenilo el sovaĝa ŝafo, benko el persika ligno, kiu kvankam kvarkrurhava, oni devas sciigi ke unu el ili estis mallonga, por rajtigi la verecon de tiu ĉi detala inventario. Ni havas en angulaj ŝrankoj, enmetitan fajnecon, kiun ni ne detalas, nek kalkulas, ĉar ĝi estas tre difektigebla aĵo; lumigilon, kiu brulas dum la tago, kaj malbone lumigas nokte; ludkartojn, por ludi la manilon dum la posttagmezaj dimanĉoj, kaj aliaj devigaj festoj; kaj paro de najlitaĵ lignaj piedvestoj por tiuj, kiuj devis iri al urbo por aĉetaĵoj, kaj vendaĵ-provoj.

» Apartenas al kampdomo, lia Moŝto Utrillo (Utriljo) gazetisto de *La Vanguardia* (1) deviga scivolulo ĉe ĉiuj malbonokazoj, disputoj kaj manioj de la najbaroj el Parizo, por raporti pri ili en la ilustrita pergameno, metafadene, per ansera aŭ ŝtala plumo; abituriento, ĥemististo diplomita en aĵiloj kaj ĉefaj lernejoj de ĉi tiu urbo; inĝeniero de vojoj, minoj, kaj superverŝeblaj legomojoj, klera kaj pentrista viro; kaj kvankam iom sennazigiĝa el ekstere, interneplena de vortoj kaj sciencoj zorge elektitaj kaj digestitaj per muelektribriloj, kaj kribriiloj de saĝa klereco.

» Lia Moŝto Henriko Clarassó (Klarassó) marmora, ligna, gipsa, kota, tera, kaj bronza skulptisto; paŝtisto de la antaŭpluvega bestaro, kie mirakle savis sin Noe'o kaj liaj bestparoj; reformisto de la bestoj plenaj de ŝirdentoj kaj skvamoj desegnitaj sur kajeretoj, kiujn la fumantoj bone konas; provizita je l'naskiĝo per bela tenorvoĉo, sed tenora voĉo tre vira por defendi nian patrujon, aĵ! dum la nubplenaj tagoj kaj bruligantaj posttagmanĝoj.

» Lia Moŝto Ramono Canudas (Kanudas) bohemo pruvita, gravuristo de delikatabuloj, plie pentristo kaj ĉizisto, tuberkuloza leŭtenanto: li havas malsanan bruston, kaj vastan koron. Li ne malsparas la rentumojn por ne elspezi la kapitalon; vizaĝo aknoplana, kaj malmulte hara. Li survestas atlasvestaĵojn dum la kvar sezonoj kaj ilin survestus eĉ se ili estus ses. Li bonsonore dormas, kaj ne ronkas, nek malbone parolas pri la amikoj. Li havas lesivpurigitan koron kaj noblan animon.

» Lia Moŝto Santiago Rusiñol, fantaziplena pentristo, kaj malafabla vizaĝo. Korplongulo kaj angulhava ostaro, li pli ŝatas ferrustaĵon,

(1) Antaŭgvardio — Barcelona ĵurnalo.

ol la ovflavon (1). Estas viro kiu kapdolorigas sin pro estintaj kaj estontaj aferoj. Multe da personaj nomas lin modernisto, kaj ĵus dirinte tion, lin riproĉas; sed li estas tre pacienculo, sekvas sian vojon ne priatentante la alnomantojn, sed nur la konsildonantojn, ĉar oni diras ke la saĝaj vortoj manĝigas al la malsanuloj, kaj la farto estas taŭga afero.

» Tial ke oni jam scias kiel multe ni luprenis kaj kiel malgranda aĵo ni estas, ni klarigos la ordaranĝojn.

» Lia Moŝto Miĥaelo zorgos pri kuirejaj aferoj; pretigos la nutraĵon kaj devigos, ke ni estu sanaj. Moŝto Henrico Clarassó patrinzorgos pri ordigo kaj liberigo de la laborejoj kaj butikoj, atentante ke ne okazu enpuŝigoj kaj estu troa laboro, ke la vitroj estu ĉiam puraj algluante, per supo aŭ amelpasto, blankan paperon sur la falontaj pro la naturaj pluvoj aŭ homaj distroj. Aukaŭ li zorgos pri la legomejo ĝin direktanta atente, relokigante la malaperintajn legomojn, ornamante ĝin per kva-zaŭhomaj por forigi la birdojn, viglante atente koncerne la formikon, afison, kaj venenajn parazitajn insektojn, kaj se ĉi tio ne sufiĉus, li kapvestas legomgardistan ĉapon por ektimigo de la bubaro. Li ŝovelos la neĝon alportante ĝin de unu al alia flanko, kiel oni faras ĉie; kaj el la koto li faros skulptaĵojn. Moŝto Ramcno devas zorgi pri la kamenoj. Li hejtigos ĉiujn fornojn, kiujn li trovos, kaj ne povos lignohaki el la fruktaroj de la ĝardeno, bruligi la tri seĝojn, nek la benkon, sed nur karbon, el kia ajn speco. Li ankaŭ ne rajtigos fajrefeti la pentraĵojn kaj verkojn de siaj amikoj. Moŝta Santiago zorgos pri la hejmaj laboroj, aranĝi ĉion ebla, kaj ordoni la lesivaĵojn. Se iu el la loĝantoj dece enamiĝus, li utilos kiel leterskribisto; se iu ne enamiĝas, oni ne perfortos pri tio; kaj se li estas jam enamiĝinta, oni lasos lin kun liaj kaprompfoj.

» Ĉiuj devos plenumi siajn devojn; kaj se in ne sufiĉe tion farus, Nia Sinjoro estu laŭdate».

La Pentrafelmontrejo

La momatoj kiujn ni pasigis en ĉi tiu domo, estis folioj, kiujn oni menoras amspirante: ili estas juncofolioj, kiujn oni turnas ne legante nek konsultante la paĝojn. Je kio povis malhelpi la neĝfalo, se niaj haroj estis nigraj! Kio estis la malvarmo, komparita kun la fajro de la

(1) La verko diras *robell* (rovej) kies Kataluna signifo estas rustaĵo kaj ovflavo.

entuziasmo! Kio signifas ke la nesto estas malgranda, se ĝi havas esperflugilojn!

En tiu nebula angulo, en tiu senherba terapaco, en tiu amaso da lignaĵoj, ladoj, vitroj kaj urtikoj; ni laboradis kun la fido de antaŭeniranto ne atentante la piedpostsignojn. La pentrefelmontrejo alprcksimiĝis, kaj en la kvartalo, kiel la nia angulplena, komenciĝis la febro, tiu korprema febro, kiu okazis, kiam la sendoj alprcksimiĝis. Kie ajn ni rigardis, tie ni vidis akrigi la cerbarmilojn por atingi malgrandan glorpeceton aŭ vunditaj, returneniri.

La pentristlaborejoj, subtegmentoj kaj ĝardenoj, estis abelujoj, kie laboris la abelo, sin batis kontraŭ la materio, se ĉis en la plena aero la sunlumigadojn aŭ la ombrajn malgajsecojn, dubis per senfina maldolĉeco, aŭ ridetis pri sia verko per duonkortuŝitaj okuloj, kaj ĝin subskribante per la rigardo. Ĉie ce la najbareco, oni batalis kontraŭ la suno, pluvo, kaj malvarmo; oni impresangis, oni envieme aŭ admirtaksis, iris de hejmo al hejmo, traitante pliajn urtikojn, lignojn kaj ladpecetojn, por ricevi konsilojn aŭ esperojn, aŭ elreviĝajn timojn, kaj la tiea kvartala laborado estis kvazaŭ malpreciza bruo, ĝerma haladze, kaj superaga skuiĝo por al si eltiri la verkon el interne; kaj ĝin eĵeti al la honto.

Kiom da klopodoj tremis pro tiu brua laborado! Kiom da revoj kaj revoj ili ja reprezentis!

Kiom da, horoj ŝtelitaj al tempo, ripozo kaj hazardo, kaj kiom da elportitaj mizeroj! Enuigis kaj kapturmigis pensi la kvanton da, en tiuj subtegmentaj anguletoj, eluzitaj nervoj, la sango enfalinta en la koron, kaj la disverŝitaj larmoj pro tiu muta batalo kontraŭ ĉio, kontraŭ la enviemo, kontraŭ la surda indiferenteco, kontraŭ la vasta nenionsciado, kontraŭ la kompatinda mizero haltiganta la horlogon de la revoj kontraŭ si mem, kontraŭ aliaj, kaj kontraŭ la nekonitaĵo; per tiu muta batalo, kiu perfide vundas, kaj utiligas dornojn kiel sagojn, kaj elreviĝojn kiel paflegojn; por tiu muta batalo por gajni branĉeton de laŭro, aŭ eron de gloro.

Ĉiuj timis kaj esperis; ĉiuj atendis korpremantaj, la decidon de la Dio Sukceso; ĉiuj suferadis pro dubo; ĉiuj ridis por distri la tremadon, similanta animkvietecon, kiun oni ne povis havi, ĉar alprcksimiĝis la tago de homfarota juĝo, kaj tial maljustaĵplena, ĉiuj suferantaj pro la malpacienca esperado, kalkulante la tagojn kaj horojn; kaj la tremaj penikoj sin movis, la koroj bategis, la avido krekadis, kaj la fortuna ridetis malgaje mirrigardanta, tiom da fervoruloj kapturmentitaj pro siaj ŝanĝemaj kapricoj.

Fine alproksimiĝis la tago de la sendo, la tago adiaŭi la verkon kaj ĝin elŝiri el la laborejo, la veturilo trairis kumportante, pentraĵojn kaj skulptaĵojn, kaj kune kum la pentraĵoj de amikoj oni forportis la niajn.

Kiuj tagoj estis ja tiuj! Kiel malmulte la granda publiko atentis pri kiom da ĉagrenoj kostas al spirito tiuj pecetoj de si mem!

La laborejo, ĉambroj kaj ĝardeno, fariĝis kvazaŭ malplenaĵo; tiuj vivpecetoj naskintaj sub la sama plafono, lulitaj per la penso, revitaj kaj diskutitaj, sekvitaj multafoje per larmoj, kaj fariĝintaj verko per senlimaj klopodoj, plenigis la tutan domon, kiel animo familia, kiel amemaj objektoj, kaj lasis ion ne klarigeblan vidi ke oni ilin forportes, markante kolorpostigojn kvazaŭ tio estus sangpostsigno. Tiuj pentraĵoj, ĵus kiam ili estis sur la strato, tuj montris la difektojn kaŝitajn de la duonhejma lumo; la forportitaj iluzioj ŝagnis stompiĝi je la kurioza personrigardo; kaj nia Montmartre'a kampdomo elmontris la muran malgajecon, la nebulo estis pli malklara, la kameno ne varmigis, kaj ni ĉiuj samtempe silentis, sciante bone kion ni pensas.

Feliĉe la folio estis gaja.

La voĉdonilo estis rozkolora, kaj tin vesperon el la domo eliris tia kriado, tiom da bruego kaj skandalo, tiel kvanto de elekventeco, tiel pluvado da korkŝtopiloj, kaj tiel telerbruego, ke la najbaroj alarmiĝis, kaj la domo iom kliniĝis.

Canudas (Kanudas)

La sekvantaj tagoj estis gajaj: Printempo alproksimiĝis; novaj amikoj alvenis el Hispanujo; eĉ la ĝardeno grandarbo ornamis sin per kelkaj folietoj por pruvi al ni, ke ĝi estas arbo; la musko fariĝis pli verda, meze de la herbo naskiĝis ia floro, kiu etaĝerariĝis, kaj la suno vizitis nin pli ol duonon da horo ĉiutage, alveninte tra fendo ebligita de du tegmentoj.

Sed la bela vetero, kiel ĉiam, mallonge daŭras. La vintro denove alvenis, kaj kun ĝi la neĝfaloj; iam ni ricevis leteron de Canudas sciigante nin koncize, ke li sin trovas en vilaĝeto el la Pariza ĉirkaŭfoj, kie li esputis multe da sango, kaj ke ni iru viziti lin.

Tio ne estas la unuan fojon kiam okazas al li: tie en malriĉa Barcelona butikoj, en malgaja kaj malriĉa angulo, ĉe unu el tiuj internloĝejoj, kie la respeguligo de malvarma kaj malsana lumo, nur alvenas, li akiris la unuan atakon. Tie funde de la ĉambro, post tiuj vitroj-

nenie turnitaj, li pasigis monatojn kaj monatojn, faldita sur la genuoj, ĉiam tusante kaj neniam intermitante la bonhumoraĵojn de ia tre malĝoja gajeco.

Tie estas kie iam li diris: «Mi ambicias cent pesetojn, kaj la postulitan aĝon por eniri en *Hermanitas* (Azilo por maljunuloj).»

Tie ankaŭ ili diris al ni, ke pro manmezuraĵo, li ne vendis pentraĵon, ĉar oni vendis la apudan.

Tie disdonante oficojn por akcepta komitato, li petis nur la oficon almozpeti en la pentrafekspozicio.

Kaj tie estas, kie li plorigis kaj ridigis nin samtempe, per sia malsana gajeco kaj rezignacia fatalo.

Ni iris do, al tiu erarinta vilaĝeto lin serĉi, ni peligis ke li venu kun ni; kaj tial ke en tiu monda angulo ne estis veturiloj, rulita per lanaj korpkvoriloj sur puŝveturilo, ni devis alkonduki lin, ĝis la proksima stacidomo.

Neĝis: paŭze neĝis; neĝis dum la tuta vojirado, kaj la neĝo falis blanka kaj griza kun tiu nebrila kvieteco, kiu malvarmigas la animon; kaj el post la vitroj ni vidis trairi la neĝerojn rapidturniĝantaj kaj spongaj, ŝirmante la ebenajon per blankaĵa mantelo. Kia vojirado Dio mia! Kia teruro tie malproksime, kaj kia malgajeco proksime de ni! Kia malvarmecon sentis nia koro, pensante pri nia amiko, kaj pri la venonta vintro!

Kvar monatojn pasigis la kompatinda malsanulo tie, en malvastega ĉambro de la Muelilo de la *Galette*, kiun ni luprenis forlasante la kompdomon el Montmartre!

Kvar monatojn rigardante tiun blankecon, vidante la grizan pejzaĝon, sen ĉiela rideto, nek tera gajeco; kvar monatojn de nebulo kaŝebratendante momenton de Printempo. Kuntirita apud kameno, li pasigis horojn kaj horojn post la kurtenoj, vidante ĉiam la samon; la muelilan silueton, la Montmartre'an deklivaĵon, kiun la silentemaj enterigoj supreniris sin direktantaj al tombejo, kaj en la fundo, Parizon kun la vasta domebenaĵo, kaj la montojn, de kupoloj. Nur la dimanĉojn la tie supreniranta bala muziko, forigis la unutonecon, kaj tiam li plenlarĝe fermis la fenestrojn, kaj ŝajnis pli gaja, eble por pli bone kaŝi la malgajecon, kiun li sentis funde de la animo.

Por lin vivigi iom pli, la kuracisto receptis por li kaŝterizadon; kaj kiam per blankhejtita ŝtalo, oni vundis lian malgrasan kaj kristostan bruston, por distri lin, ni dancis andaluzian balon, kiu fariĝis makabra, dum la kompatinda Canudas piedbatis, tolerante la operacion kun lipridetoj.

Unu tagon Casas malsaniĝis. Ni devigis lin litrestadi, kaj kiel li bronkitsuferadis, kaj devis trinki medikamentojn samajn al tiuj receptitaj por Canudas, kaj tial ke ili kuŝis en du litoj desigitaj nur per malgranda tablo, ian matenon eltirante nur la brakojn pro timo al la malvarmecco, kiu ravis vidante la kamenon estingitan, ili manprenis la boteleton, kaj plenigante du tasetojn: «Al cia sano...!» ili diris, tostante per la medikamento.

Tiu tosto fariĝis malgajeja, kaj de tiam Canudas havis nur unu penson: vidi la malaperigon de tiu grizaĵo, vidi Printempajn arbojn, kaj aliri al sia lando, jes, kuri al la lando plensunbanita, lumbriiĝi, kaj plenplenigi siajn pulmojn per la aero, kiu mankis al li.

Kun kiom da koramo li vidis tiun Sitges' an (1) maron!

Per kia fido li malfermis la pordojn de la sentoj por enspiri la ventelon de tiu landa anguleto.

Eĉ li resaniĝis dum momento; sed ĝi estis mallongdaŭra momento. Li tuis, tusadis tagon kaj nokton, kaj ian posttagmezon la lasta sangvomado lasis lin sensanga. La tuta vivo kuniĝis en la okuloj. La larmoj rulis sur lin, kaj ankoraŭ iluziĝanta, mortis kun la kutima rideto, estingiĝante iom post iom, ellasante ne unu plendon.

Ni enterigis lin apud la maro, sub plenkreskaj cipresoj, kaj sub fera kruco, kiun ni havis en la ĝardeno de tiu Montmartre'a angulo.

Trairante

Neĝis. Tra granda Parizarterio la popolamaso, liniaranĝita sur la malpuraj kaj glitigaj trotuaroj, rapide marŝis.

Ii pasis marŝantaj unuj post la aliaj, ĉiam antaŭen, silentemaj kaj atentpensemaj, seriozaj aŭ pensemaj, ĉiuj kun interna priokupo, kiu ilin suĉis aŭ ekpulis.

Ĝi estis torentaĵo, nigra serpento ringhomfarita, personrubando kiu glitis sur la giata neĝo, kusanta de unu al la alia arterio flanko.

Vojirante kun la rubando, mi vidis, kvazaŭ nodo, amason da personoj haltintaj antaŭ enirejo, kaj internen rigardantaj.

— Kio okazas?

— Nenio: virino kiu malsatas, — oni diris al mi.

(1) Sitges = Marborda kataluna ĉarma vilaĝeto.

Kaj ili rigardis la virinon, malgrasan kaj malgrandan, kuntiritan kaj malsekan sidantan sur la plataĵo kaj osumanĝeganta.

Kaj ili marŝadis, marŝadis priokupitaj de sia fiksa ideo, vojirantaj straton antaŭen formante ĉenon.

Rapida vizio

En vagonaro veturanta antaŭen, veturas ĥoristoj por konkurso.

Per alia vagonaro, kies direkto estas kontraŭa, vojaĝas bataliono, kiu iras bataladi kontraŭ kugloj kaj morto.

Ĉiuj kantadis.

La ĥoristoj alkurantaj al festo, kantadis ian Gevaert'an Kanton, malgajigan elmigrantan kantaĵon, nordan malvarmaĵon, harmonigitan meze de nebulo.

Kaj la soldatoj, kiujn oni alkondukis por elmiiti, akompanataj per gitaroj kantadis la *jota*'n, suna ekkrio kaj viva ventekblovo.

La du vagonaroj preterpasis unu la alian kvazaŭ du fersagoj: antaŭen unu malantaŭen la alia; la vento fandis la du ĥorojn, harmoniigis kaj kunigis ilin per nura blovado; kaj ili fariĝis du kantoj kun sola plendo, kiu trapasis de unu al alia vagonaro per la misteraj metal-fadenoj, kiujn kunligas la simpatio.

Ricevinte la malgajan muzikon la soldatoj silentiĝis, kvazaŭ vunditaj de nebulo; kaj tiu gaja muziko sufokis al la ĥoristoj ilian kantaĵon, kvazaŭ blindigitaj de malhela suno; kaj la du vagonaroj infektitaj unu de la alia je stranga malgajeco, silentemaj glitadis vojon antaŭen.

La lasta vojaĝo

La vagonaro da malsekulaj kuris, vagonaro da vunditoj alvenintaj el la milito; amasigita karno, difektitaj korpoj, agonitonaj vizaĝoj, kaj kromaj skeletoj kun malfermitaj kaj senmovaj okuloj.

Ili serĉis sian vilaĝan neston, meze de tiuj kiuj preterpasis, por tie trovi malfermitajn brekojn kaj sirman anguleton, kie faldi la kompatingajn flugilojn, klini la kolon, kaj morti.

Ĉiam, kiam tiu vagonaro haltis, kaj pordo malfermiĝis, tiam mal-

supreniras iu vundito, difektita numero, peco da malsana karno malŝatita de la kugloj, kaj li malsupreniras kun esperanta rigardo, plingante siajn pulmojn je vivo, spirante sian vilaĝon, kaj mirante pri la arboj, ŝtonoj, kampara sonorilejo, kaj eĉ la terpotaj nestoj kaj la floroj de la fenestroj: ĉiam, kiam la pordo malfermiĝis, ia kompatinda malsanulo, kiu malsupreniras renkontas du larmajn fontojn, kaj tiu mallarĝa pordo similis momente la pordojn de la Paradizo, sin malfermiĝantaj al la postsojlo, de la koro, havante kiel fonon tiun sonĝon de malgranda kaj kompatinda patruja peceto; ĉiufoje, kiam la vagonaro foriris, tiam ĝi ellasis en la stacio amason da premitaj manoj, kaj kalvarian scenon duone konfuzitan meze de mallumaĵoj.

Kaj la vagonaro ĉiam marŝadis, ĝi marŝadis vojantaŭen kunportante kun si la forĵetaĵojn, ellasante sangan postsignon, kaj nigran rosaĵon je larmoj; ĝi marŝadis noktantaŭen, sin senigante kaj malplenigante iom post iom la mizeron; ĝi trairis ebenaĵojn ĉiuteje pli malpeza; ĝi kuradis malespera kvazaŭ forkurante de si mem, kvazaŭ korporemata kaj rapidanta por sin senigi je tiu ŝarĝo.

Ĉi jam preskaŭ ne estis hospitalo, la lokomotivo jam spiras, ĝi jam elfetis el sia ventro, tiun militan forĵetaĵon, kiam meze de malluma anguleto tegita per kovriloj, restas kuŝanta homa korpo, kiu ne rigardis, vidis, nek serĉis sian vilaĝon.

Tio estis mortinto.

Mortinto iranta en alian novan mondon, mortinto kiu ne malsupreniras kiom ajn ili estos la preterpasintaj vilaĝoj, mortinto enirantan en tunelon, kiu alkondukas al alia vivo, vivo sen militoj, kie regas la paco eterna.

La najbaro

Tiu ĉi folio apartenas al la libro de la vivo de amiko, kaj ĝi estas historia folio.

Mi ne scias kiu diris, ke la domoj similas al la personoj: ea la tere taĝoj, kiuj estas la piedoj de la domoj, loĝas tiuj kiuj marŝas; ĉe la unua etaĝo, kiu estas la ventro, tiuj kiuj sin supersatigas; kaj ĉe la mansardo, kiu estas la kapo de la konstruaĵo, la pensemujoj.

Mi ne diras, ke mia amiko multe pensus, se tio postulas havi tedan mienon, esti serioza kaj apogi la manon sur la frunto; sed malgraŭ ĉio, lia profesio estis pensi.

Li estis muzikverkisto greŝta je poeto; li estis juna, kaj komencis la ellernadon, ĉio estas ĉefaj kaŭzoj por ke li loĝu en pensema mansardo, kaj ke tie li loĝu kun fortepiano, du seĝoj, alumina lavvazo, honora vesthoko por kia ajn okazintaĵo, kameno kun pli da kamentubo, ol da karbo, multe da muzikpaperaĵoj, nenia bankbileto, ligna fenestro provizita je du vitroj (tra kiuj povis vidi Parizlongpeceton tiu, kiu ne suferadas pro kapturniĝo) kaj bona kvanto da gajeco el verda fono kiel tapiŝo, por lia espera elspezo.

La plej malbona afero de tiu glora plataĵeto, estis la najbaroj. Laboristoj, kiuj ĉar ili devis leviĝi tuj kiam la kokoj de la ĉirkaŭaĵoj fus-ekantis *la hoara horon batis, sennube, nube aŭ negante*, aŭ kia ajn estus la vetero, ili ne povis interkonsenti kun la kutima vivo de tiu muzikisto, kiu, ho ve! kio okazas al mi, kio okazas al mi! Tuj kiam li sin sentis inspirata devis elpeli muziknotojn (1) el interne de sia internaĵo, kaj ne per benzino aŭ terebentoleo, sed ilin frotpurigante sur la fortepiano kaj per granda bruegado.

Ian tagon, li debobenumis peceton da inspirado, kaj elirante el kafejo, ĉirkaŭ la deknua nokte, diris al du amikoj:—Venu ĉe mi, ĉar mi deziras ke vi aŭdu mian inspiraĵon.—

Tien ili iris, sidiĝis sur la du seĝoj, kaj post mallonga forteplano ludado: «Pam, pam, pam» oni pugnofrapis la flankan muron.

—Bone la ĉiama afero. Oni jam avertas. Kia dormema personaro! Diablaj najbaroj! — li ekkriis.

— Se tio ĉi ne plaĉas al vi, ĝin lasu! Aŭskulta, kaj tiel vi jam fine kutimos al tio. Hodiaŭ ĉi aŭdos muzikon; kvankam ĉi elkrevu, kvankam oni forigu min el la loĝejo, kvankam...

— Pam, pam.

— Frapu, frapu. Vi ja perdos la paciencon. Ŝajnas al mi, ke tiun ĉi vesperon, ni longe disputados. Ĉu ni ne rajtas, eĉ loĝante en la *altaĵoj* eltiri muzikon el la korpo pro la timo ke ĝi restante interne povu difekti niajn sentojn. Nun mi ludos tion, kion mi diris. Aŭskultu la preludon.

— Pam, pam, pam, pam.

— Silentu mallaboremulo! Ĉu ĉi ne ŝatas kion mi ludas? Bone atendu do,—li diras, premante la pedalon, kaj ludante *kankanon*, verkitan por difekti fortepiano.

— Eble ĉi ŝatos tion ĉi, kaj eble ĉi kutimos ekdormi per delikata muziko.

(1) La verko diras *solfas*, kiu esprimas per kataluna lingvo muziknotoj kaj *makutoj*, pro tio oni parolas pri benzino kaj terebentoleo.

— Pam, pam.

— Helpu min. Ni ĉiuj kune ekkantu. Vi jam vidos, kiel li silentiĝos. Se ni lasas timigi nin, baldaŭ oni foretos nin eĉ el la mansardoj, kaj ni estas devigitaj muzikverki, meze de arbaro, same kiel la dornabetaĵaj birdoj.

— Pam, pam.

— Ni pli forte krii.

— Pam.

— Ankoraŭ pli.

— Pam.

— Ŝajnas ke li jam submetiĝas.

— Silentigu. Li jam silentas, li estas jam submetita. Li komprenis ke ĉio estas neutila, kaj eble li pensis: «Mi dormu, ĉar mi ne trafos mian celon». Aŭ li mansardŝanĝos, aŭ jam estas kutiminta. La homo kutimas al ĉio, kaj vi vidos, kiel li ne frapos plu.

Efektive, li jam neniam frapis plu.

— Ĉu vi neniam aŭdis la lastan nokton? — diris la pordistino al muzikisto.

— Kial?

— Ĉar, ĉu vi scias tiun viron, kiu loĝas en ĉambro apuda al la via? Ni trovis lin mortinta kontraŭ la muro. Se vi estus estinta ĉe vi, eble vi aŭdus lin; sed en la pordistejo, kiel oni povas aŭdi tiujn, kiuj mortas, loĝantaj tiel proksime de la nuboj. Tiajn personojn mi neniam dezirus en la domo.

La amo de la barko

La orientvento plejforte siblis. La tago estis malluma kaj pluva, resaltigante la pluvgutojn kvazaŭ hajleroj. La maro estis cindrokolora, makulita per ruĝmakuloj, dika kaj ektimiga, aliranta la marbordon per grandaj ŝaŭmaj zonoj; antaŭenirantaj, ruivolviĝintaj unu post la aliaj dezirantaj kunigi, kaj rompiĝantaj jam proksimaj de la marbordo, kvazaŭ kastado, etendiĝantaj fine sur la malseka sablo kaj glitigforportantaj sennombrecon da konkoj, algoj, kaj dubeverdaj floroj, deprenitaj el la fundmistera senmakula lito de la mallumeca abismo, kaj senhalte kriantaj, muĝantaj per raŭka voĉo kaj homminacantaj.

Meze de la grizondoj kaj la ŝaŭmaj akvoj, barko sen velo kaj sen

remiloj naĝis preskaŭ rutine, jen suprenirante ondsupraĵon, jen fundirante abismensuĉita, jen grimpante sur la blankan supron kaj lasante konduki sin de la ventfuriozo.

Ĝi alvenis kaj alproksimiĝis de la marbordo kaj jam la ekipaĵo ekvidis kaj ĝuis rigardante sian malproksiman vilaĝeton, ĝiajn envicigitajn domojn etendiĝantajn kiel blanka rubando; kaj ĉiuj vilaĝloĝantaro takte korbatanta pro samtakta emocio, atendis tiujn virojn, plorpetantaj de la ondoj ke ili estu kompatemaj. Oni jam preskaŭ sin ĉirkaŭpremis reciproke, jam la brakoj kaj lipoj malfermiĝis, kiam la vento direktsanĝinte kaj flankresaltigante forigis la barkon, alportis al malsama vojira linio, kaj ĝin enĵetis sur la rokojn.

Ĉiuj brakoj estis tie, ĉiuj okulis tremis, samtempe batis ĉiuj koroj; ĉiuj ĝitis funden de la barko, kunkroĝigantaj eĉ per la ungoj al kuniĝoj kaj fendrandoj; kaj kiam la barko resaltegis sur la ŝaŭmantajn randojn de la rokoj, tiuj maristoj trovis garbon da konataj manoj, kiuj ilin forprenis de la pro furiozo muĝanta maro.

Tiam estis momento, kiam ŝajnis ke la tero ridetas, ke oni forigis ŝtonon kuŝantan sur la brusto de la maristoj, kaj ke la koro plivas-tiĝas.

Ĉiuj estas savitaj. El tiuj maristoj, ĉiu estis familĉirkaŭita, nova vivo estis en ilia internajo, nova heleco de la ĵus naskiĝintoj; ŝajnis kvazaŭ la maro estus farinta donacon al tiuj amasanimoj, redonante al iliaj brakoj, la avidan kaptadon, kiun ĝi estis englutanta, kiun ĝi jam konsideris kvazaŭ sia.

Sed aj! Ĝi redonis al ili la vivon sed forprenis la barkon. Resaltante sur la ŝtonegoj, balancante kvazaŭ forlasita domo, terurigis rigardi ĝin. Je ĉiu nova enpuŝo, saltis spliton al la piedoj de tiuj personoj; je ĉiu resalto ĝi sonoris kvazaŭ morta ĉerko, malplena tombo, premdoloraj bruoj; kiam ĝia antaŭa parto eniĝis en la rokfendojn; tiam la flankoj krakis kvazaŭ ostoj el frakasita persono; ŝajnis ke ĝiaj ripoj tute krakas, ke oni hakas ĝiajn nervojn kaj levillevas ĝian vivon.

Tiuj kompatindaj maristoj ne povis tion rigardi: je ĉiu barkkrio ilia genuoj tremis; je ĉiu marenpuŝiĝo la kruroj moviĝis; ĝis kiam fine, nenion dirante unu al la alia, ne rigardante sin reciproke, puŝitaj per la sama instinkto, pelitaj de la sama veto, ili glitiĝis sur la ŝtonoj, alproksimiĝis al ondoj, atendis unu, kaj alkroĝiĝis al la barko; kaj tiuj ĵus mirakle savitaj homoj, unu post la alia enŝaltis en ĝi, plenlevis la velon, kaj plenvovita kaj krakanta kvazaŭ vipo, surlasis sin marantaŭen, sur tiuj ondoj, kiuj disputis iliajn vivojn.

* * *

Kion faras la amo al hejmo, la amo por tiuj lignaj pecoj, mi kredis.

Sed, ne: la sola kiu ne ensipiĝis, aĵ! estas la posedanto de la barko.

Lasi morti aŭ vivi

Mi estis farinta la kasbilancon antaŭ du tagoj ĉe la firmo kie mi praktikadis.

Mi estis farinta la kasbilancon kaj referante ĝin denove, mi vidas ke mankas ducent duroj.

Tio estis neebla: apenaŭ okazis enspezoj, oni faris malmultajn pagojn, kaj la kalkuloj estis tre mallongaj: neniu eraro estis ebla. Iu estis kasstelinta ducent durojn.

Aliflanke estis neniu alia ŝlosilo, ol la mia kaj tiu de alia komizo, honesta viro, viro plej plenkonfida, kiu administradis milojn kaj milojn da duroj, kaj neniam mankis unu centimo; viro sur kies vizaĝo estis aurskribita la honesteco, kaj en kiu dum la historio de lia vivo ne estis unu folio, kiu ne estus kiel pura akvo.

Tie okazis granda mistero.

Mi nenion diris por ne suspektigi, nek montri malkonfidon; sed tiun strangafon neniel forigis el mia penso. La tempo pasis kaj mi ekkredis ke estis tiu du, kaj tiuj du nuloj, kiuj malaperis anstataŭ la ducent duroj, kaj preskaŭ mi forĝesis tion, kiam unu tagon vidante la komizkasiston, kapapogitan sur la pupitro kun ruĝkolorigitaj okuloj kaj vizaĝekscitita, mi naskis suspekton.

— Io okazas al ĉi — mi diris al li.

— Aĵ! okazas kaj okazis al mi tiel multe da aĵoj, ke mi jam perdis ilian kalkulon, kaj mi kredas ĉe la intelekton.

— La morto de la knabo, ĉu ne vere?

— La morto kaj la cetero. Ĉi ne scias kio estas la redingotmizero.

Gajni same kiel ia teksisto aŭ seruristo kaj dece vesti, pagi naŭ durojn por la ĉiumonata loĝado, sin piedvesti per glazurigitaj ŝuoj, kapvesti edzinon per ĉapo (kvankam domfaritan) kaj fari ŝparojn el la nutrado, ĉar oni ne vidas tion, ilin elspezante por tio, kion oni devas eksteren

montri al honto, kaj mi ne kalkulas la okazantajn malsanojn! Ci ne ĉias kio estas, esti pagonta al la kuracisto kaj apotekisto, kaj ne posedi monon por plenumi tion kaj se ci akceptas *interesemajn* vizitantojn, kaj ke ili rekomendas al ci bonan buljonon, esti devigita atendi ke ili estu foririntaj por ke ili ne vidu la difektitan taseton plena de sennutra suko. Aŭskultu: imagu ke iam, la mortinta infaneto diferencmalsiniĝis, li asfiksiĝis kaj la kuracisto diris ke li devas operacii lin kaj mia edzino rigardis min kvazaŭ diranta, kial mi estis tiel trankvila, kaj mi estis sen ĉe unu centimo por pagi la operacion, la infaneto iom post iom asfiksiĝas, kaj mi ne povis diri el kuracisto, ke mi ne posedis monon, ĉar vidante min redingotvestitan, li ne estus kredinte, ke mi jam ilin pruntedandis kaj ke neniu pruntedonis al mi... Imagu ke la infaneto sufokiĝas ke... «operaciu», mi diris. Kiel ci estus aginta?

— Kiel mi estus aginta? — mi respondis. — Sen iu alia antaŭrimedo, mi estus ŝtelinta ducent durojn, kie ajn mi estus ilin trovinta.

— Kion ci kuraĝas diri! — li diris fiksegardante min.

Kaj dum liaj okuloj pleniĝis je larmoj, kaj premante miajn du manojn, li tiel ilin premis, ke mi neniam forgesos tion.

La atendejo

Tie, antaŭ kie ni loĝis trans la Seno, oni vidis domon tiel mallaltan kaj platigitan, tiel grizan kaj kuntiritan, tiel malsamforman de la aliaj, ke baldaŭ oni divenis ke ĝi estis konstruita por io mallumega.

Nokte, tiu tiel stranglonga tubo terurigis; tiuj sengajeckoloraj kaj dezertaj muroj, tiu manko da fenestroj kvazaŭ fermita skatolo, kaj precipe tiu trema lumeto, kiu neniam estingiĝis; glacigita lumeto, fantomŝipa lumo, administracia lumo rebrileganta funde, sur la glitigaj kaj kotecaj skvoj de la Seno, nokte tiu *Morgue* (mortulejo) estis la plej senhoma tombejo, kiun la homoj iam trovis.

Tie ni ĝin havis antaŭ ni, kiel teruriganta ombro. Dum la grizaj posttagmezoj mi ĝin sentis kaj eĉ suspektis estanta tie; kaj kiam la nebulo kovris la siluetajn de la domoj, meze de la ruĝkoloroeco, kiun la urbo ellasis, tiam ankoraŭ oni vidis la lumeton ĉirkaŭitan de kolorkonturoj, nur la lumeton trapasantan la mallumaĵojn, aŭreolfarantan, kiel okulo meze de malheleco.

Tiu lumeto altiris nin, kiel la surtabla lampo de la morto, ka ne-

niam ni pasis antaŭ tiu atendejo, tiu transtomba stacio, tiu interna tombejo, kiam forto ne ensuĉus nin internen de la ĉambro kaj ke ni ne enirus dum momento por vidi la tie elmetitajn mortintojn.

Tie ili estis. Oni vidis ilin trans la vitroj, kun ia tubo je la flanko, la termometro post ili, kaj la glacimaŝino pli malantaŭe same se la morto ne estiis sufiĉe malvarma. Tie ili estis sternitaj sur zinko, vizaŝrigardantaj la publikon per ruĝkolorigitaj vangoj, la vestaro sur ili, kaj kun granda numero apud la piedoj, krazaŭ tio estus la homprezo, la viktima surskribeto, la lasta rajtiga bileto por eniri en tombejon, aŭ la lasta manekribajo kaj la konformeco, kiun la mondumo liveras por ke oni notu ilin sur la libroj.

Tie ili estis civile klasifikitaj, kaj ĉiuj montris jam ion antaŭsentitan, ion kio dirigis: ĉi tiu viro devis martigi sin, tiun ĉi alia estas falonta en riveron, tiu ne povis vivi; ĉiuj havis la lastan griskoloron, griskoloro simila al violkoloro elpremita de la malklara amaskoloro; la koloron elgutitan per la mizerfiltro; la esencon de la malfeliĉo kaj la mortsenkolorigecon; tie ili estis atendantaj ke almenaŭ oni konu ilin, ke oni sciu kiu ili estas, ke oni ilin malaperigu de la anonimo; ke ili ne estu kvazaŭ numero kun surskribo; kaj la publiko haltis, kaj neniam oni konis ilin, ĉiuj preterpasis, neniu eniris en la domon nek trapasis, tiun de la glacimaŝino, nebulitan vitron, kiu eĉ malvarmugis la morton.

Unu tagon, antaŭ elmontrita junulo, ni vidis maljanulon, kiu lin rigardante, flavigis pli ol la morto, kaj preskaŭ falis teren.

— Ĉu vi lin konas? — demandis al li la gardistoj.

— Mi ne konas lin, — li respondis kortuŝita.

— Ĉu li ne lin konas?

— Eble li estas lia patro, — oni diris al ni, ĵus kiam li foriris.

— Kial do li tion neis?

— Kiu tion scias! — oni respondis al ni — Eble por ne esti devigata deklari, eble pro honto, kaj eble eĉ (ĉar ankaŭ tio okazas) por ne pagi lian enterigon.

Songó nigrokolora

Mi songis ke mi malsupreniris per mallarĝa ŝtuparo, malsupren, ĉiam malsupren.

Estis mallume kaj fingropalpante la murojn, oni sentis malvar-

man kaj molan maisekecon kvazaŭ defluanta koto aŭ musko malpura.

Alveninte funden de subteraĵo cisternsimila, oni vidis strangan kaj verdan helecon, kies devenon oni ne konis.

Komence oni vidis nenion; sed post momento vaksaj figuroj apudigitaj sub arkaĵoj eliris: malgrasa viro krimmortigita apud polvoplena kesto, kun terkuŝanta kandelingo, kaj tranĉilo makulita de sango; pli malproksime ŝnurligita viro, buŝkovrita per makulita poŝtuko, li estis tute violkolora, kaj kun eksplodontaj okuloj; monaĥo mortanta en angulo de izola ĉambreto, du arkaĵpendantaj kapoj, kaj ĉio silenteca, maiseka, verda kaj polvoplena paŝresonanta, kiel en senhava tombo.

Pli malproksime estis granda ĉirkaŭbarilo kun vitro. La vitro estis dika kaj malhela, kaj interne meze de malluma atmosfero oni ne sciis ĉu ĝi estas akva aŭ fuma, oni vidis mortinton fariĝintan vaksofiguro, kiu moviĝis meze de la ombrodikeco. Iom post iom el malsupre liberiĝis aerveziketo, ĝi supreniris, ĝi supreniris malrapide, kaj fariĝis stranga hirudo, el kies buŝo eliris fosforeska lumeto, lumeto sulfura, kiu momentremis kaj tuj estingiĝis. Funde meze de tiu sendecideco oni vidis konkojn okulhavajn sen pupiloj nek vido; kaj la planko farita el verda koto, dismakulita kiel bufa ventro, ŝveliĝis kaj malŝveliĝis.

La mortinto alproksimiĝis al la vitro, apogis sur ĝin blankajn kaj sulkiĝintajn lipojn, la manojn flavmanplatajn, kaj premante vizaĝelirantajn okulojn, preplatigitaj ili restis tie. Li rigardis per maldiligenteco turnante makulitajn pupilojn, kaj reiris funden. Li sternis sin en ĉerkon, releviĝis; kaj paŝante ĉiam malrapide same kiel tiu, kiu marŝas en koto, prenis skatolon por koloroj senkoloraj, kaj ekpentris pentraĵon.

Ĝi estis pentraĵo el teruriga vereco: nuda virino, grasa kaj malsana, flava kaj vastkorpa, kiun oni ne povis rigardi.

Kvazaŭ drakido, hundinmiksita li lekis ŝian bruston kaj vizaĝon, li subskribis *Naturalismon*, kaj reiris en ĉerkon.

Mi fine sonĝis, ke oni pagigis por supreniri kaj vidi tiun arton, ke la vizitantoj oni kalkulis por miloj, kaj ke apud la pordo oni ilin morfinitis.

Rozkolora sonĝo

Mi sonĝis ĉielon.

Ĉiu folitrunketo estis el malsimila nuanco, diferenĉparfuma, kaj kunaj ĉiuj odoris kiel incenso.

Trairis aro da papilioj dorlotante la floron per laflugiloj, kaj la pentrita polvo de la graciaj flugiloj, formis nubon de delikata diafaneco.


Ekfalis la roso de rozkoloraj nuboj, kaj el ĉiu falanta perlo, pro sia pezo, disiĝis folio de la belega krizantemo, kaj ĉiu falinta trunketo fariĝis virinfiguro kun folifaritaj flugiloj.

Kiam la floro estis senfoliĝinta, tiam tiuj flugilhavaj virinoj ekflugis; kaj vidantaj la korolon de la floro kie ili naskiĝis, tiel senigita kaj malgaja, ili ekkomencis pentraĵon por lasi tien relikvon.

Por ĝin pentri, kiam ili trairis, ili donis penikafon per la plumoj de la flugiloj kaj tien forlasis koloron; ree ili venis kaj enmetis parfumon; kaj kiam la korolo pleniĝis, tiu pentraĵo sen fono nek figuroj, fariĝis harmonia fono, kie la animo plezuriĝis.

Modernisto, mi sonĝis ke oni subskribis; kaj mi sonĝis ke la eniro estis senpaga, kaj ke por ĝin vidi neniu eniris tien.

LASTAJ FOLIOJ



Deziro

Se estus permesate al la homo elekti la lokon por sia tombo, la grotaj lagetoj estus la idealo, por ekdormi en ilia fundo.

Tie ĉiam regas paco; tie la malumo estas eterna; tie dormas la beleco ne aŭskuitante la horloĝon; tie estas la plej dezerta loko de la mondo; la sola tiea vivo, estas la akva guto takte falanta ploranta dum jarcentoj kaj jarcentoj, kaj vibrigante la tristalan supraĵon, ĝin plivastigante per rondaĵoj, meze de tiu paco ne konfuzita de la homoj.

Neniam liton tiel puran kaj virgan kreis la Naturo, kiel la delikata tega sablo de l'fundo de la tieaj akvoj; neniam ĝi gardis tombon pli broditan kaj belan; neniam ĝi kreis spegulon, kiu malgraŭ ke ĝi povas reflekti la stelaktitajn arkaĵojn, rigardas per malheleco tiujn mirindaĵojn, pro timo maldiatanigi ĝian haŭton; aĵon neniam ĝi kreis, kiu por ne ĝin malvirvigi, ĝi ĝin ĉirkaŭis per montoj, kaj ĝin fermis per ŝtonegoj, ĉe la koro de l'tero. Hol kiu povus sin enterigi en tiun sablan liton! Kiu povus gliiti kiel akvaguto, kaj de tiam, ĉiam dormi sub la broditaj arkaĵoj! Kiu, kiam la mallumeco alvenus, konscius, ke la ĉirkaŭanta mallumeco, ne estas la vulgara tomba mallumo de la tomboj, kiujn la homoj konstruas, nek skatoio por la ostoj, nek cindra skatoleto, sed reva subtera lageto taŭga por ni kiel mortintvesto, trezoraj vantoj ĉizitaj per mallumaĵoj, kaj ingo kiel tombo! Kiu povus enakviĝi tra la akva spegulo! Kiu fundiranta povus pliigi la akvocirklojn kaj estingiĝi ĉe la fundo! Kiu povus ekuzi, tiun virgan liton, lasante sur ĝin la mortintaĵojn, kiam la spirito ekflugus sekvante sian vojon!

Kontrasto

Unu el la plej gajaj aferoj, kiujn iam mi vidis, estas tombeja cipreso.

Estis du en la tombejo: unu la malgaja cipreso, skeleta cipreso, malgrasa, senkarna, nerva, tiel maljuna kaj malforta, ke kiam la

vento ĝin skuis, ŝajnis kvazaŭ ĝi tremus, kaj kiam pluvis, ke ĝi eĉ ploris; kaj la gaja, densa, atlasvestita, vivplena kaj virga, tute modelita, freŝa, kaj ĉiam verdeplena.

Sed tio, kio ĝin gajigis, estis la amaso da birdetoj sidantaj por dormi sur ĝiaj brakoj, tie ili nestkonstruis kaj vivadis. Ĝi ŝajnis parolanta kaj kantanta arbo meze de tiu kvieteco; najbareca domo proksima al tomboj; lernejo plena de krioj kaj ridegoj.

La tutan tagon la alvenantoj kaj forirantoj, malsupreniris, supreniris, vizitis unu la alian, amindumis kaj bataletis, sin donis reciproke novaĵojn pri kie estis milio kaj ne ĉasistoj, vindis la idetojn, lavis iliajn piedegojn kaj lernigis ilin pri gimnastiko; ridis, ploris kaj parolis pri siaj aferoj; dum la tuta tago ili pinĉis unu la alian, kisis kaj bekbatis; senhalte ili supreniris pajletojn, refaris la kapkusenojn, enmetis la kapon sub la flugilojn, kaj timigis la lacertetojn. Sed kiam ekvesperigis, la babilemuloj supreniris por disputi unu la alian branĉeton, okazis bruego por atingi folisirmilon, estis konfuzigo por posedi alkovon; kaj ĵus kiam ili estis krucsigninte la senplumajn idetojn el la branĉnestoj, la preĝo jam finita, la arbo ekdormiĝis meze de la trakurantaj lumetoj.

Ho arbo gaja! Nenie, ili estis tiel senriskaj kiel en ĉia muska bal-dakeno; nenie tiel respektataj de la homoj, kiel en la tombejo, kaj nenie tiel kontentaj, kiel meze de la homhava paco; ĉiam ili kun ili, ĉiam agante laŭvole, ĉiam plenigante la solecon per festa gajeco: eĉ kiam oni alkondukis mortinton, tiam eliris el la cipreso viva ekflugado.

La krono

La memortago al la mortintoj alproksimiĝis, kaj mi deziris kronon. Mi haltis apud kvazaŭ florvendistina elmontrejo, kiu dum du tagoj torigis la ŝtofajn florojn por florvazoj, la harornamajn bukede-tojn, la papavojn, spikojn kaj lekantojn por ĉapelornamaĵoj, la tonditajn folietojn amas lokitajn kaj herbokolektajn numerojn por saĝaj knabinoj, la brilkolorajn florojn, kiuj devis utili nur dum vespero kaj ĉifigi en orgio; anstataŭ tiu specimeno, tiuj kromofloraj, produkto el sinplanima industrio, plimalkaringante la belecon kaj mokante pri tiuj teraj ekĝemoj, eksplodigo de la koro de la homoj, ŝi plenis la elmontrejon per ĉiuj specoj de kronoj.

Lokitaj laŭ tiu praktika gusto, kiun la negocisto ĉiam uzas por.

allogi la klientaron, memorigaĵojn oni vidis tien por ĉiaj sentoj kaj riĉecoj. Tie estis el porcelano por ke la rememoro al la mortinto, kontraŭbatalu la pluvojn kaj tondrarojn; fajenca kiu ne rompiĝis eljetante ilin teren; aliaj estis ledpaperaj tonditaj per formigilo sentega; aliaj el pentrita papero por dumaj bedaŭroj, kun vitraj gutetoj kvazaŭ ili estus larmoj kaj roso; feraj, la difinitaj por ĝeneralaj sentoj, al la morto de generalo, de prezidanto, masonisto aŭ fajrestingista komandanto; eĉ trikoloretoj pluŝaj estis tie, kun pendanta suba prezo; el ĉiaj tie estis, escepte el naturaj floroj, escepte tiuj, kiujn oni plej ŝatas.

Mi eniris, kaj en la vendejo la malmultvalora vendeja odoro, la administracia aero, malvarmigis la animon. La fadentrapasitaj helikrizoj formante plafanojn, ordigitajn laŭ grandeco kaj prezo, la vitretaj funde de la grandaj ŝrankoj; ĉe la fundo de la salono estis specimena krono, ekspozicia ekzemplero rekompencita ĉe du aŭ tri ĉefurboj; kaj malsupre de ĝi la skatoletoj por rubandoj, enhavantaj la jenajn enskribaĵojn: Skatolo oka: « Al la karaj edzoj ». Skatolo dudeka: « Al la neforgeseblaj gepatroj » Dekvara. « Eterna rememoro ». Dudekdua: « Al la amikoj de l'animo ». Kaj tiamaniere la vendejo plena, kun orkoloraj kaj tonditaj literoj.

Tri sinjorinoj sidis, kaj tre afabla komizo montris al ili, la specimenojn, la komercaĵojn kaj la kvalitojn de l'ekzempleroj.

— Ĉu ĝi estas por via patro? — demandis la komizo.

— Aj, ne, sinjoro! — diris lo plej juna per ekĝemego. — Ĝi estas por mia kompatinda edzo!

— Tiam, mi rekomendas al vi, tiun ĉi grandan, kiu, kiel vi vidas, estas el nigra porcelano.

Ni multe vendas ilin. La markizino Bellmas, ĉiujare aĉetas du samajn.

— Kiom vi opinias? — demandis ŝi, al la aliaj du sinjorinoj.

— Laŭ mi, tre respektplena, — diris unu el ili.

— Kaj vera novaĵo, — diris la alia.

— koncerne novaĵojn — diris la komizo, — nenie oni havas tiel bonajn komercaĵojn. Ni ilin ricevas el la plej famaj fabrikoj. Ili estas maŝinfaritaj, kaj nur pro tio, ni povas ilin cedi je la prezo, kiujn ni ilin vendas. Se vi intencas elspezi malpli, ni havas la saman modelon, sed ĝi ne enhavas tiom da porcelano; kaj ĝin mi ne konsilas al vi: difinita por via edzo ne atentu pri malgranda deferenco, — aldomis, kiel definitiva frazo, kies impreson li jam konis.

Ili aĉetis la kronon; oni malsuprenirigis banton el la skatolo *neforgeseblaj gepatroj*, por vidvinoj de l'unua jaro, ili pagis kaj eliris.

Tuj kiam ili eliris, la komizo vendis unu «eternan rememoron», interparcelis kun du aliaj sinjorinoj, kaj fine sin direktis al bona virino, serioza kaj malgaja, kun violkoloraj difektitaj okuloj pro dolora empuŝigo, kiu jam de longe atendis en angulo de la butikoj.

— Kion vi deziras?

— Kronon.

— Kiel vi ĝin deziras?

— Mi tute ne scias kiel, kompatinda je mi! Laŭ via deziro.

— Ĉu vi deziras elspezi multe?

— Ĉion, kion mi kunportas — ŝi diris, kaj ŝi lasis elfali sur la tabl vendejon kelkajn arĝentajn monerojn, miksitajn kun ŝmiritaj kupraj moneraj.

Tiu afabla komizo, per sia praktika rigardo, donis senriskan rapidan rigardon, kalkulante la pesetojn kaŝitejn sub la amaso de la kupraj moneroj, kaj proksimigis kronon iom pli malkaran, ol la per okuloj, taksita kalkulo.

— Ĉu vi ŝatas tiun ĉi?

Ŝi parkere jesis, kaj ŝiaj okuloj ŝveligis pro larmoj.

— Tiu ĉi estas tre longedaŭra.

— Mi certigas al vi, ke ĝi ja devas esti tia.

Ĝi estas difinita por mia malfeliĉa fileto, — ŝi diris ekplorante. — Kaj eble, ĝi estos la lasta.

Enterigo

Mi sidis en tombejo, vilaĝa tombejo, unu el tiuj tombejoj senigitaj je poezio, malvarma, nek nova nek malnova, senarba, senflora, senmuska, sen sunkiso kisanta la ŝtonojn, sen ia malgranda ombrigita peceto: nur eipreso kun kvar verdaj plumoj pendantaj de supra branĉeto; ebena loko ŝvelinta tie ĉi kaj tie, kvazaŭ haŭtvundo, je virlongeco, kaj kun senkoloriginta kruĉo, elgutanta la surskribon sur la malklara nigrokoloro, kaj kun vico da tomboj, unuj sur la aliaj iom post iom malaperantaj kvazaŭ bretoj de la morto.

Antaŭ tiuj ĉi tomboj mi vidis alveni enterigon: du viroj alportante per brankardo ĉerkon de flavbantoj ornamita, kvadratforma kaj freŝpentrita; poste sekvis virino ĉirkaŭ sesdekjara, funebrvestita kaj malgrasa, kiu devis esti la patrino; junulo tridekjara kun nigra kravato,

kiu devis esti ŝia filo, kaj frato de tiu ĉerkenmetita, kaj neniu pli. Tio estis enterigo de malriĉulo.

Alveninte antaŭ la tomboj la sekvantaro haltis. — Ĉu vi deziras vidi lin? — diris la brankardportisto. Patrino kaj filo reciproke sin rigardis, kaj signis jesante. Oni malfermis la ĉerkon, ili atente rigardis lin kvazaŭ tiu, kiu suĉas figuron kiu devas fariĝi remomoro, kaj eterne daŭri; la virino ekploris, sin apogante kontraŭ sia filo, kaj oni refermis la ĉerkon ber penda seruro.

Dum unu malfermis la ĉerkon la alia viro serĉis la tombon per dokumento, kiun li havis. La numeroj estis malklaraj. Nigraj makuloj defluis tombomalsupren, kaj malfacile oni ilin legis. Nenion restis el la literoj ne eĉ postsignojn; tra ia senmorterastuka kaj verda peceto, oni vidis la brikmalantaŭaĵon, kvazaŭ tio estus flikitaj tomboj, okazaj, kvazaŭ nenovaj.

La masonisto vidante ke li ne povis vidi la numerojn, hazarde, same tiu, kiu ludas al la «aŭ la kapo aŭ la vosto», martelfrapis la fermantan tombomuron pli proksiman, kaj faligis kelkajn brikojn el ĝi.

La tombo estis plena; ĝi enhavis grandan ĉerkon, kaj du mezampleksajn.

Patrino kaj filo rigardis unu la alian kvazaŭ dirante, ĝi ne estas la nia. Ne: interne de ĝi nur povis esti la kompatinda Johano, li estu en la ĉielo, kaj plie li estis entombigita jam de longe.

Tiam la masonisto martelfrapis la apudan kaj alia tabulmuro falis.

Ĝi estis pli malplena ol la unua, sed ankaŭ tiu ĉi ne similis al la ilia. Ĝi enfermis pecojn da ĉerko, forĵetaĵajn mortintaĵojn, supermezurajn relikvojn maltrankviligantajn ilin pro dubo.

—Bone, kion ni devas fari? — diris la masonisto. — Baldaŭ vi devigos ke mi malfermu la tutan tombovicon. Certe devas esti tuin ĉi, ĉar la aliaj havas jam tombŝtonojn!

—Kaj tiuj ĉi? — diris la virino modeste.

—Ili estas plenaj.

—Ĉu vi kredas?

—Mi certigas al vi tion. Plie ĉiuj tomboj samvaloras.

—Tion ni diras, ĉar ni dezirus entombigi la knabon kune kun la patro.—

—Ni tion jam faras. Rigardu, — li diris eksteren eltirante kelkajn ostojn; — ĉi tie estas nur unu kadavro. —

Sendube por ne vidi la mortintaĵojn, la specimenojn, kiujn li montris, ili konvinkigis. La du viroj prenis la mortinton, suprenirigis lin al tombo, kaj vidante la ne pentrita malsupraĵan partan de la ĉerko,

Fragil (facilrompa) diris la knabo, legante surskribon el nigraj literoj faritaj per inkmodelilo.

«*Frdgil*, (facilrompa) kion devas signifi? — ripetis la knabo sin direktante al la pordo akompanita de sia patrino. — Kial oni surskribis *frdgil* (facilrompa)? Kiu povas certigi ke ĝi estis nia tombo, — pensis, rigardante tiujn ornamatajn per tombŝtonoj. Se mi ree tion demandus al masonisto? Sed eble ili jam estas enfermitaj lin».

Ili jam enmetis la brikojn.

Dónde vas con mantón de Manila...

(Kien ci iras kun Manila mantelo)

Kantadis la masonisto fiksante brikon.

...*dónde vas con vestido chiné.*

...kien ci iras kun vesto *chine*...

Alian brikon.

...*á lucirme y á ver la verbena...*

...mi iras min montri kaj vidi kermeson...

Ses brikojn.

y á meterme en la cama después...

kaj al domo por enlitigi min...

kaj interne restis la martinto, sen literoj, sen titoloj, eble sen familio, miksita kun fremdaj mortintaĵoj kaj kun ostoj falintaj el la plafano.

Enamiĝintaj animoj

Kun nerva nedecideco, kun malpezaj movoj irante, alvenante kaj alproksimiĝante, per la suprenirado kaj teran malsupreniradon, sin ĉirkaŭante kaj persekutante, sin karesante per la flugiloj, kiujn havas la papilioj, tiel, unu proksime de la alia, mi vidis du erarlumojn.

Ĝi estis dum luna nokto, ili trakuris ĉiujn tombojn, flaris ĉiujn florojn, kaj ree malaperis.

Ili nur povis esti animoj, kiuj sekvis amante unu la alian, kaj sentantaj pri tio, kie ili estis.

La lumetoj de du animoj interkonsentante kuniĝi por ekflugi.

Ludiloj

En la lasta libro de la vivo, ĉe la tombeja libro, flanke de 1' folioj plej pompaj, de la paĝoj ornamitaj per afekta kaligrafio, de afektemaj bindaĵoj, estas kie oni renkontas la foliojn plej intimajn kaj delikatajn, plej amajn literojn, la plej nigran kaj malgajan inkon; paĝojn ne skribitajn aŭ kiujn la kisoj malaperigis, blankajn paĝojn, ĉar oni ne havas vivajn vortojn por diri kion oni deziras; pecetojn da koro binditajn en la tombo kaj ĉarmajn sentoj, kiuj ne trovante tradukon, ili sin lasis fali sur la tombon kaj florigis tiujn florojn, kiuj enhavas sukcon el larmoj, kaj senkolorigitajn kolorojn el anima malsaneco.

Multe da tiuj ĉi pecetoj, ni vidis pendantaj en tiuj toraboj aŭ falintaj sur la tero. Portretojn, kiujn la suno kaj la lipoj malaperigis; pecetojn da harplektaĵoj ĉiuj blondaj, ĉar la amo fariĝis ili tiaj, ringfingrojn kiuj atentigas pri dato de blukoloraj tagoj; velkintajn florojn premitajn kaj sekigitajn per kiso da vortoj enfermitaj inter du paĝoj; relikvojn kaj promesojn; sed neniu el tiuj ĉi paĝoj diras, kion diris sola paĝo, kiun mi vidis ĉe malriĉa tombejo.

Post la tombovitro, oni vidis amason da ludiloj: pupojn pastfari-tajn, kartonan kuirejon, ĉevaleton, teleretojn por pupoj, kaj plumban sonorilon; eĉ lignajn kuleretojn kaj duondetruitan stablon reprezentantan kie naskiĝis la Savinto de la mondo.

Kiel ja oni vidas patrinon, per tiu elmontrejo da sentaj pecetoj.

Certe se tie ne estus estinte la vitro, oni ja estus trovinte ŝian koron meze de tiuj relikvaĵoj!

Rutinsercante

Ne ĉiuj mortintoj havas patrinon, nek ĉiuj infanoj tombojn por ke oni alportu tien relikvojn; duope, ĉiuj samaj, vizaĝmontrante tiun malsanan grizecon kaj tiun mizeran sigelon de savitaj infanoj, mi vidis preterpasi la bastardojn, antaŭ la vicoj da tomboj.

Same kiel la numeritaj tomboj, malvarmigis vidi ilin, ĉiuj montrantaj ankaŭ iom de administracia signo, de metoda malvarmeco, de regularigita almozo, de moderna samformeco.

Kion serĉis tiu griza banto, rutinmarsanta kaj glitante silentema? Por kio legi tiujn tombŝtonojn, se sur neniu el ili estis skribitaj iliaj nomoj? Kie ili devis plori, rifuĝi, kaj ŝirmi siajn korojn, se ili ne sciis el kie ili devenis, nek kie ili estis falontaj?

Kien ili alportus floron, se dezertaj estas iliaj vivoj, ne havas ĝardenojn el kiuj ili povas elŝiri floron, nek scias kien ili devas alporti ĝiajn?

«Dio mia, — tiam mi pensis, — se ili hazarde preterpasus tiun kompatindan vitron, kaj vidus la tieajn ludilojn!».

La lasta tombo

Ĉiujare, en la tago de ĉiuj mortintoj, mi ĵetus kronon en la maron malproksimen de la marbordo.

Jen la loko, kie estas pli da tomboj.

El la folioj de la vivo, tiu estas la plej homhava, la plej granda kaj mistera.

Ĝi estas la plej granda tombejo, kie falas malpli da kronoj.

TABELO DE ENHAVO

AL DOKTORO L. L. ZAMENHOP	V
PROLOGO.	VII
AL LA LEGANTO	IX
SENCELE	XI
KOLEKTO DE LA KORO.	XIII

Printempaj folioj

Artefarita printempo	1
Natura printempo	2
Kion diras la floroj	4
Malgaja muziko	5
Bruoj de vivo	5
Libereco	6
La deveno de 1 ^o Arto.	16
Multprofita tago.	18
Dankemeco	19
Interna heleco.	19
La blua korto.	20

Someraĵ folioj

Fabriko de sanktulfiguroj	29
Apud maro.	30
Trairantaj birdoj.	32
Bona personaro	34
Mizero malbrila	37
Historio de du pordofrapiloj.	39
La Floraj ludoj de Consuegra	42
Malgaja horo	41
Blanka kaj nigra.	46
Pravigi simion	47
La freneza orangutango	49
La nova incenso.	51
Nova izoleco	51
La nigra tagmanĝo.	52

Aŭtunaj folioj

Soleco	57
La amikoj de la plafono	57
La feliĉegulo	59
Lumo eterna	61
Lumo malvarma.	62
Estingita lumo	63
Nokta.	63
Bruoj de kvieteco	64
Griza sentaĵo.	65
Juerga malgaja	67

Vintraj folioj

La domo en Parizo	75
Trairante	82
Rapida vizio	83
La lasta vojaĝo	83
La najbaro.	84
La amo de la barko.	86
Lasi morti aŭ vivi	88
La atendejo.	89
Sonĝo nigrokolora	90
Roskolora sonĝo.	92

Lastaj folioj

Deziro	95
Kontrasto	95
La krono	96
Enterigo.	98
Enamiĝintaj animoj	100
Ludiloj	101
Rutinserĉanta.	101
La lasta tombo	102

PRESEĜAROJ

PAĜO	LINIO	DIRAS	LEGU
iv	20-21	serĉas	ŝercas
2	28	blankoloreco	blankkoloreco
50	18	kiun	kun
50	31	kago	kaĝo
61	30	kompatiuda	kompatinda
63	17	kavrilojn	kovrilojn
76	10	serĉaj	ŝercaj
78	29	in	iu
79	24	kapturmigis	kapturnigis
81	12	peligis	petegis
81	14	korpkovriloj	korpkovriloj
81	25	kompdomon	kampdomon
81	27	ka	kaj
81	32	montojn, de	montojn de
81	39	operacio	operacion
82	8	malgajeja	malgajega
82	14	ventelon	venteton
82	28	kusanta	kuŝanta
82	28	arterio	arteria
85	29	altojoj	altaĵoj
86	3	foretos	forĵetos
87	12	okulis	okuloj
87	38	ensaltis	ensaltis
88	16	kaj en kiu dum	kaj pri kiu, dum
89	7	malsaniĝis	malsaniĝis
89	12	ilin pruntdemandis	pruntdemandis

PAĜO	LINIO	DIRAS	LEGU
89	lasta	ka	kaj
90	4	flanco	flanko
90	6	ne estis	ne estus
90	9	homprezco	homprezo
90	10	manskribajo	manskribaĵo
90	21	malvarmugis	malvarmigis
90	23	maljanulon	maljunulon
95	4	malumo	mallumo
95	7	tristalan	kristalan
95	19	hoj,	boj,
96	13	suprenirisis	supreniris
97	23	lo	la
97	28	kiom	kion
97	36	deferenco	diferenco
97	36	aldomis	aldonis
99	8	ber	per

COLECCIÓN ESPAÑOLA «ESPERANTO»

J. ESPASA É HIJOS, EDITORES, CORTES, 579. — BARCELONA

	Pesetas
N.º 1. Primeras lecciones de «Esperanto», del profesor <i>Th. Cart.</i> Traducción de A. L. Villanueva	0'60
N.º 2. Manual y ejercicios de la lengua internacional «Esperanto», por don Vicente Inglada Ors, capitán de estado mayor, y don Antonio López Villanueva, profesor normal, con un prólogo de Carlo Bourlet, presidente del Grupo Esperantista de París (2.ª edición)	3'00
N.º 3. Vocabulario Esperanto-Español y Español-Esperanto, por los mismos autores y con un prólogo de P. Fruicfier; nueva edición en 2 volúmenes, notablemente corregida y aumentada. <i>Vocabulario Esperanto-Español.</i> <i>Vocabulario Español-Esperanto.</i>	1'50 3'50
N.º 4. Curso práctico de Esperanto y Clave de los temas y ejercicios contenidos en el Curso práctico, por los profesores R. Duyos Sedó, capitán de infantería, y V. Inglada Ors, capitán de estado mayor, con una carta-recomendación del doctor Zamenhof	3'00

La Suño Hispana

ÓRGANO DE LA SOCIEDAD ESPAÑOLA PARA LA PROPAGACIÓN DEL

ESPERANTO

REVISTA MENSUAL EN ESPERANTO Y EN ESPAÑOL

Director-Administrador, AUGUSTO JIMÉNEZ LOIRA

Pintor López, 3. — Valencia

Suscripción anual: 3 pesetas en España y 3 francos en el extranjero.
Para informes al Director.

Sociedad española

PARA LA PROPAGACIÓN DEL

== ESPERANTO ==

Presidente, D. MANUEL ESTEBAN. — Secretario, IGNACIO CASAS

Cuota anual: 1 peseta

Para informes dirigirse al Secretario: *I. Casas*, Banco de *Burgos*.

